

Anna Löwenstein



Senpaga provlibro!

MORTO de ARTiSTO

FEL

Morto de Artisto

Kovrilo: murpentraĵo el la vilao de la imperiestrino Popea ĉe Oplontis, detruita de la erupcio de Vezuvio en la 1-a jarcento pK.

Morto de Artisto

Anna Löwenstein



Serio Stafeto n-ro 33

**eldonita de Flandra
Esperanto-Ligo**

al renato

Qualis artifex pereo!

Mi mortas: kia artisto perdiĝas!

NERONO

UNUA PARTO

La Sunĉambro estas mia preferata loko en la vilao. Vitaliso ĉiam ŝercas pri tio. Ŝi trovas tion amuza, ke dediĉinte tiel grandajn sumojn por dekori la ceteran parton de la domo, mi tamen elektas sidi ĉi tie, en ĉi tiu malgranda, simpla ĉambro kun la banalaj murpentraĵoj kaj la eluzita divano postlasita de Montano. Sed ĝi estas tuj apud la forno, do ĝi restas varma eĉ dumvintre, kaj kiam la fenestrokovriloj estas flankenŝovitaj mi havas vastan perspektivon super la tuta valo.

Loĝante ĉi tie de tiom da jaroj – ĉu dek tri? dek kvar? – mi apenaŭ povas kredi, ke ĉion ĉi oni povus forpreni de mi. Nun kiam mi timas perdi ĝin, mi ekkomprenas ĝis kia grado mi ligiĝis al la ejo.

Sed mi vidas nun, ke tiu risko ĉiam ekzistis. Mi similis homon, kiu marŝas laŭ la rando de alta krutaĵo. Mi ne volis rigardi funden al la maro, kiu ŝaŭmadis malsupre ĉirkaŭ la rokoj, nek fronti la eblecon, ke iam la grundo povus fordiseriĝi sub miaj piedoj. Ĉar la fakto estas ke la tuto – mia prospero, mia pozicio, mia bonŝanco – ĉio dependis de unu homo.

Li estis fama pro siaj elspezemo kaj donacemo, pro siaj pasioj, pro sia entuziasmo dividi siajn riĉaĵojn kun la publiko per distraĵoj kaj spektakloj. Li estis amata pro sia grandiozeco – kaj certe grandiozecon oni atendis, eĉ postulis, de persono en lia pozicio.

Multaj homoj rifuzas kredi, eĉ nun, ke li mortis. Ili konsolas sin per onidiroj, ke iu vidis lin, eble en Egiptujo, aŭ en Partujo ¹, aŭ plej verŝajne en Grekujo, lia amata Grekujo, la lando kie en la tuta imperio oni memoras lin kun plej granda plezuro kaj kie oni plej sincere

funebriŝan morton. Sed tiaj esperoj povas trafi nur seniluziigojn – mi estas la homo, kiu plej bone scias tion.

Mi foje demandas min, kion mi farus, se pro ia nerealegebla miraklo li aperus ĉe mia pordo, fuĝanto, vestita en la sama maldelikata, malhela tuniko en kiu mi laste vidis lin. Ĉu mi pretus forgesi la misagojn kiujn li faris, la amikojn kiujn li detruis?

Jes, mi memoras ĉion ĉi, kaj tamen mi ne povus rifuzi al li pardonon. Al li mi tro multe ŝuldas.

Li estis la homo, kiu faris min tia, kia mi estas.

Ĉiuj aktoroj malamas ludi ĉe festaj vespermanĝoj. La pago estas minimuma, kaj ĝenas la sklavoj kiuj kutime vagadas tra la ĉambro, por ne menciigi enuajn gastojn kiuj babilas sub la nazoj de la ludantoj. La gastoj de Vitelio ne estis malbona spektantaro, se oni konsideras la cirkonstancojn. Ili aŭskultis tiom atente kiom oni povus esperi, kaj ridis je la ĝustaj punktoj.

Ni jam ĝuis senprecedencan sukceson dum la tuta vintro pro nia nova skeĉo, ŝerca reverkaĵo de la historio de Danao kaj la ora pluvo. Nu, estis tiel: la edzino de la pasintjara konsulo ĵus gravediĝis, kaj ĉar ŝi estis verva dekkvinjarulino sed ŝia edzo mezaĝulo malloga, kiu apenaŭ permesis al sia juna edzino eliri el la domo... do, vi povas imagi la ŝercojn, kiuj disflugis ĉiuflanke. Jen la inspiro de nia skeĉo: arda amanto ĉiam trovos ian manieron por eniri, same kiel Jupitero sukcesis enrompi en la bronzan turon, kie Danao estis enŝlosita de sia patro.

Estis frakcio en la Senato, kiu havis intereson misfamigi ĝuste tiun konsulon – kaj do, nia trupo estis antaŭmendita por prezenti nian skeĉon ĉe tuta serio da festaj vespermanĝoj en pluraj el la plej eminentaj domoj de Romo. La manĝosalono de Vitelio estis pli intima ol impona, kun sufiĉa spaco nur por tri divanoj ĉirkaŭ unuopa tablo, sed ne eblis maltrafi la manieron laŭ kiu la arĝenta manĝilaro flagretis en la lampobriilo, aŭ la luksan glimon de la sofokovriloj.

Primo, kun abunda falsa barbo, rolis kiel Jupitero. Lia fratino Rupilila, kies ĉefa vesto estis nur diafana ŝalo, kuŝis antaŭ la panelo, kiu reprezentis la bronzan turon de Danao. La ora pluvo sukcesis perfekte. Tiam Primo, post sia deviga solkanto – brila aktoro li ne estis, sed li havis bonan voĉon – forprenis la malmultajn vestojn, kiuj restis al Rupilila, kaj ŝi cedis al lia brakumo dum Manduko rulŝovis ilin kune kun ilia lito malantaŭ la panelon.

Nun venis mia granda momento. Mi havis komikan scenon kun Rupilio, kiel du gardistoj antaŭ la turo, dum Jupitero kaj Danao faris kiu-scias-kion interne. El la angulo de mia okulo mi konsciis pri paro da junuloj kliniĝantaj sur la dua divano, kiuj rigardis la prezenton kun esprimoj de vigla atento; ĉiu aktoro esperas ludi antaŭ tiaj spektantoj. Ili ŝajnis apenaŭ pli aĝaj ol mi mem, kaj mi sentis la tenton trafi ilian okulon. Sed tio kostus al mi la haŭton. La ridojn de la spektantoj rajtis rikolti nur Rupilio; mia tasko estis semi la enkondukajn frazojn por ke li ricevu la fruktojn.

Poste envenis Celerina kaj Kvartila, en ne multe pli da vestoj ol surhavis Rupilila, kiam ni laste ŝin vidis, kaj prezentis hispanan dancon laŭ la akompano de Urso. Danao reaperis de malantaŭ la panelo, nun vestita kiel respektinda sinjorino kun granda falsa ventro. Ŝi havis ferman scenon kun Rupilio, antaŭ ol ili kune turnis sin al la spektantoj por inviti aplaŭdojn.

Vitelio traktis nin tre kompleze. Kiam la prezento finiĝis, li invitis nin aliĝi al la gastoj; malmultaj homoj de lia klaso pretus fari tion. Mi ekdivenis la motivon de lia afableco, kiam li vokis Primon al sia divano. Primo estis la plej alloga membro de la trupo. Foje mi enviis lian freŝan, brilokulan aspekton kaj bonan figuron, sed ne ĉi-okaze. Ne estis risko, ke miaj pinta vizaĝo kaj sengrasa formo trafos la atenton de viro kia Vitelio.

Primo direktis petegan rigardon al sia patro, sed Rupilio tiumomente havis aliajn zorgojn. Li jam malvolonte akceptis lokon sur la malĉefa divano, sed liaj okuloj sekvis ĉiun movon de la balailo, dum Manduko forbalais la restaĵojn de la ora pluvo. Mi ne scias, kial li tiom maltrankviliĝis. Laŭ unu el niaj ŝercoj, anstataŭ aperi al la junulino kiel pluvo el oro, Jupitero alprenis la formon de hajlo el kvaron-asoj. Kaj kiel Danao atentigis sian esperplenan amanton, la sola afero aĉetebla

nuntempe per kvarono estas vizito al la publika necesejo.

La junulinojn Rupilio jam sendis ekster la ĉambron. Ĉi tiu estis festo unuaranga, kaj unuaranga estis ankaŭ nia trupo. Tiel li emis pretendi. La vera kialo, kiel ni ĉiuj bonege sciis, estis ke li tute ne intencis permesi al siaj dancistinoj fali en la manojn de la gastoj de Vitelio. Graveda dancistino ne utilas al iu ajn.

Mi rigardis al la direkto de la du junuloj, kiujn mi rimarkis dum la prezento. Ankaŭ ili rigardis min, kvazaŭ ili ĝuste atendis, ke mi trafu ilian okulon, kaj mansvingis al mi invite. Mi ekprenis lokon ĉe la rando de ilia divano, subpremante idiotan deziron regali ilin per rideto brilega. Mi foje vidis tiajn junajn bonhavulojn en la unua vico ĉe la teatro aŭ promenantajn preter la luksaj vendejoj laŭ la Sankta Vojo. Ricevinte nun de ĉi tiu duopo inviton

kunbabili, mi ne volis tro evidentigi mian entuziasmon.

Ŝajnis ke la pli aĝa, laŭaspekte proksimume dudekjara, dediĉis sufiĉe da tempo al sinbeligado. Ne nur lia vizaĝo sed eĉ liaj brakoj kaj kruroj estis senharigitaj kiel tiuj de dancisto, kaj lia ondumanta frizaĵo videble ne kreskis nature. Lia pli juna amiko estis sufiĉe neloga: diketa, kun aknoj kaj la unua sugesto de lipharoj. ‘Kiu estas via teamo?’ li volis scii, tuj kiam mi sidiĝis.

‘La Ruĝuloj,’ mi respondis senhezite. Mi estus farinta ion ajn por posedi tunikon kiel la lia. Ĝi estis el lano tiel densa kvazaŭ ĝi apenaŭ forlasis la dorson de la ŝafo, kaj ĝi estis tinkturita per riĉa safrana nuanco kun duobla bordero el interplektitaj ondoj laŭ la greka stilo.

La posedanto de la tuniko esploris min per miopa rigardo. Li havis ne tute blondajn harojn, bluajn profundajn okulojn kaj grasetajn vangojn kun

karnecaj lipoj, kiuj donis al li la aspekton de indulgata infano. ‘Ĉu la *Ruĝuloŝ*? Vi ne volas aserti, ke vi entuziasmas pri tiu idioto, Rutubo? La lastan okazon, kiam mi vidis lin konkursi, li tro proksimiĝis al la barilo kaj detruis sian ĉaron.’

‘Oni enpremis lin!’ mi respondis, forgesante paroli respektplene pro la deziro defendi mian teamon. ‘Kun Gluterino kiu alpuŝis lin de malantaŭe, li estis devigata proksimiĝi al la centro. Kaj poste venis tiu Blua ĉaristo, kiu viptranĉis lian ĉevalon.’

‘Bona stiristo ne devus havi problemojn pro alia konkursanto, kiu vipas liajn ĉevalojn. Mi mem subtenas la Verdulojn.’

Surprizis min tiu informo. Mi nature supozis, ke ĉi tiu aristokrata junulo krius por la Blua teamo, aŭ eble por la Blankuloj.

‘Sendube vi ŝatus iom da vino,’ diris lia pli aĝa kunulo, kaj signalis al unu el la sklavoj per arta gesteto de la fingro. Dum tiu verŝis al mi la vinon li aldonis, ‘Ŝajnas, ke via amiko tiklas la guston de nia gastiganto.’ Mi turnis mian rigardon al la ĉefa divano kaj ridetis ene de mi. Vitelio, ruĝvizaĝulo kun mezaĝa ventregoj kaj multe tro da mentonoj, flustradis en la orelon de Primo, kaj nun li lasis sian manon kvazaŭ senatente sur ties femuro. Primo sukcesis eligi laman rikanon, sed estis klare ke por li la festo ne promesas plezuron.

‘Vitelio ĉiam kondukas tiel,’ daŭrigis la afekta junulo. ‘Lia problemo estas, ke li ankoraŭ volas pruvi al la mondo, ke li estas vera viro. Vi scias, kion oni diras pri li: li pasigis grandan parton de sia knabeco lekante la kacon de Tiberio.’

‘Tiberio?’ mi diris. ‘Ĉu la imperiestro?’

‘Kompreneble. Ĉu vi ne aŭdis pri la vilao ², kiun li konstruigis por si en

Kapreo? Li aranĝis, ke teamo de knabetoj – ĉiuj el la ĉefaj familioj de Romo, cetero – estu trejnitaj, por ke ili naĝu inter liaj kruroj kaj plezurigu lin, dum li estas en la baseno.’

‘Oto!’ protestis lia graso amiko, ruĝiĝante kun knabineca rido. Pro lia senĝena sinteno en ĉi tiu rafinita medio, mi ĝis tiam supozis lin proksimume samaĝa kiel mi. Mi nun konstatis, ke li estas sufiĉe pli juna, verŝajne ne pli ol dekkvinjara. Ankaŭ mi ridis, kvankam efektive miaj infanaj jaroj ne estis tre malsamaj ol tiuj de Vitelio – krom la fakto, ke mi pasigis ilin en multe malpli agrablaj ĉirkaŭaĵoj ol vilao imperiestra. Estis amuze imagi tiujn bone nutritajn knabetojn kun la aristokrataj nomoj, devigataj submetiĝi al simila traktado kiel tiu, kiun sklavoj ricevas la tutan tempon.

Ŝajne la knabo opiniis, ke estus preferinde ŝanĝi la temon. ‘Mi ĝuis vian scenon kun la alia gardisto. La maniero

laŭ kiu li kuris surloke, kiam li kredis, ke la reĝo vokas lin – tio estis elstara!’

Jen finfine mia ŝanco brili antaŭ ili. Neniam antaŭe mi parolis kun tiel aristokrataj junuloj, sed mi ja sciis, kiel rakonti anekdoton. ‘Jes, Rupilio specialiĝas pri tio. Vi devus vidi lin, kiam li prezentas atleton, kiu pretiĝas antaŭ konkurso. Li faras la tutan rutinon – vi konas ĝin, li ŝajnigas froti sin per oleo, li saltetas, li tamburas sur sia brusto – kaj tiam li prenas la pozicion por ekkuri. Oni atendas, kaj atendas, kaj atendas – kaj tiam li ekkuras surloke. La spektantaro ĉiufoje krevas pro ridoj.’

Ankaŭ ili ridis, kaj la graseta knabo ekdemandis, ‘Diru al mi... kiel vi nomiĝas, cetere?’

‘Prokulpio, mia sinjoro.’

‘Prokulpio. Ĉu mi imagas la aferon, aŭ ĉu mi ne jam aŭdis tiun scenon – tiun

inter la du gardistoj? Ĝi pensigis min pri io el *La lakeo*. Ĉu vi konas ĝin? Ĝin verkis Nevio.’

‘Vi tute pravas,’ mi diris. ‘Ni ja prenis el ĝi la scenon – evidente, kun kelkaj ĝisdatigoj. Mi miras, ke vi rekonis ĝin. Certe pasis jaroj de kiam oni laste prezentis tiun teatraĵon.’

‘Ne post la tempo de Sulao, supozeble,’ aldonis lia afekta amiko. ‘Neniu plu volas vidi la teatraĵojn de Nevio.’

‘Domaĝe,’ mi diris. ‘Mi foliumis tra *La lakeo* dum mi kopiis mian rolon, kaj mi trovis ĝin ankoraŭ amuza, eĉ post tiom da jaroj.’

‘Jes,’ diris la pli juna knabo. ‘Mi bedaŭras, ke oni ne pli ofte revivigas tiujn malnovajn teatraĵojn.’

‘La homoj nuntempe volas nur dancospektaklojn kaj klaŭnadon,’ mi klarigis. ‘Se oni provas proponi ion kun

pli da dialogo, ili plej verŝajne forvagos antaŭ la fino. Kaj se samtempe okazas gladiatora luktado – nenio farebla.’

Li ridis, kaj mi demandis, ‘Sed serioze, mia sinjoro, mi miras, ke vi konas la teatraĵon de Nevio. Nuntempe eĉ akiri kopion estas preskaŭ neeble.’

‘Nu, mi legis ĝin ĉe mia onklino. Ŝi havas tutan kolekton. Sed tiu estas la sola, kiun ŝi posedas de li. Mi ŝatus scii, kion alian li verkis.’

‘Rupilio havas plurajn,’ mi diris. ‘*La mantelo, Kojonoj*, kaj krome li havas unu-du el la tragedioj.’

La esprimo de la knabo sugestis, ke li ĵus stumblis sur poto da oro meze de kampo. ‘Ĉu vere? Mi ege ŝatus ilin prunti por kopiigi.’

‘Rupilio havas tutan keston da malnovaj teatraĵoj, kiun li heredis de sia avo. Sed li ne volonte pruntedonas ilin. Estus

maleble anstataŭigi ilin, se okazus iu miso.’

‘Al mi li certe pruntos ilin. Morgaŭ matene mi sendos iun por paroli kun li. Kie li estos trovebla?’ Neniam mi aŭdis homon tiel junan paroli kun tiel granda memcerteco.

‘Morgaŭ ni provludos,’ mi diris. ‘Ni kutime finas ĉirkaŭ la sepa horo ³, kaj poste ni iras al la banejo.’ Li aŭskultis kun intereso kaj demandis, kie ni faras niajn provludojn. Mi vidis, ke li intencas aperi antaŭ la fino por spekti. Nu, tio ne ĝenos Rupilion. Post kelkaj jaroj ĉi tiu junulo povus iĝi grava patrono.

‘La homoj nuntempe volas nur dancospektaklojn kaj klaŭnadon.’ Dum mi remarŝis kun la aliaj membroj de la kompanio al la gastejo, kie ni dormis, mi ripetadis ene de mi mian konversacion kun la du junuloj; ĉiun

vorton mi memoris. Ili parolis al mi preskaŭ kiel al egalulo, kaj flatis min ilia intereso pri miaj rakontoj de la vivo en vojaĝanta komika trupo. Precipe la pli juna knabo – kiel li nomiĝis? La pli aĝa estis Oto.

‘ Morgaŭ matene mi sendos iun por paroli kun li.’ Mi memoris la nekredeble memfidan tonon per kiu la pli juna diris tiujn vortojn. Mi imagis min mem, vestitan per tiu tuniko, kliniĝantan sur divano en ĉambro tiel luksega, kaj parolantan per la sama tono de trankvila certeco.

‘Mi vidas, ke vi ĝuis la vesperon, kara knabo.’

Tuj mi ĝustigis mian vizaĝon. Mi ne konstatis, ĝis Rupilio interrompis miajn pensojn, ke mi rikanas kiel komika masko. ‘Ne malbone.’

‘Supozeble vi ja scias, kun kiu vi babilis? Tiu diketa knabo?’

‘Ne, kiu li estis?’

‘Mia kara knabo, tiu estis la filo de la imperiestro.’

Mi konsterniĝis. ‘La filo de la imperiestro!’

‘Pli precize, lia adoptita filo. Antaŭe li estis Domicio Ahenobarbo. Tio estis antaŭ ol la imperiestro edziĝis al lia patrino. Nun oni nomas lin Nerono.’

2

La provludo la postan matenon estis katastrofa. Rupilio estis en malbona humoro, ĉar Primo ankoraŭ ne revenis, kaj ni ne povis kontentige labori sen nia kantisto. Li do decidis ripeti unu el miaj scenoj: tiun en kiu li regalis min per

piedbato al la postaĵo, tiel ke mi devis saltegi kiel pulo sur la dorso de hundo. Nur ke li miskalkulis la momenton, aŭ eble ne temis pri miskalkulo, kaj trafis min per vere sovaĝa piedbato; tiam, kiam mi falis, li tiris min supren kaj sekvis la afero per klaka vangofrapo.

Ĝuste tiam malfermiĝis la pordo por enlasi la du junulojn de la antaŭa vespero, sekvatajn de du servistoj. Rupilio tuj rapidis al ili kun ĝentila rideto. 'Miaj sinjoroj! Kia neatendita plezuro! Kiel mi povas helpi vin?' Jen metamorfozo inda je Jupitero mem.

'Ni ne volas interrompi,' Oto diris. 'Daŭrigu vian provludon.' Li rigardis ĉirkaŭ si, serĉante sidlokon, sed la sola estis kruda benko.

'Mia sklavo portos al vi seĝojn,' Rupilio diris kun kaggesto al Manduko, kiu tuj eliris, eĉ ne demandante kie, en la nepublikaj ĉambroj de teatro, Rupilio atendas ke li trovu paron da seĝoj. Tia

homo estis Manduko: pacienca, fidinda,
flegma – kaj ne tro demandema.

Sekvis paŭzo, kiu estus povinta esti malkomforta, sed la pli juna knabo – la filo de la imperiestro, se Rupilio estus kredinda – tute ne konsciis pri ajna embaraso. Li gapis ĉiuflanken kun grandaj okuloj, kiel vizitanto en templo. Ne estis tamen tiom por vidi: nur granda malplena ĉambro kun senzorge kalkitaj muroj kaj ŝtona pavimo, ne aparte varma, ĉar ni vaste malfermis ĉiujn fenestroklapojn por enlasi la lumon. La sola evidenta signo de teatra agado estis aro da pentritaj scenopaneloj apogitaj kontraŭ la muro. La knabo tuj iris por traserĉi ilin, senĝena kvazaŭ li mem posedus la tutan ejon.

Ekstere aŭdiĝis skrapbruo kaj Manduko envenis, puŝante antaŭ si scenejan tronon kaj du faldeblajn taburetojn. Rupilio volis pardonpeti, sed Oto interrompis lin. ‘Ĉu nur unu trono?’

Evidente por vi, Nerono. Mi prenos tabureton.’ Iliaj du servistoj restis stare.

Ni reludis la scenon de la komenco. Ĝi funkciis pli glate antaŭ spektantoj, kaj bonŝance Rupilio intertempe forgesis sian malbonan humoron. Ni okupiĝis pri nova skeĉo, pri junulo kiu per lerta artifiko – elkovita de lia ruza sklavo, kompreneble – persvadas riĉulinon kuŝi kun li dum forvojaĝo de la edzo.

Dum ni laboris, la pordo malfermiĝis kun laŭta bato por enlasi Primon. Ne rimarkante niajn vizitantojn, li tuj marŝis al Rupilio. ‘Kial vi ne helpis min hieraŭ vespere? Ĉu vi ne vidis tiun porkaĉon, kiu palpis min ĉie?’

Rupilio respondis konfuzite, ‘Mia knabo, ne temis pri porko: tiu estis Vitelio, bona amiko de la imperiestro kaj malavara patrono. Oni ne ofendas tian homon.’

‘Mi ne ofendis lin,’ Primo krude informis sian patron. ‘Tial mi malfruas.’

La tutan tempon mi freneze signaladis al Primo, kaj finfine mi sukcesis atentigi lin pri nia imperia vizitanto, kiu sidis kun vaste malfermitaj okuloj dum li ensorbis ĉi tiun interesan scenon. Primo tuj silentiĝis, tiam li ekbalbutis. ‘Miaj sinjoroj, pardonu min – mi ne rimarkis vin.’

‘Tute en ordo,’ Oto trankviligis lin. ‘Ne atentu pri ni – daŭrigu vian provon.’

Komence, Primo ne atingis sian kutiman nivelon. Li fuŝis la tekston, kaj poste li komencis sian kanton tro akute kaj ne povis atingi la plej altajn notojn. Ensorbiĝante en la laboro, li tamen iom post iom trankviliĝis, kaj kiam ni interrompis por mallonga paŭzo, li jam sufiĉe rekaptis sian aplombon por alproksimiĝi kaj tiri min flanken.

‘Prokulpio, mi nepre devas rakonti al vi pri la dankopago, kiun mi ricevis ĉi-matene. Cent sestercoj!’

‘Ĉu cent! Kion vi faros per ili?’

‘Nu, por komenci ni iros ĉi-vespere ĉe Azelinan.’

‘Ĉu Azelina apud la viandobazaro?’ Mi ne konstatis ĝis tiam, ke Oto aŭskultas. ‘Brilan armeon da junulinoj ŝi havas: ĝermanajn, etiopajn...’

‘Certe temas pri alia Azelina,’ mi diris. ‘Ni ne povas permesi al ni tian lukson. Ĉi tiu troviĝas fronte al la nova banejo, flanke de la Strato de Ŝuistoj. Ŝiaj junulinoj venas plejparte simple el Egiptujo.’

‘Egiptaj junulinoj estas tute en ordo,’ Oto diris. ‘Ĉi tio ŝajnas vere interesa. Laŭ mi, ni aliĝu. Kion vi opinias, Nerono?’ Nerono ege ruĝiĝis kaj ludetis per sia brakringo. ‘Nu, kuraĝon! Ĉu vi

ne diris, ke via patrino restas for en Antio? Kaj via patro ne ĝeniĝos, ĉu ne?’

La patro de Nerono? Ĉu la imperiestro?

Nerono tusetis nerve. ‘Mi eĉ ne vidas lin dum amaso da tagoj sinsekve.’

‘Do, jen. Kaptu la okazon, dum vi havas ĝin.’

Primo kaj mi interŝanĝis maltrankvilan rigardeton. De kiam iuj pli aĝaj amikoj invitis nin akompani ilin ĉe Azelinan la antaŭan jaron, nia ĉefa penso estis tio: kiom da tempo ni bezonos por iel kunmeti sufiĉe da mono por nia posta vizito. Ne temis nur pri la junulinoj, sed pri la tuta situacio: kliniĝi senzorge sur divano, spekti la dancistinojn, vidi la pentraĵojn, akcepti la alportatajn trinkaĵojn... sed, kiel aktoro, mi jam vizitis sufiĉe da aristokrataj hejmoj por rekoni la diferencon inter aŭtentika lukso kaj la rabatita versio proponata ĉe Azelina, kaj mi suspektis, ke Oto kaj

Nerono ne estos same ravitaj pri la loko kiel ni. Mi memoris tiun fiodoron, kiu ĉiam trafis min kiam mi enpaŝis la enirhalon, naŭzan mikson el parfumo kaj malbonkvalita lampoleo kaj seksumado; la grasomakulitajn plankojn, gluecajn pro misverŝita vino kaj sputaĵoj; kaj mi diros nenion pri la aliaj, pli dubindaj spuroj lasitaj de la klientoj de Azelina.

‘Mia sinjoro, mi timas, ke ĝi estas sub la nivelo, kiun vi kutimas,’ Primo diris. ‘La manĝoj...’

‘La manĝoj! Ni ne iras pro la manĝoj. Cetere, ni facile povos mendi ion ekstere.’

La alveno de Oto kaj Nerono kaŭzis rimarkindan agitiĝon, kiam ni ĉiuj aperis ĉe Azelina. La junulinoj premiĝis ĉirkaŭ ni, kaj Azelina mem proksimiĝis por tiri min flanken. ‘Kiu estas tiuj du?’ ŝi

flustris, ŝovante kontraŭ mia brako sian grandegan, rigidan bruston, dum ŝvebis ĉirkaŭ mi sufoka nubo de kasio.

Neniam antaŭe mi rimarkis, kiel ŝia blanka ŝminko maldensiĝas ĉirkaŭ la buŝo por malkaŝi vicon de sulketoj. Mi iom fortiriĝis. 'Ne mankas al ili mono. Nepre alportigu bonan manĝon.'

Oni kondukis nin al la divanoj, kie ni kuŝis por ke la junulinoj forigu niajn ŝuojn. Ili eĉ lavis niajn piedojn: rafinaĵo, kiun oni kutime pretersaltis ĉe la respektinda domo de Azelina. Tiam ili kronis nin per floroj kaj verŝis al ni vinon. La vino estis de kvalito, kiun mi malofte spertis. Riĉa kaj densa, ĝi glitis senurĝe en la miksujon kiel malhela mielo, kaj je gesteto de Azelina la sklavo maldensigis ĝin per apenaŭa aldono de varma akvo.

Mi rigardis ĉirkaŭe, vidante la lokon kvazaŭ per la okuloj de Oto kaj Nerono: la krudkolorajn sofokovrilojn, dekoritajn

per imitaj perloj, la ŝelon de ŝajna orfarbo malgluiĝantan de la lampotenilo, la tavolon de fulgo kaj malpuraĵaĉoj, kiu kaŝis la plafonon. Tuj je nia alveno enkuretis malgranda sklavido por replenigi la lampojn, sed ilia malforta brileto ne sufiĉis por forĉasi la suspektindajn ombrojn en la anguloj. De la gastejo malsupre alŝvebis laodoro de fiŝfritado, dum trablovo penetris inter la fenestroklapoj, kunportante la babiladon de preterpasantoj kaj kriojn de vendistoj en la vivoplena strato ekstere.

Mi ridetis pardonpete al niaj du kunuloj, timante ke al ili la tuta aranĝo impresas sufiĉe malelegante. Sed mi tuj vidis, ke pardonpetoj ne necesas. La vizaĝo de Nerono esprimis febran eksciton, dum li ekzamenis kun senkaŝa fascino la murpentraĵojn, kiuj celis proponi inspiron al tiuj klientoj, kiuj eventuale bezonus ĝin.

Tri-kvar junulinoj moviĝis al la libera spaco for de la divanoj, kaj dum vibradis la sensovekaj tonoj de la duobla fluto, ili alsturmis viglan dancon. Primo kaj mi interŝanĝis ridetojn. La dancado ĉe Azelina ĝenerale estis ne tro polurita, tamen ĝia vervo estis ĝuinda. ‘Ĉu vi ne volas danci?’ mi demandis. ‘Kaptu Erotian, antaŭ ol iu alia prenos ŝin.’

‘Ne granda espero por mi ĉi-vespere.’
Li kapindikis al la direkto de niaj aristokrataj kunuloj.

‘Vi tamen rajtas provi, ĉu ne? Rapidu!’

‘Kial vi ne provas mem?’

‘Ĉar mi atendas Akteon.’

‘La flutistinon?’ Li rigardis ŝin kaj levis la ŝultrojn indifere, tiam ekstaris por aliĝi al la dancantoj. ‘Nu bone, se tiu estas via gusto.’

‘Venu, ĉarmulo, kio pri vi?’ Unu el la dancistinoj ŝvebis al la apuda divano kaj haltis antaŭ Oto, stamfante, balanciĝante kaj tintigante siajn fingrocimbaletojn. Sen ajna hezito, Oto ekstaris kaj sekvis ŝin al la dancospaco, kie li levis siajn brakojn kaj svingis siajn koksojn, imitante la voluptajn movojn de la junulino. Videble tio ne estis lia unua fojo.

‘Kio pri vi, kara?’ Alia junulino proksimiĝis al Nerono kaj volis kapti lian manon por levi lin de la divano. Li time fortiriĝis kaj kapneis.

‘Ho, tamen provu, Nerono, senstreĉiĝu!’ Oto kriis al li. ‘Estos amuze, mi promesas al vi!’

Malvolonte Nerono leviĝis, kaj permesis al sia kunulino konduki lin for de la divano. Ŝi svingegis sian hararon kaj ekstamfis surloke laŭ maniero kiu tremigis ŝian tutan korpon. Fronte al tiu drama spektaklo, Nerono estis perdita.

Li necerte levis siajn brakojn kaj provis unu-du senkonvinkajn stamfojn, sed li tute ne sciis, kiel daŭrigi. Li sendis petegan rigardon al la flutistino, kvazaŭ li esperis, ke ŝi iel helpos lin.

‘Akteo, kara, kial vi ne donu al ni solkanton?’ Azelina sugestis. ‘Eŭĥariso, al Prokulpio ankoraŭ mankas kunulino.’ Kun ĝenata grimaceto la kundancantino de Nerono retiriĝis de la dancejo kaj ĵetis sin apud min sur la divano.

‘Gajiĝu, mielkuko,’ mi diris. ‘Eble mi ne havas tiel belan tunikon kiel li, sed atendu ĝis vi vidos, kion mi havas sube.’ Eŭĥariso ellasis gruntan ridon, kaj la koleraj ruĝaj makuloj ĉe ŝiaj vangoj malrapide forpaliĝis. Forgesante la flutistinon, mi tiris ŝin al mi por interŝanĝi kison.

Primo ekkuŝis apud nin kun Erotia, dum Oto kondukis sian fraŭlinon al la divano kiun li kundividis kun Nerono. Mallerta knabineto enportis la manĝetaĵojn –

multe pli varian elekton ol kutime – kaj Akteo regalis nin per kanto el *La spicokomercisto*, kiu furoris ĉe la Romaj Ludoj de la antaŭa jaro. Ŝi neniam ricevis formalan instruadon, mi kredas, sed ŝi konis ĉiujn novajn kantojn el la spektakloj. Kaj krome ŝi sciis ludi laŭ la Lida stilo, la Friga stilo, aŭ laŭ iu ajn alia stilo, kaj ŝi povis instigi siajn flutojn imiti la kantadon de birdoj, aŭ trumpetojn, aŭ Partan marŝmuzikon, aŭ ĉion alian kion oni petus. Ŝia patrino, laŭdire, estis alportita el Egiptujo, sed mi supozas, ke fluis en ŝi sango ankaŭ el alia mondoparto, ĉar ŝia haŭto havis nekutime malhelan nuancon, kaj ŝi havis densan nigran hararon kaj brilajn okulojn sub altaj brovarkoj.

‘Ĉu vi konas ion el *La knabino el Tarento?*’ Oto demandis. Tuj ŝi lanĉis sin en la melodion de la amoristino, fluan senzorgan peceton, kiu gajnis por ŝi aplaŭdon je la fino. Mi rimarkis, ke Nerono atentege aŭskultas: evidente li

estas same freneza pri muziko kiel pri teatro.

‘Belaj haroj,’ diris Eŭĥariso, kaj plektis siajn fingrojn inter miaj bukloj. Primo faris ilin por mi per ardanta fero, tuj antaŭ ol ni eliris.

‘Bedaŭrinde, ke vi ne vidis min kiel infanon. Oni nomis min Blonduleto.’

‘Viaj haroj ne estas blondaj!’

‘Ne plu – ili bruniĝis, pli-malpli, dum mi kreskis. Miaj praparencoj estis ĝermanoj. Mia avo estis tribestro – li estis kaptita dum unu el la kampanjoj de Ĝermaniko.’

‘Ĉu vere?’ Eŭĥariso ŝajnis tre imponata. ‘Viaj haroj tamen restis blondaj en aliaj lokoj,’ ŝi aldonis, kaj pasigis sian manon laŭ mia femuro. Mi tremis laŭ mia tuta korpo, sed antaŭ ol la situacio povis pluevolui, eniris la eta sklavido kun la ĉefa plado.

‘Ĉu vi parolis al Rupilio pri la manuskriptoj?’ mi demandis Neronon super la tablo dum ni ekmanĝis. Apud li sur la divano kuŝis Akteo, sed li aspektis malkomforte, kvazaŭ li ne precize scias, kion fari pri ŝi.

‘Mi vidis, ke li ne tro deziras, sed li ja permesis al mi trarigardi lian keston.’ Nerono formoviĝis de Akteo kaj kliniĝis entuziasme antaŭen por paroli kun mi. ‘Mirigan kolekton li havas tie. Kelkaj el tiuj manuskriptoj kredeble ne plu cirkulas de post la tempo de Cezaro. Li eĉ havis ekzempleron de *Medeo* de Akcio. Jam amason da tempo mi serĉadas tion.’

‘Ho, jen belega teatraĵo! Ĉu vi pruntis ĝin?’

‘Efektive jes, kaj kiam mi promesis farigi novan kopion, Rupilio diris, ke mi rajtas teni la originalon.’

‘Tipa Rupilio! Ricevas tute freŝan kopion, kaj interŝanĝe permesas al vi teni lian malnovan ĉifaĵon.’

‘Ne, vi ne komprenas. Kiam mi vidas tiujn flaviĝintajn volvaĵojn, en eksstila manskribo, kiuj eĉ surhavas la notojn de la aktoroj, tio al mi valoras multe pli ol bela nova kopio kun purpura kovrilo sed tute ne speciala.’

‘Ĉiu laŭ sia gusto. Vi provizu Rupilion per purpuraj kovriloj, kaj li lasos vin tralabori la tutan keston. Kompreneble, li verŝajne vendos la kovrilojn.’

Li ridis. ‘Dankon pro la sugesto.’

‘Mi iam havis kopion de teatraĵo de Akcio,’ Akteo diris. ‘*La Fenicoj*. Sed mi devis vendi ĝin.’

‘Kiel vi sukcesis akiri tion?’ Oto demandis kun rido.

‘Nu, mi heredis ĝin de mia patro. Li postlasis al mi plurajn papirusaĵojn, sed kiam li mortis, mi devis vendi ilin. Mi ŝparas por ilin reaĉeti.’

‘Ĉu vi scias legi?’ Nerono demandis, rekte alparolante ŝin la unuan fojon.

‘Ho jes, mia patro instruis al mi. Li estis kopiisto ĉe unu el la bienoj de la Klaŭdia familio. Li ricevis sian liberecon kiam lia mastro mortis, kaj tiam li ŝparis dum jaroj por elaĉeti ankaŭ min.’

‘Tio apenaŭ helpis vin, ĉu ne?’
Eŭĥariso komentis per miela voĉo.
‘Kiam trovis vin Azelina, vi vivis ludante la duoblan fluton ĉe stratanguloj.’

Akteo ruĝiĝis, kaj proksimiĝis al Nerono. Necerte, li glitigis sian brakon ĉirkaŭ ŝiajn ŝultrojn.

Komencis mallumiĝi kiam ni foriris, kaj la du sklavoj iris antaŭe kun torĉoj. Forlasinte la homamasojn kaj la lumojn de la bordela kvartalo, mi eksentis maltrankvilon, kiel ĉiam okazas, kiam mi devas marŝi malfrue tra la urbo. La stratoj en ĉi tiu kvartalo estis relative silentaj kaj la domoj jam estis ŝlositaj kontraŭ la nokto. Certe estis preferinde iri kiel membro de grandeta grupo, aliflanke mi timis, ke kun niaj sklavoj kaj torĉoj ni povus alvoki atenton nedeziratan.

Ni preskaŭ reatingis nian loĝejon, kiam realiĝis miaj timoj. Du viroj subite ekpaŝis antaŭ nin kaj demandis kun malica rikano, kien ni supozas iri je ĉi tia horo de la nokto. 'Lasu nin pasi,' diris la sklavo Doriforo per aŭtoritata tono.

'Kial la hasto?' unu el ili diris. 'Ni vidu, kion vi alportis.' Li perforte kaptis la torĉon el la mano de Epafrodito kaj

ŝovis ĝin kontraŭ Neronon. ‘Belan mantelon vi havas. Kie vi trovis ĝin?’

‘Lasu nin preteriri,’ Oto diris per danĝere milda voĉo. ‘Aŭ vi bedaŭros.’

‘Kial tiom rapidi? Mi volas rigardi la ringojn de via amiko. Ĉu ili estas veraj? Mi ne portus tian manplendon tra la urbo, se mi estus vi. Oni ne volus, ke iu ŝtelu ilin.’ Li eligis malbelan ridaĉon kaj laŭtigis sian voĉon. ‘He, Venusto! Venusto! Jen ĉi tie ulo reportas tiujn ringojn, kiujn vi perdis antaŭ kelkaj tagoj.’ Malantaŭ niaj dorsoj, du pliaj viroj paŝis el antaŭpordo. Oto fulme turniĝis, kaj subite li tenis en la mano glavon. ‘Rapide, Nerono! Eligu vian glavon!’ Mallerte Nerono tiris glavon de sub sia mantelo. Lia mano tremis.

Niaj atakantoj ne atendis eĉ tian malkonvinkan kontraŭstaron. Ili hezitis. ‘Vi ne estas soldatoj, ĉu ne?’ unu demandis. ‘Ĉu vi neniam aŭdis pri la punoj, se oni portas armilojn tra la

urbo?’ Subite Nerono eligis krion kaj impetis kontraŭ unu el la viroj, dum Oto kun preta glavo celis alian. Mi aŭdis akran krion apude, kaj Primo falis teren tenante sian kapon. Preskaŭ tuj la viroj fuĝis, forlasante sian kunulon, kiu tordiĝis tike sur la grundo en malhela makulo rapide kreskanta.

‘Ĉu vi estas en ordo, Primo?’ mi demandis maltrankvile.

Li levis sin sur la manoj kaj genuoj. ‘Mi volas vomu,’ li anoncis, kaj tuj faris tion abunde.

Oto rapidis al li kun torĉo kaj ekzamenis lian kapon. ‘Li estos en ordo. Verŝajne ili batis lin surkape per bastono aŭ simile. Jen, Doriforo, Epafrodito, helpu lin ekstarti. Prokulpio, vi prenu la torĉon.’

‘Kio pri li?’ mi demandis, indikante nian atakinton, kiu ankoraŭ kuŝis raspe spirante ĉe niaj piedoj.

‘Kio pri li? Liaj amikoj trovos lin morgaŭ matene.’

Tre ŝokite, ni daŭrigis laŭ la vojo al nia loĝejo, kie Oto kaj Nerono atendis ekstere en la strato kun Epafrodito, dum mi kaj Doriforo helpis Primon supren laŭ tri ŝtuparoj al nia ĉambro. Montriĝis, ke Sekundo enŝlosis sin, kaj ni devis tamburi ĉe la pordo por lin vekii.

Viro malfermis la najbaran pordon. ‘Kion je la nomo de Herkulo vi faraĉas, per tia bruego je ĉi tiu horo nokta! Vi aktoroj – la dioj tiru vin malsupren al la Infero!’

‘Ho, fermu la faŭkon!’ mi kriegis.

Sekundo malfermis la pordon. ‘Kion vi faris? Kio okazis al Primo?’

Doriforo kaj mi puŝis preter lin kaj tiris Primon al la lito. ‘La dioj rekompencu vin pro via helpo,’ mi diris fuŝe, dum mi demandis min ĉu mi ne devus doni al li

trinkmonon. Sed monon mi apenaŭ havis, kaj cetero Doriforo ne aspektis kiel tia homo, kia volonte akceptus tian ĝentilaĵon de ulo tiel malestiminda kiel komika aktoro. Mi estis certa, ke eĉ se li estas nura sklavo, li estas multe pli riĉa ol mi.

3

Nerono ne intencis maltrafi idealan okazon por viziti nin denove ĉe la teatro. Du tagojn poste li revenis, kun la preteksto demandi, ĉu Primo estas en ordo. Mi tiumomente estis okupata per provado de nova rutino kun du el la junulinoj kaj Sekundo, la pli juna filo de Rupilio. Mia propra kontribuo estis sufiĉe limigata: mi devis nur teni firma la ŝtupetaron dum Sekundo staris

surmane ĉe la pinto. Celerina kaj Kvartila laŭvice ĵetis al li lignajn bloketojn, kiujn li atente lokis sur la plej supran stangeton, ĝis li restis en ekvilibro sur siaj manoj sur du kolumnetoj da blokoj.

Ĉi tia rutino estis la specialaĵo de Sekundo. Je dek jaroj lia voĉo ankoraŭ ne evoluis, kaj li estis tro juna por seriozaj roloj, sed samtempe li fariĝis tro alta por la kupidoj kaj infanoj, kiujn ni kelkfoje bezonis. Rupilio jam de iom da tempo aludis la neceson akiri novan knabon – ni ĉiuj sciis, kion tio signifas. Mi mem sufiĉe suferis pro li kiam mi estis infano, kaj mi estis tre kontenta kiam mia voĉo maturiĝis kaj li perdis intereson. Hebo neniam plendis pro tiaj aventuroj de Rupilio; evidente ŝi ne konsideris knabeton serioza rivalo.

La nova prezentaĵo progresis bone, kaj ni paŭzis por ripozi. Celerina, kiu estis nia plej lerta akrobato, kaptis la okazon por ekzerci sin marŝi sur la manoj. Ŝi

paŝis tien-reen sur la planko kun sia robo nodita ĉirkaŭ la femuroj, kiam eniris Nerono kaj lia sklavo. Celerina haste rektigis sin, tirante malsupren sian robon kaj puŝante siajn senbuklajn pajlokolorajn harojn el la okuloj. Ni ceteraj salte ekstaris kvazaŭ kaptis nin nia mastro dum ni malŝparas tempon anstataŭ labori.

‘Mi ne interrompos vin,’ Nerono diris. ‘Bonvolu daŭrigi vian provludon.’

Tuj ni lanĉis nin en nian rutinon kaj eĉ realigis nian unuan preskaŭ perfektan provon. Ni ne jam decidis kiel fini, sed ni sukcesis improvizi fermon: Sekundo kriis al la junulinoj, ‘Kaptu!’ kaj reĵetis al ili alterne la brikojn, antaŭ ol malsuprensalti per senĝena transkapiĝo, dum Kvartila staris preta por rektigi lin. Ni ĉiuj unugenuie stariĝis por akcepti la aplaŭdon de nia spektantaro, kaj Nerono entuziasme kunfrapis la manojn. Epafrodito, kiu

staris ĉe lia dorso, montris sian ĝuon per rideto.

‘Kiel Primo fartas?’ Nerono demandis min.

‘Sufiĉe malbone, hieraŭ. Li restis en la lito la tutan tagon pro kapdoloro. Sed li venis al la provo ĉi-matene.’

‘Kiel plaĉus al vi la ideo reiri ĉe Azelinan ĉi-vespere?’ li demandis.

Eble li ankoraŭ ne komprenis ĝis kia grado mia socia nivelo malsuperas lian. ‘Mia sinjoro,’ mi diris, embarasate. ‘Mi estas sklavo.’

‘Kaj do? Ĉu via mastro ne permesas al vi eliri?’

‘Ne, tio ne estas la problemo. Mi rajtas iri kien ajn vespere – sufiĉas, ke mi ne aperu matene ĉe la provludo kun postebria kapdoloro.’

Li hezitis. ‘Kie estas Rupilio? Estas io, kion mi volas diri al li.’

‘Li estis en la ĉarpentejo, kiam mi laste vidis lin, por paroli kun la lignaĵisto. Ĉu mi iru serĉi lin por vi?’

‘Mi trovos lin mem. Nur diru al mi, kie estas la ĉarpentejo.’

Mi suspektis, ke li serĉas okazon por libere ĉirkaŭrigardi post la kulisoj, do mi klarigis al li kien iri, kaj komencis ŝanĝi miajn vestojn. Li revenis antaŭ ol mi finligis miajn ŝuojn.

‘Mi aranĝis ĉion,’ li diris. ‘Ĉi-vespere vi estos libera homo... kaj dum la tuta cetera vivo.’

Mi rigardis lin konfuzite. Mi ne aŭdacis permesi al mia menso salti al la evidenta konkludo. ‘Kion vi celas?’ mi demandis, tiel senzorge kiel mi povis.

‘Ĝuste tiel... ekde nun vi estas libera homo.’

‘Vi ŝercas, ĉu ne.’

‘Fakte ne. Iru demandi Rupilion, se min vi ne kredas.’

Sen alia vorto mi forlasis lin, kaj tuj iris eksteren al la laborejo de la scenistoj, kiu troviĝis en granda, malvarma kabano malantaŭ la ĉefa konstruaĵo. Mi rigardis internen, retenante mian spiron; ĉiam estis aĉaodoro pro la glusolvaĵo, kiun oni uzis por pretigi la scenaĵojn. Strangformaj paneloj apogiĝis kontraŭ la stablo, meze de laĝeto da rabotaĵoj. Manduko segis, kaj mi devis krei, por ke li aŭdu min.

‘Kie estas Rupilio?’

‘Mi ne scias – li nur enrigardis por diri, ke li iras al la trinkejo.’

Mi blasfemis kaj kuris eksteren, rekte en la brakojn de Rupilio. ‘Atentu!’ li blekis, kaj kliniĝis por repreni ringon, kiun mi faligis el lia mano. Rapide li ŝovis ĝin en faldon de sia tuniko. ‘Kie vi estis? Mi serĉadas vin.’

‘Ĉu Nerono venis paroli al vi?’ mi demandis.

‘Mia kara knabo, gratulon. Ŝajne vi akiris riĉan protektanton.’

‘Kion li diris?’

‘Li donis al mi ringon, kaj diris, ke mi liberigu vin.’

Subite mi ekkomprenis, kial li preskaŭ ŝtele reprenis la ringon kaj tuj kaŝis ĝin. Sendube ĝi valoris sufiĉe por elaĉeti la tutan trupon.

‘Kiuĵ estis la atestantoj?’ mi volis scii, kun tipe sklava singardemo.

‘Ne timu, kara knabo, kun tia protektanto ne estas risiko pri friponaĵo. Morgaŭ ni faros la tutan aferon laŭregule. Sed aŭskultu... restas nur tri tagoj ĝis la malfermo de la festivalo. Mi esperas, ke vi ne intencas forlasi nin je la lasta momento. Ni jam havas sufiĉe da zorgoj pro Primo. Nun, trankviliĝu, kaj reordigu vin. Viaj haroj aspektas kiel birdonesto. Ne, atendu, venu ĉi tien.’ Li tiris min al si kaj komencis rearanĝi miajn buklojn; mi ja ŝovis miajn manojn tra mia hararo kvazaŭ mi rolus kiel la senespera amanto. ‘Jen pli bone,’ li diris, kaj forsendis min per afabla frapeto ĉe la vango. ‘Do, ek! Ne atendigu vian koramikon.’

‘Nu?’ diris Nerono, kiam mi revenis.
‘Kion li diris?’

Mi ridis. ‘Li frapis mian vangon.’

‘Nun vi scias, ke vi estas libera homo. Tiu estas la lasta vangofrapo, kiun vi iam ajn ricevos de li.’

‘Ne estu tiel certa. Ni ankoraŭ ne finis la provludojn.’ Tiam mi falis surgenuen antaŭ li, kaj ekdiris la paroladeton, kiun mi preparis, revenante de la ĉarpentejo. Ĉar efektive mi antaŭe forkuris sufiĉe malĝentile. ‘Mia sinjoro, pardonu min, se unue mi ne kredis vin. Sed...

Post mil sendormaj noktoj,

Mil tagoj senesperaj...’

Tute abrupte, mia voĉo sufokiĝis pro larmoj kaj mi devis embarasate eksilenti.

‘...Konsternas min finfine

De revo realiĝo,’

Nerono daŭrigis la versojn. Imponis min lia kapablo kompletigi la citaĵon.

Krizeiso ne estas inter la plej konataj teatraĵoj de Pakuvio, kaj kvankam multaj homoj eventuale rekonus la vortojn, ne multaj scius ripeti ilin parkere.

‘Nu, ĉu finfine ni iros al la banejo?’ li diris senpacience. ‘Aŭ ĉu vi intencas eliri kun nur unu ŝuo?’ Mi rigardis al miaj piedoj kaj ekridis. ‘Kaj ĉesu nomi min *mia sinjoro*,’ li aldonis, dum mi sidiĝis sur la benkon por surtiri la alian ŝuon. ‘Mi ne povas amuziĝi, kiam ĉiuj en mia ĉirkaŭaĵo konstante volas lekaĉi miajn piedojn. Laŭ mi, vi prefere nomu min Domicio, almenaŭ dum ni estas ĉe Azelina. Mi ne volas, ke ĉiuj sciu, kiu mi estas.’

‘Se vi volas esti simpla Domicio, eble vi devus vesti vin malpli okultrafe.’ Mi aŭdis kun miro mian propran voĉon. Tiel parolas unu libera homo al alia. ‘Tiu via peza mantelo kaŭzis al ni kelkajn

malagrablajn momentojn antaŭ
nelonge.’

‘Vi pravas. Ĉu vi havas alian veston,
kiun mi povus surmeti?’

Mi kondukis lin al la trablovata ĉelo
malgranda, apud la ĉarpentejo, kie ni
enŝosis la keston de niaj kostumoj. Kiel
mi esperis, la pordo estis malfermita;
Hebo interne kudris, tuj apud la enirejo
por laŭeble profiti de la lumo. Ŝi apenaŭ
povis kredi tion, kiam mi klarigis, ke ni
volas interŝanĝi la bonan mantelon de
Nerono kontraŭ alia pli ordinara, sed ŝi
eltiris siajn ŝlosilojn kaj malfermis la
keston, certigante ke lia propra mantelo
restos sekura ĉe ŝi ĝis li venos repreni
ĝin. Ni havis ĉiajn aĵojn interne: robojn,
skarpojn, Gaŭlajn pantalonojn,
perukojn, kirasojn sufiĉe fatrasajn,
flugilojn, alfikseblan penison, eĉ unu-du
antikvajn maskojn apartenintajn al la
avo de Rupilio dum lia glora epoko.
Nerono estis plene sorĉata. Li tiris la
aĵojn el la kesto, unu post alia, ekscite

komentis pri ili, volis aŭdi iliajn historiojn, ĝis finfine malgraŭ la subpremata malkontento de Hebo, la enhavo de la kesto kovris la tutan plankon.

Post iom da tempo mi memorigis al li la celon de nia nuna vizito, kaj ni elektis por li mantelon de sklavo. ‘Nun eĉ via patrino ne rekonos vin,’ mi ŝercis, kiam li surmetis ĝin.

‘Herkule! Mi esperas, ke ne. Ŝi murdus min, se ŝi scius, kiel mi pasigas la vesperojn.’

‘Kio pri la ringoj? Vi vidis, kiaj estas la stratoj nokte.’

‘Vi pravas. Mi estus devinta pensi pri tio antaŭ ol eliri. Mi diros al Epafrodito, ke li portu ilin hejmen.’

Kaj tiel okazis ke mi, Prokulpio, liberigita sklavo, kaj Nerono, la estonta mastro de la mondo, ekiris akompanate

eĉ ne de unu sklavo al la bordelo de Azelina. La stratoj estis ne tre bruaj je tiu horo, ĉar multaj homoj profitis de la pli trankvila periodo komence de la posttagmezo por iri al la banejo. ‘Mi kredas, ke mi jam vidis vian trupon,’ Nerono diris dum ni marŝis. ‘Ĉu vi ne faris postludon dum la Plebaj Ludoj pasintan jaron?’

‘Ho, tiu? Ĝi ne estis io aparta.’

Li ridis. ‘Nur la kutima – kolera edzo, kaj amanto kiu kaŝas sin en ŝranko. Ĉu via trupo neniam prezentas klasikaĵojn?’

‘Do, por afekte paradi sur tiuj altaj kalkanumoj kaj deklami en masko, ĉu? Ne dankon, mi preferas aktori sur miaj propraj piedoj.’

‘Sed diru... Tiu amaso da malnovaj tekstoj, kiujn Rupilio tenas kaŝitaj en sia kesto...’

‘Li heredis tiujn de sia avo. Ni neniam ludis ilin, nur ŝtelas de tempo al tempo bonan scenon. Cetere, nia trupo estas tro malgranda: ne sufiĉe da viroj.’

‘Ĉu vi neniam ludis en masko?’

‘Kelkfoje, kiam ni bezonis apartan rolulon. Estas stranga sperto – kvazaŭ ne estus oni mem... ne, mi ne povas klarigi...’

‘Tamen, rakontu.’

‘Kvazaŭ la masko transprenus la rolon – aŭ kvazaŭ oni mem iĝus la homo, kiun oni prezentas. Sed ne plaĉas al mi. Mankas la ebleco uzi la vizaĝon.’

‘Eble vi tro multe uzas vian vizaĝon, kaj ne sufiĉe aktoras per la korpo.’

Mi konsterniĝis pro kritiko tiel trafa.

‘Tion ĉiam diras al mi Rupilio. Laŭ li, ni junaj aktoroj perdis la disciplinon porti maskon. Li opinias, ke ni tro dependas

de la vizaĝo, kaj ne plu parolas per la korpo.’

‘Li pravas,’ Nerono diris. ‘Ĉu vi vidis Pomponion kiel Tieston ĉe la Ludoj de Apolono pasintjare? La maniero laŭ kiu liaj manoj ekstremis, kiam li komencis suspekti, ke li manĝis siajn proprajn filojn: tio estis la plej brila momento de la spektaklo.’

‘Jes, ankaŭ mi vidis tion. Li estis elstara. Ni prezentis parodion poste, kun Rupilio kiu elfosis ĉiaspecajn aĵojn el la stufaĵo: perukon kun blondaj bukloj, kaj lignan kruron, kaj kompletan da falsaj dentoj...’

Ni ambaŭ ridis, kaj mi aldonis, ‘Tiuj malnovaj dramoj ja estas mirigaj, sed la vero estas, ke ili ne plu tenas la atenton de la spektantoj. La problemo estas tiu malnovstila lingvaĵo – sed plie, se oni ne donas al la homoj la plej variajn prezentojn por pluteni ilian intereson, ili

simple forvagas por rigardi spektaklon pli ekscitan.’

‘...ekzemple, homojn kiuj mortigas unu la alian en la amfiteatro. Ĉu vi scias – se mi estus imperiestro, mi proponus leĝon kiu malpermesus mortigi homojn nur por amuzi la publikon.’

‘Ĉu vere? Tio ne estus la plej brila maniero por mem populariĝi.’

‘Mi scias,’ li diris. ‘La imperiestro devas plaĉi al la publiko, same kiel aktoro. Kaj tio, kion la publiko deziras, estas amaso da spektakloj kaj amaso da mortigoj.’

‘Jes. Ne multaj esperoj por la klasikaĵoj je tia situacio. Sed mi diros al vi ion.’ Mi paŭzis kaj rigardis lin. Flatis min la atento de ĉi tiu aristokrata junulo, kiu tiel avide aŭskultadis miajn opiniojn – kompreneble, li aĝis nur dek kvin jarojn, du jarojn malpli ol mi. ‘Tio kion la homoj vere ĝuas,’ mi klarigis, ripetante aferon,

kiun mi ofte aŭdis de Rupilio, ‘la teatraĵoj, kiujn ili vere volas rigardi, estas tiuj kiuj memorigas pri la propra vivo. Kaj jen la problemo pri la klasikaj komedioj. Finfine, ili ĉiuj lokiĝas en Ateno.’

Nerono kapjesis. ‘Pli precize, en Ateno kia la homoj imagas ĝin.’

Intertempe ni atingis Suburon, kie svarmis agado, kiel ĉiam. Viroj staris ĉe la trinkejoj aŭ laboris ekster siaj pordoj por laŭeble profiti de la tagaj horoj mallongaj. La trotuarojn plenigis la superfluo el la vendejoj; montoj da legomoj, sakoj da faboj kaj greno, domaj varoj ĉiuspecaj blokis la mallarĝajn stratojn, tiel ke preterpasantoj devis marŝi laŭ la vojmezo, kaj la tuta kvartalo similis vastan bazaron.

‘Kio estas la skribaĵo?’ mi demandis Neronon, indikante la purpuran

volvaĵon, kiun li reprenis de Epafrodito antaŭ ol forsendi lin kun la ringoj.

Nerono ruĝiĝis, kaj ekparolis rapide, dum liaj vortoj karambolis pro lia konfuzo. ‘Dum mi babilis kun Akteo la alian vesperon... do, estis tiel, ŝi rakontis al mi pri la manuskriptoj, kiujn ŝi heredis de sia patro... mi volas diri, estis terure por ŝi vendi ilin. Do, tiam mi demandis ŝin pri la titoloj, kaj ŝi listigis ilin tuj. Ŝi eĉ deklamis poemon de Tibulo – ŝi diris, ke tiun ŝi aparte ŝatas. Do, mi... estas tiel... ni havis ĉi tiun volumon de Tibulo hejme, kaj mi... mi pensis...’

‘Vi pensis, ke ĝi plaĉos al ŝi? Mi certas, ke jes!’

‘Ĉu vere? Mi pensis, ke mi povus donaci ĝin al ŝi.’

‘Tio estas precize la ĝusta faro! Certe ŝi estos ege kontenta!’

Ni haltis ĉe la banejo, kie Nerono puŝis sin antaŭ min por pagi mian eniron krom la propra. Li paŝis kun memfido en la vestoŝanĝejojn, tiam hezitis kaj tuj repaŝis eksteren. ‘Apenaŭ eblas moviĝi tie interne. Ĉu la loko ĉiam estas tiel plenplena?’

Mi rigardis trans lian ŝultron al la amaso da viroj kaj knaboj en diversaj fazoj de senvestigado. ‘Pli-malpli kiel kutime, je ĉi tiu horo. Rigardu, jen tie libera spaco – ni kaptu ĝin tuj, antaŭ ol iu alia ĝin prenos.’

Mi hastis tra la ĉambro kaj sidiĝis sur la marmoran benkon kiu laŭis la murojn, por aserti mian rajton je la malplena fako sur la breto ĉe mia kapo. Nerono venis al mi necerte, evitante grupon de junuloj, kiuj laŭte ridis inter si dum ili surmetis siajn vestojn, kaj ŝerce puŝis la bruston unu de la alia laŭ maniero, kiu facile povus provoki kverelon. ‘Kio pri mia tuniko?’ li demandis subvoĉe,

eksidante apud mi. ‘Ĉu ĝi estos en ordo, se mi lasos ĝin ĉi tie?’

‘Prefere petu la prizorganton, ke li atentu pri ĝi. Oni ŝtelis de mi ĉi tie zonon antaŭ kelkaj monatoj.’

Je dek sep jaroj mi jam elkreskis la fazon, kiam oni sentas memkonscion ĉe la banejo, tamen mi iom hontis senvestiĝi antaŭ Nerono. Pri mia maldikeco ne kulpis Rupilio; unu el liaj pli bonaj ecoj estis tio, ke li ĉiam zorgis, ke la trupanoj estu bone nutrataj. Ne eblas prezenti gracion dancistinon aŭ konvinkan Parison kun videble elstarantaj ripoj. Sed ne gravis kiom da manĝaĵoj li donis al mi; mi neniam sukcesis atingi tiun diketan, rondan aspekton, kiu distingas la idojn de riĉuloj. Mi konsolis min per la penso, ke almenaŭ mi ne havas neforigeblajn cikatrojn ĉe la dorso, kiajn oni tiel ofte rimarkas en la ĉambroj de la banejo.

Ankaŭ Nerono certe ne estis belulo, demetinte siajn vestojn. Li estis relative alta, sed lia bone remburita figuro konsistis pli el graso ol el muskoloj, kaj liaj mamoj estis preskaŭ knabinece ŝvelaj. Lia haŭto havis palan, ne tre sanan aspekton. En la varmeta ĉambro li volonte akceptis mian proponon skrapi lian dorson. Tion mi tamen ne antaŭvidis, ke kiam mi finos ĉe li, li prenos la oleujeton el mia mano kaj diros, ‘Nun via vico.’

‘Mia sinjoro,’ mi diris en embaraso. ‘Ne necesas... mi ne atendis...’

‘Domicio,’ li korektis min. ‘Vi faras mian dorson, mi faras vian. Tion faras amikoj, ĉu ne?’

‘Jes, sed mia sinjoro... mi volas diri, Domicio. Mi estas sklavo. Pli ĝuste, sklavo mi estis ĝis ĉi tiu posttagmezo.’

‘Ĉu vi scias, kion diras mia instruisto? Li diras, ke ni ĉiuj estas sklavoj.’

‘Ĉu vere? Kion tio signifas?’

Nerono donis petolan rideton. ‘Mi ne scias, sed tion li diras.’

Ne sciante kiel respondi, mi ekkuŝis por ke li ŝmace ŝmiru min per oleo kaj, mallerte, forigu ĝin per la skrapilo. ‘Ĉu vi faras la dorson de Oto?’ mi demandis.

‘Ne, por tio li havas sklavon.’

Du amikoj, kiuj reciproke frotas la dorson per oleo: jen vidaĵo, kiun oni renkontas ĉiuposttagmeze en iu ajn banejo de Romo. Sed neniam mi imagis, ke iun tagon mi ricevos inviton kalkuli inter miaj amikoj la filon de la imperiestro.

Ni ricevis bonegan mendon por la Festivalo de Flora. Oni invitis nin prezenti en Teatro Marcelo postludon, kiu sekvos la ĉefan spektaklon. Temis pri la fama dancisto, Pariso, kaj disvastiĝis la informo, ke la pretoro respondeca pri la ludoj elverŝos nekredeblajn sumojn por certigi, ke la publiko ricevu la plej brilan spektaklon de post la triumfo de Pompeo. Laŭ la onidiroj, Pariso ricevos pagon de 11 000 sestercoj por nur unu prezento – tiom kiom nia tuta kompanio verŝajne gajnos dum plena sezono.

Krom Urso, neniu el la viroj en la kompanio estis freneza pri Pariso – ni ĉiuj preferis Piladon – sed la junulinoj ekstaze reagis, malkovrinte ke ni paŝos sur la sama scenejo kiel la brila dancisto mem. ‘Ĉu vi supozas, ke ni eble renkontos lin en la postscenejo?’ Rupilila diris. ‘Mi ne scias, kion mi farus

– mi pensas, ke mi svenus, se li parolus al mi!’

Primo tuj komencis aŭdigi longajn elspirojn, rigardante ĉielen kaj premante sian koron, por montri al ni kiel kondutos lia fratino, se ŝi renkontos Parison.

‘Ho, ĉesu!’ Rupilila ekkoleris. ‘Ni ĉiuj scias, kiu plaĉas al vi – tiu ŝtipo Pilado. Li ne dancas; la sola afero, kiun li kapablas fari, estas ondigi siajn brustomuskolojn.’

‘Jes, sed kiaj ondigoj!’ Primo reagis, kaj ekondigis sian bruston imite al sia idolo. ‘Mi rakontos al vi aferon, kiun mi aŭdis antaŭ kelkaj tagoj pri Pariso, kiam mi trinkis tason da vino kun unu el liaj sklavoĵoj. Vi scias pri lia haŭto, marmore glata, ĉu ne? Ĝi ne nature estas tia – li pasigas ĉiun posttagmezon ĉe la banejo, por ke oni senharigu liajn krurojn per vakso. Se vi ricevus la okazon kiun vi tiom deziras, por karesi

per via mano liajn femurojn supren-
malsupren, vi trovus ilin tute raspaj!'
Rupilila ekatakis lin, sed ridante li tenis
ŝin je distanco, ĝis mi persvadis lin ne
plu ŝin ĝeni.

Ni ne renkontis Parison en la
postscenejo. Li gastis ĉe la pretoro, kaj
je la okazoj kiam li venis al la teatro, li
estis tiom ĉirkaŭata de sklavo,
geadmirantoj kaj aliaj interesatoj, ke
tute ne eblis alproksimiĝi. Ni almenaŭ
rajtis spekti lin provludi. Li ludis en
Venuso kaj Adoniso, kaj mem prenis la
du ĉefajn rolojn. Maskojn li surhavis
dum la provoj, sed ne la kostumojn, kaj
verŝajne tio ebligis al ni eĉ pli klare
taksi lian artistan brilon. Kiam li estis
Venuso, liaj movoj estis tiel logaj, tiel
voluptaj, ke oni forgesis ke la dancisto
estas viro, kaj estis malfacile imagi ke
Adoniso dezirus fari ion ajn krom pasigi
la tutan tagon lulate en ŝiaj brakoj.
Tiam li eliris, kaj post mallonga danco
de arbaraj nimfoj, li reaperis kiel
Adoniso. Nun li estis alia homo: junulo,

ankoraŭ sufiĉe nematura por preferi la ĝojon de la ĉaso ol brakumon Venusan, kun mallertaj gestoj, kiuj iel sukcesis esti samtempe fuŝaj sed graciaj. Sed ne gravis kiun el la du roloj Pariso ludis, li ĉiam havis apartan kvaliton: kvaliton luman kaj freŝan, kvazaŭ kiel la diino mem li nur ĵus leviĝis, glimante, el la ondoj.

Kvankam mi mem estis subtenanto de lia rivalo Pilado, mi tamen devis emociiĝi pro la prezento de Pariso, dum ĉe mia flanko la junulinoj apenaŭ povis reteni sin. Ili eligis voluptajn ĝemojn kaj etajn kriojn, kaj mi rimarkis, ke eĉ Hebo iom peze spiras. Kiam la provo finiĝis, li restis sur la scenejo por diskuti teknikajn detalojn kun la ĉarpentistoj, dum la junulinoj apogis sin senforte kontraŭ siaj sidlokoj kun vakaj esprimoj de postorgasma kontento.

‘Ĉu pretaj?’ Rupilio demandis. ‘Nun venas nia vico.’

‘Li ne spektos, ĉu ne?’ diris Rupilila.
‘Diru, ke li ne spektos nin! Mi mortus,
se li spektus!’

‘Ne diru stultaĵojn!’ senpacience reagis Hebo. ‘Kial laŭ via supozo lin interesus spekti vin? Estas bonŝance, ke la pretoro ne vidas vin nun – li verŝajne decidus nuligi la mendon. Tuj post Pariso, ĉiuokaze neniu aŭskultos nin.’

Nerono atendis min en la ĉefa provludejo. Li portis simplan tunikon el lano kun mantelo, kaj estis tute sen juveloj krom larĝa brakringo. Ni tuj ekiris, kaj Epafrodito sekvis je diskreta distanco kun niaj bantukoj.

‘Tio estas tre aparta brakringo,’ mi komentis. ‘Ankaŭ la pasintan fojon vi portis ĝin.’

‘Rigardu.’ Li demetis ĝin por transdoni al mi. Scivole mi turnis ĝin inter miaj

fingeroj. Ĝi estis el klara kristalo kun ora tegaĵo. Premita inter la du tavoloj estis malregula makulita strio.

‘Serpentohaŭto,’ Nerono diris. ‘Ĝi alportas bonŝancon.’

‘Mi neniam vidis antaŭe tian aferon,’ mi diris, redonante ĝin.

‘Tiu serpento savis mian vivon.’

‘Nekredeble! Kiel?’

‘Mi estis eble naŭjara, kiam la afero okazis – mi gastis ĉe la vilao de mia onklino en la kamparo. Estis unu el tiuj tre varmaj someraj posttagmezoj, kaj post la tagmanĝo mi endormiĝis en la ĝardeno.’ Nerono kuntiris la brovojn, kaj silentis momenton. Tiam li daŭrigis, parolante malrapide kvazaŭ li nur pene formas la vortojn. ‘Kiel mi diris, mi profunde dormis kaj tiam... estis laŭta krakbruo. Mi vekigis kun ŝoko, kaj mi vidis kvin-ses virojn en la ĝardeno. Ili estis sufiĉe bone vestitaj, sed ili havis...

mi ne scias... ili havis minacan aspekton. Ili ĉiuj portis ponardon. Mi ne moviĝis – mi ne kuraĝis eĉ spiri, por ke ili ne rimarku min. Bonŝance mia divano estis en la ombro, ne tre videbla, sub la kolonaro. Kaj tiam unu el ili kriis kaj saltegis, kaj ili ĉiuj haste retiriĝis. Mi vidis ion, kio tordiĝis sur la vojeto antaŭ iliaj piedoj, kaj tiam giganta serpento ekstaris kaj siblis kontraŭ ili. Eble ĝi eĉ pikis unu el ili.’

‘La dioj sendis tiun serpenton por protekti vin! Ĝi estis aŭguro!’

‘Ĝuste tion diris mia patrino. Vi povas imagi, ke tiuj viroj tuj forfuĝis. Tio okazis, kiam Klaŭdio estis ankoraŭ la edzo de Mesalina, kaj ŝi diris, ke Mesalina ilin sendis por strangoli min.’

Mi reagis kun hororo. ‘Por strangoli vin!’

‘Ĝuste tiel,’ Nerono diris, kun nerva rido. ‘Mi frostotremas ĉiufoje, kiam mi pensas pri la afero. Nu, kelkajn tagojn

poste, mi trovis la haŭton de la serpento sur la herbo. Mi prenis ĝin por montri al mia patrino, kaj ŝi farigis ĉi tiun brakringon por teni ĝin.’

‘Eble estus pli saĝe ne porti ĝin ĉe Azelinan. Estus granda misŝanco, se oni ŝtelus ĝin.’

‘Mi promesis al ŝi, ke mi ĉiam surhavos ĝin,’ li diris, kaj aldonis kvazaŭ pardonpete, ‘Vi scias, kiaj estas la patrinoj.’

Fakte, mi ne sciis – kvankam mi ne intencis mencii tion al Nerono. Li tamen konstatis, ke li mispaŝis, ĉar li abrupte ĉesis paroli kaj ni marŝis ioman distancon en embarasata silento. Ĝin rompis Nerono. Tre delikate li demandis, ‘Ĉu vi havas ian ideon, de kie venis via familio?’

Mi hezitis. Mia unua penso estis regurdi tiun malnovan rakonton pri mia avo, la ĝermana tribestro. Sed ne estis kialo

por supozi, ke tio imponos Neronon. Aliflanke mi ne povis konvinki min malkaŝi al li mian veran historion: ke miaj unuaj posedantoj vivtenis sin per kreskigado de forlasitaj beboj, kiujn ili prenis de rubejoj kaj flegis per minimuma provizo da manĝaĵoj kaj atento ĝis ili estos sufiĉe grandaj por esti vendeblaj. Neniu el ni sciis ion ajn pri niaj gepatroj: ĉu ili estis tro malriĉaj por teni nin, aŭ tiel riĉegaj, ke ili ne volis malaltigi la valoron de sia propraĵo pro la neceso dividi ĝin inter amaso da heredontoj. Ni sciis nur, ke ili nin ne deziris kaj elĵetis por ke ni mortu pro malvarmo kaj malsato, aŭ kiel okazis ĉe ni, por ke prenu nin iu ajn preterpasanto, kiu hazarde povus utiligi forlasitan bebon.

Mi ne scias, kial miaj unuaj posedantoj decidis nomi min Prokulpio, sed mi estis pli bonŝanca ol kelkaj el la aliaj, kiuj devis pasigi la vivon kun nomoj kiaj 'Orelegoj' aŭ 'Kisinda'. Kaj efektive la tuta aranĝo ne estis tiel malbona, kiel

oni eventuale supozus. Ni loĝis ĉiuj kune ĉe iu loko en la kamparo, speco de bebobredejo, kie ni havis amason da geamikoj kaj malmultan laboron, ĉar neniu ĝenis sin pri nia trejnado. Nia ĉefa timo, tio kio ŝvebis minace antaŭ ĉiuj, estis la neevitebla momento, kiam oni konsideros nin maturaj por la vendo. Tiam tri-kvar plorantaj etuloj estos portataj al la bazaro kaj malaperos por ĉiam. Ankaŭ la postrestintoj ploros, parte pro perdo de la geamikoj, sed ankaŭ pro la konscio, ke la propra vico nehaltigeble alproksimiĝadas.

Sed mi ne volis klarigi al Nerono, ke oni trovis min sur rubejo, do mi rakontis al li nur la duan parton de la historio: ke Rupilio aĉetis min de drapisto, por kiu mi plenumis malgrandajn komisionojn kaj liveris la mendaĵojn al la klientoj.

‘Ĉu vi vizitadis lernejon?’ Nerono demandis.

‘Ĉu vi ŝercas! Rupilio neniam elspezus monon por sendi min al lernejo, kaj cetere ni tro ofte translokiĝas.’

‘Do, kiel vi lernis legi?’

‘Urso instruis min – vi vidis lin, li estas nia akompanisto, tiu ronda hometo kun la ruĝaj vangoj. Li montris al mi kiel legi la titolojn de la teatraĵoj aŭ la nomojn super la vendejoj. Post iom da tempo mi trovis, ke mi povas legi ilin sen lia helpo. Kaj plue, Rupilio foje taskigis min kopii rolojn...’

‘Kion?’

‘Tiel ni nomas niajn tekstojn. Oni ne elskribas la tutan teatraĵon, nur la pecojn, kiujn oni bezonas. Ne estis tiel malfacile. Mi ĉiam kompatas tiujn infanojn, kiujn mi vidas en la urbo, sidantajn en vicoj sub iu vendeja suntolaĵo, dum ilia instruisto staras antaŭe kaj minacas ilin per bastono.’

‘Vi pravas,’ diris Nerono. ‘Estis instruisto, kiun mi havis, kiam mi loĝis ĉe mia onklino – mi timegis lin. Li ne estis malica, sed terure severa. Mi memoras okazon, kiam li iris ekster la ĉambron, kaj ni komencis babili pri konkurso, kiun ni ĵus vidis, en kiu unu el la ĉaristoj estis tirata de siaj ĉevaloj. Nu, nia instruisto revenis subite, do ni ŝajnis, ke ni diskutis pri *Iliado* – vi konas tiun parton, kiam Aĥilo tiras la kadavron de Hektoro malantaŭ sia ĉaro. La klarigo ŝajnis lin kontentigi, do ni supozis, ke ni trompis lin. Kvankam repripensante la aferon nun, mi demandas min, ĉu li ne sciis tute bone, kio vere okazis.’

‘Tiu ne estas la sama instruisto, kiun vi havas nun, ĉu ne?’

‘Ne, tio okazis antaŭ ol mia patrino edziniĝis kun Klaŭdio. Mi vere ŝatas mian nunan instruiston. Mi neniam ricevis de li batojn – li diras, ke tion li ne aprobas. Kaj mi povas vere diskuti kun

li. Li petas mian opinion pri aferoj, kaj li volas, ke mi donu mian veran vidpunkton, anstataŭ nur ripeti tion, kion li mem diras. Mi lernis de li amason.’

Post la oferoj ĉe la Templo de Flora, la ceremonia parado direktiĝis tra la urbo al Teatro Marcelo, kie devis okazi la prezento. Gvidis la procesion la membroj de la korporacio de prostituitinoj, kiuj ĉiam havas ĉefan rolon dum la Floraj Ludoj. Kelkaj el ili disĵetis fazeolojn kaj lupenojn inter la homamasojn, kiuj staris laŭ la vojrandoj, dum aliaj tenis enmane lumojn. Lumojn laŭ ĉiu imagebla formo: oleolampojn, torĉojn, lanternojn, vaksajn meĉojn – ĉian, kian ili sukcesis trovi.

Nia kompanio venis post ili, en la tradiciaj multekoloraj manteloj de nia profesio. Ni kuris tien kaj reen tra la homamasoj kun kaprioloj kaj surmanaj

ekstaroj, kriante ŝercojn kaj frapante la pli senhumurajn membrojn de la publiko surkape per vezikoj plenblovitaj. La homoj ĵetis al ni nur duonan okulon: plene forlogis ilian atenton Pariso, en belega blanka masko kaj ĉielblua mantelo semita per steloj, kiu marŝis ĉirkaŭate de sia ĥoro de arbaraj nimfoj. La publiko puŝiĝis antaŭen dum ili alproksimiĝis; nur la ĉeesto de vico da soldatoj protektis Parison kontraŭ la troa entuziasmo de liaj admirantoj. La lasta ero en la procesio estis ĥoro kantanta himnojn adore al la diino, kies trono glitis meze inter ili kiel ŝipo sur la ondoj. Ŝi observis la febran homsvarmon el pentritaj okuloj, dum en siaj rigide etenditaj manoj ŝi tenis faskojn de florantaj branĉoj.

Estas ĉiam senbrida etoso ĉe la Floraj Ludoj. Flora estas la diino, kiu burĝonigas la fruktarbojn kaj plenigas la kampojn per printempaj floroj – sed ŝi burĝonigas ankaŭ plurajn aliajn aferojn, kaj ŝian festivalon oni ĝuas same nokte

kiel tage. La tutan urbon oni dekoras per floroj: ĉe ĉiuj pordoj kaj balkonoj, altaroj kaj statuoj pendas girlandoj, kaj ĉiuj portas siajn plej brilkolorajn vestojn. Laŭkutime eĉ la senatanoj devas formeti siajn pezajn togojn por la festo.

Ni eniris laŭvice la spektejon de la teatro, kaj staris inter la aliaj prezentistoj sur la granda duoncirklo de la orkestro ⁴ sub blanka, nuboplena ĉielo. El la altaj vicoj de marmoraj sidlokoj, miloj kaj miloj da vizaĝoj desupre rigardis nin. Ne ĉeestis ĉi-foje la imperiestro, sed tio ne malhelpis, ke iu spektanto aŭdigu la kutiman aklamon: 'Vivu la imperiestro!' Tiujn vortojn la homoj kaptis kaj ritme elkriis je ĉiuj flankoj. Iliaj voĉoj kreskis kaj ŝvelis, kaj kiam ili komencis forvelki, ekestis novaj akلامoj por anstataŭi la unuan: 'Vivu Nerono kaj Britaniko!', 'Vivu la Senato!', kaj finfine, kiam la publiko plene elĉerpis tiujn kriojn, 'Vivu

Volusio Saturnio!’ – la pretoro, kiu financis la ludojn.

Rupilio staris ĉe mia flanko. Li sin klinis al mi por krei super la bruo, ‘Ĉu tiu ne estas via amiko Domicio?’ Li gestis kape al la direkto de la tribunuo, kiu estis lokita iom pli alte, super flanka enirejo al la orkestro. Konata figuro en sange ruĝa mantelo tie apogis sin sur la ŝtona balustrado. Mi permesis al mi indiferentan rideton – mi ne intencis malkaŝi al Rupilio mian entuziasmegon, vidante mian amikon en la plej honora loko, kiu akceptas la aklamon de la publiko per majesta gesto. Dum la aplaŭdoj formortis, Rupilio aldonis, ‘Kaj tiu knabo ĉe lia flanko estas supozeble lia frato.’

Mi rigardis la knabon kun scivolo. Li estis jam alteta, sed li ankoraŭ portis la togon de infano kun kolora strio; laŭŝajne li aĝis plurajn jarojn malpli ol Nerono. Mi demandis min, kial la

imperiestro igis Neronon sia heredonto,
se li tamen havas propran filon.

Sed nun venis la momento, kiam la
prezentistoj devis retiriĝi, lasante nur la
muzikistojn kaj dancistojn, kiuj prenis
siajn poziciojn por la malferma
programero. La spektantaro kliniĝis
antaŭen kun atendo; eĉ de la
postscenejo mi sentis la etoson de
subpremata ekscito. Nur la plej allogajn
junulinojn oni invitas partopreni en la
Printempa Danco, kaj ĉar malmultaj inoj
pretas aperi antaŭ la publiko vestite nur
per travidebla ŝalo, necesas varbi ilin
ĉe tiaj fontoj kiaj bordeloj kaj teatraj
kompanioj. Neniu el la junulinoj de
Azelina estis elektita ĉi-jare krom
Akteo, kiu estis inter la muzikistoj.
Nerono estis ĝojplena pro ŝia elektiĝo,
kaj festis la okazon regalante ĉiujn
junulinojn kaj klientojn per kruĉo da
Aminia vino.

Ni ne multe vidis el la prezento de
Pariso. La junulinoj volis gvati el la

kulisoj dum li dancis, sed Hebo avertis, ke tiu kiu kulpos pri tiel neprofesia konduto ricevos belan vergadon post la prezento – sendube prudenta averto, se konsideri la ekstreman reagon de niaj junulinoj al la dancado de Pariso. Celerina ja renkontis lin hazarde tuj antaŭ lia ekpaŝo sur la scenejon, kaj dum la tuta posttagmezo ŝi vagadis kun ravita rideto, kiu furiozigis la aliajn junulinojn.

Ni donis al la spektantaro tempon por retranskribiĝi antaŭ ol ni komencis nian propran prezenton. Ni devis ludi sub ne tute idealaj kondiĉoj antaŭ la kurtenoj, dum oni malmuntis la ĉefan scenaĵon por liberigi la arenon prepare al la sekvonta spektaklo de sovaĝaj bestoj – sed ĉiuokaze, prezenti tuj post Pariso estis nepre senespera tasko. Multaj homoj eliris antaŭ ol ni komencis, kaj aŭdiĝis ĝenerala murmurado inter tiuj kiuj restis, interrompata de aliaj, kiuj kriego postulis, ke ili silentu.

Ni montris al ili parodion de la prezento de Pariso, kun Rupilio kiel Venuso en blonda peruko kaj mi mem kiel Adoniso, dum Primo kantis la akompanon. Sekundo estis trokreskinta Kupido. Lia sago devis maltrafi Adonison kaj pafiĝi en la kulisojn, de kie ni liberigis kolombon, kiu flugis al la ĉielo kun rompita sago fiksita al sia flanko. Post tio aperis la junulinoj por montri siajn lertojn kiel ĵonglistoj – estus katastrofe sekvi Parison per denova dancado – kontraŭ la bruo de spektantoj, kiuj regrimpis al siaj sidlokoj ĝustatempe por vidi la leonojn.

Preskaŭ okazis tumulto je la fino, ĉar la leonoj fiaskis. Aŭ pli precize ne la leonoj, sed la krimulo, kiu devis roli kun ili. Ĉar li estis siriano, iu havis la brilan ideon provizi lin per arko kaj kvin-ses sagoj, kiuj apenaŭ sufiĉus por savi lin, se li estus Apolono mem. Li tiom teruriĝis, kiam la unua leono per granda salto eniris la arenon, ke li svenis tuj, kaj la sola amuzo por la publiko venis

de la leonoj, dum ili kverelis super lia senreaga korpo.

Kiam mi diskutis la spektaklon poste kun Nerono, surprizis min la malkovro, ke li aparte malŝatas prezentojn de sovaĝaj bestoj. ‘Mi scias, ke temas nur pri krimuloj, sed mi abomenas vidi ilin fuĝi aŭ preskaŭ voli fosi sub la barilon, dum ĉiuj ridegas, kvazaŭ la tuta afero estus granda ŝerco. Mi preferus fermi la okulojn, sed mi estas devigata resti kaj doni la impreson, ke mi amuziĝas.’

‘Kaj mi tiom envias vin, kiam mi rigardas al la antaŭaj vicoj kaj vidas vin tie kun viaj purpuraj kusenoj. Kia malŝparo de bona sidloko!’

‘Ĉu vere? Mi ĉiam pensas same pri vi. Precipe dum la ĉarkonkursoj, kiam mi vidas la homojn kunpremitaj en la plej supra sekcio, kiuj ĉiuj aklamas kaj krias la kanton de sia teamo. Mi ĉiam

bedaŭras, ke mi ne povas transiri por stari inter ili.’

‘Ne tiel amuze kiel ŝajnas, kiam iu dika virino premas ĉe unu flanko kaj iu elspiras cepojn ĉe la alia.’

‘Tamen ne povas esti same ĝene kiel sidi sub la okulo de mia patrino.’

‘Eble ni devus interŝanĝi lokojn,’ mi sugestis frivole. ‘Vi surmetu miajn vestojn, kaj mi surmetos la viajn. Ĉu ŝi rimarkus, laŭ vi?’

‘Nu, eble ŝi pensus, ke mi perdis iom da pezo lastatempe. Kio se mi surmetus ordinaran tunikon kaj venus al la supra vico? Ĉu laŭ vi oni malkovrus min?’

Mi rigardis lin de la kapo ĝis la piedoj. La vestoj helpus, sed nenio maskus tiun esprimon viglan kaj memcertan: la esprimon de homo, kiu neniam devis labori, ĉiam havis sufiĉe por manĝi,

neniam vivis kun la timo esti vendata.
'Nu – kondiĉe ke vi ne malfermus viajn
lipojn, mi supozas ke vi povus esti
akceptebla.'

'Vi ankoraŭ ni oŭdis mian Trakan
prununcon,' li diris, per absurda Traka
elparolo, kaj ni eksplodis pro komuna
ridado.

5

Post la fino de la Floraj Ludoj komence
de majo, oni jam ekpensas pri la
baldaŭaj konkursoj honore al Marso.
Nerono memorigis min pri sia plano
akompani min al la stadiono por rigardi
la ĉarkonkursojn el la plej supraj vicoj.
'Ĉu vi certas, ke tio estas bona ideo?'
mi demandis. 'Kion diros via patrino?'

‘Mi havas dek kvin jarojn – mi estas plenkreska nun. Ŝi ne rajtas postuli de mi klarigon ĉiufoje kiam mi eliras.’

‘Ĉu vi sukcesos veni al la Cirko je la sunleviĝo? Ni provu kapti lokon proksime al la kurbo.’

‘Mi devos veni ĉe vin unue por ŝanĝi miajn vestojn. Estos tro granda risko ŝteliri el la palaco en sklava tuniko.’

Ĉiuj urbanoj, laŭŝajne, direktiĝis samloken, kiam ni rapidis tra la stratoj frue la postan matenon. Nerono aspektis tute ne malbone en sia verda tuniko. Perfidis lin tamen lia frizaĵo; neniel oni imagus, ke faris ĝin iu popola barbiro ĉe la banejo. Oni eble supozus, ke li estas la favorato de iu riĉulo, dorlotata sklavo, kiu ricevas apartan traktadon kaj kromajn manĝaĵojn. Li estis sufiĉe bone remburita por doni tiun impreson; nur liaj kruroj estis iom maldikaj.

Kiam ni alvenis ĉe la Cirko, la homamasoj jam fluegis internen, tamen ni haltis momenton sub unu el la arkaroj por aĉeti du bulkojn kaj papirusan kornon da lupenoj. Nerono estis ŝokita, kiam li komprenis, ke ni manĝos supre en la spektantejo. Oni ne rajtas, kompreneble, tamen ĉiuj faras. 'Ĉu ni prenu emblemojn de niaj teamoj?' li sugestis. Ni proksimiĝis al kolportisto, kiu vendis kvadratajn tukojn en la teamaj koloroj: bluaj, verdaj, blankaj kaj ruĝaj flirtis senzorge unu apud la alia ĉe ligna kadro.

Mi kapneis. 'Mi ne kuraĝus svingi ruĝan emblemon, krom se mi sidus inter grupo. Vi prenu, se vi volas. Vi estos sufiĉe sekura, se vi intencas krei por la Verduloj. Ĉe la plej supraj vicoj svarmas Verdaj fervoruloj.'

'Kien iras la subtenantoj de la Ruĝa teamo?'

‘Ĉu vi scias, kie estas la statuo de Kastoro ĉe la alia flanko? Tie estas nia ŝtuparo. Sed ne ĝenas min unufoje sidi kun la Verduloj. Nur ne petu min kunkanti ilian stultan kanton.’

Nerono iris al la kolportisto kaj aĉetis por si emblemon: ne malgrandan kvadrateton, sed longan strion, kiun li devos teni per ambaŭ manoj. ‘Jen,’ li diris, revenante al mi. ‘Mi prenis por vi amuleton. Rigardu, ĝi estas Viktoro. Mi kapablas admiri bonan ĉevalon, eĉ se li hazarde kuras por la malĝusta koloro.’

Mi akceptis ĝin iom dube. ‘Dankon – sed mi esperas, ke vi ne ofendiĝos, se mi tenos ĝin interne de mia tuniko. Mi ne volas inviti tumulton.’

La malgranda altaro ĉe la bazo de la ŝtuparo jam havis monteton da oferaĵoj, kiuj gamis de rompitaĵoj potopecoj kun surgratita nomo ĝis ellaboritaj tabuloj pentritaĵoj laŭ la koloroj de iu teamo. Nerono kaj mi aldonis ankaŭ la niajn,

kaj mi murmuris rapidan preĝon, ke la Ruĝuloj estu bonŝancaj, kiam oni ĵetos la lotojn.

La Cirko estis vidaĵo elstare impona. La kurejo etendiĝis en la malproksimecon sub la kruta deklivo de la spektantejo, kie leviĝis vico super vico da sidbenkoj. Ni jam tro malfruis por trovi lokojn apud la kurbo, do ni iom malproksimiĝis laŭ la longa flanko, ĝis punkto kiu frontis la ŝtonajn ovojn. Mi proponis iri al la plej supra vico, de kie oni bonege elrigardas super la tuta kurejo, sed Nerono ne volis – li estis miopa, kaj li timis, ke li ne povos vidi. Finfine ni sukcesis kapti sidlokojn en la dua vico de la tria nivelo, ne tro for de la tribunano ĉe la kontraŭa flanko de la kurejo.

Ni manĝis siajn bulkojn kaj dividis inter ni la lupenojn, dum la suno altiĝis, varmigante la spektantejon kaj briligante la linion de statuoj, altaroj kaj aliaj monumentoj, kiuj formas la spinon, la longan mallarĝan strion laŭ la centro

de la kurejo. En konkursotagoj oni enfermas la spinon malantaŭ malalta ligna barilo. La homoj komencis puŝi nun, dum la benkoj pleniĝis, kaj mi ekdisputis kun du laboristoj, kiuj provis premi nin el niaj lokoj. Nerono saĝe tenis sian buŝon fermita.

Elvenis la heroldoj, pompaj en siaj pezaj togoj, kaj levis siajn brakojn por ordoni silenton. Momente la bruo de la homamaso malpliiĝis, kiam la imperiestro kaj lia edzino montris sin sur la tribuno, tiam ĉiuj per freneza entuziasmo aplaŭdegis. Ĉiam aparte plaĉas al la homoj, kiam la imperiestro venas por ĝui kun ili la ludojn ĉe la Cirko aŭ la amfiteatro. Ili akklamis kaj kunfrapis la manojn kaj svingis la kolorojn de siaj teamoj, kvazaŭ la dio Aŭgusto mem akceptis inviton je vizito.

La imperiestro, impona figuro kun leona hararo blanka, estis akompanata de siaj du pli junaj gefiloj. Mi ĵetis rigardon al Nerono kun la intenco interŝanĝi

kunkulpan rideton, sed li ne rimarkis. Li havis maltrankvilan esprimon, kaj la verda skarpo pendis, forgesite, de lia mano. Malgraŭ liaj antaŭaj kuraĝaj asertoj pri sendependeco, mi suspektis, ke atendas lin malagrabra sceno, kiam li reiros hejmen.

Kiam la imperia familio prenas siajn lokojn, oni scias, ke ne daŭros longe ĝis alvenos la procesio. La homoj ĉirkaŭ mi streĉis la kolon por rigardi esperplene al la arko ĉe la ekstremo de la stadiono. 'Jen ili venas!' mi diris.

Unue aperis teamo de ĉevaloj, duone kaŝitaj sub longaj franĝoj el rubandoj kaj tintantaj amuletoj. Ili tiris ĉaron tegitan de oro, neniel similan al tiuj malpezaj lignaj, kiujn oni uzas en la konkursoj mem. En ĝi staris la pretoro, Jupitero veninta el la ĉielo, kun siaj purpur- kaj or-krustitaj roboj kaj la bastono enmane. Tuj malantaŭ li balanciĝis iomete pro la moviĝado de la ĉaro la bedaŭrinda sklavo, kiu havis la

taskon firmteni la oran plektaĵon super lia kapo.

‘Tiu estas Fabricio Vejento,’ Nerono flustris al mi. ‘Mi esperas, ke li ĝuas sian momenton de gloro. Li devis hipoteki unu el siaj bienoj por financi ĉi tiujn ludojn.’

La ĉaron sekvis svarmo da junuloj nobele vestitaj, iuj surĉevale, aliaj piede. ‘Ĉi tiu estas la punkto, kiam oni rimarkos mian neĉeeston,’ Nerono diris. La imperiestrino kliniĝis antaŭen por kontroli la grupon dum ĝi preteriris. ‘Mi kutime mansvingas al ŝi.’

La tuta procesio haltis antaŭ la imperiestro kaj lia familio, por ke ili spektu militan dancon prezentatan de pluraj junaj viroj kun kaskoj kaj plumoj. Ni estis ĉe la kontraŭa flanko de la stadiono, sed ni vidis la desegnojn kiujn kreis iliaj ruĝaj tunikoj dum ili plektiĝis internen-eksteren laŭ kvadrata figuro, kiu disiĝis, reformiĝis, kaj tiam denove

disiĝis, kun akompano de flutoj kaj
citroj.

La danco finiĝis, kaj la procesio post momenta hezito denove ekmoviĝis. Ni spektis kun kreskanta antaŭatendo, dum ĝi solene progresis laŭ la kontraŭa flanko de la kurejo, turniĝis ĉirkaŭ la malproksima kurbo kaj reaperis ĉe nia flanko: unue la pretoro en sia ĉaro kaj la sklavo kun siaj streĉitaj, tremetantaj brakoj, tiam la junularo de Romo (‘Jen Oto,’ diris Nerono, ‘ĉu vi vidas lin, sur tiu nigra ĉevalo?’), la muzikistoj kaj dancistoj, kaj kiel kulmino la ĉaristoj, kiuj grupe marŝis vestitaj laŭ la koloroj de siaj teamoj. Ĉiuj en nia sekcio de la spektantejo eksplodis per aklamoj kaj aplaŭdoj, entuziasmege svingante siajn emblemojn: verdajn ĉe la plej supra nivelo, ĉefe bluajn ĉe la marmoraj seĝoj tute malsupre, kaj verdajn, jen kaj jen dissemitajn de kelkaj ruĝaj aŭ blankaj, ĉe la lignaj sidlokoj en la mezo. Ĉiuj homoj kiuj ĉirkaŭis min kriis la nomojn de Dioklo kaj Krescenso, sed mi mem

streĉis miajn okulojn por serĉi Aziatikon. Lin oni ne konsideris la plej elstara ĉaristo de la Ruĝuloj, sed li havis amuzan karakteron – tion oni ne povas aserti pri la plejmulto da ĉarkuristoj. Mi jam vidis lin kelkfoje promeni tra la urbo, inter la kutima premo de fervoruloj kaj aliaj alkroĉiĝintoj. Li havis afablan rideton, kaj li ne estis tro supereca por mansvingi al tiuj preterpasantoj, kiuj vokis lian nomon kiam ili vidis lin. Luj kuristoj estas tiel pufiĝintaj pro la propra gloro, ke oni kredus, ke ili ludas la ĉefan rolon en *Aĥilo*.

Kaj laste, la dioj. Unue venis la granda statuo de la Venko kun siaj larĝe malfermitaj flugiloj. La homoj etendis al ŝi siajn manojn dum ŝi pasis, kaj mi flustris preĝon por la sukceso de mia teamo. Aŭdiĝis aklamoj en diversaj partoj de la stadiono dum la ceteraj gedioj pasis. Ankaŭ la simbolojn de Julio Cezaro kaj Aŭgusto oni portis en la procesio – mi ĉiam scivolas, kion

opinias la aliaj Olimpanoj pri tiuj malfruaj aliĝintoj al la dia rango. Mi aplaŭdis dum or-hara Apolono skuiĝis antaŭ mi sur sia ĉaro. Apolono, la dio de muziko kaj poezio: li estas tiu, kiu tenas aktorojn sub aparta patroneco. La pastroj kaj la du konsuloj donis taŭgan finon al la procesio, kiu pluiris laŭ la plena longo de la stadiono kaj tiam daŭrigis sian vojon laŭ la unua flanko ĝis ĝi reatingis la tribunon, kie oni sidigis la gediojn sur tronojn, por ke ili spektu la ludojn organizitajn je ilia honoro.

La unua konkurso estis por kvar-ĉevalaj ĉaroj, nur po unu ĉaro por ĉiu koloro. La heroldoj anoncis la nomojn de la ĉaristoj, krome tiun de la ĉefa ĉevalo en ĉiu teamo, kontraŭ akompana kriado en kiu miksiĝis aklamoj kaj insultoj. Poste laŭ la kutimo oni rulis antaŭ la publikon la vazegon el kiu oni ŝutas la kolorajn pilkojn, per kiuj decidiĝas la ekirpozicioj. Nerono kliniĝis antaŭen kaj

streĉis siajn okulojn. ‘Sed oni ne vidas,’
li plendis per ĉagrenata tono.

‘Jes, nu, tio estas la problemo, kiam oni
sidas ĉi tie.’

La blanka pilko elruliĝis kiel unua, kaj la
heroldo anoncis, ke la kuristo elektis la
sesan stalon. Tio estas la stalo kiun ili
ĉiam preferas, ĉar hazarde ĝi troviĝas
super la subgrunda ĉelo de la dio
Konso, kaj la ĉaristoj esperas, ke li
helpos ilin dum la konkurso. Sed estas
evidente, ke Konso havas siajn
favoratojn, kaj ke ne gravas el kiu stalo
ili ekkuras. La aliaj teamoj laŭvice
elektis siajn stalojn. La Verduloj estis la
lastaj, kaj la fervoruloj en mia
proksimeco konsolis sin per tiu
malnova diraĵo, ke tiu kiu malgajnas la
unuan lotumadon estos bonŝanca dum
la tuta cetera parto de la tago.

Mi ne scias la kialon, sed tiutempe oni
neniam sukcesis komenci
senprokraste. Ĉiuj fiksis siajn okulojn al

la staloj, sed oni tute ne havis ideon, kio okazas interne – videblis nur dek du paroj da firme riglitaj pordoj. Viro malantaŭ mi laŭte elspiris. ‘Se estus mi la imperiestro, mi ordonus malpli da atendado kaj pli da konkursoj.’

Alia homo ridis. ‘Se vi estus la imperiestro, estus konkursoj ĉiutage kaj nenio por manĝi.’

Sonis la trumpetoj, kaj ĉiuj okuloj turniĝis al Fabricio Vejento, kiu en sia grandioza robo staris en la prezida loĝio super la ekirpordoj. Mi ne scias, ĉu tiu momento inde kompensis la hipotekon je lia bieno, sed certe ne ekzistas homo en Romo, kiu ĝuas tiel absolutan atenton kiel la prezida pretoro signalonta la komencon de ĉiu konkurso. Kiam la blanka tuko flirtis malsupren el lia mano, aŭdiĝis la knaro de kvar paroj da rigliloj samtempe tirataj, la pordoj brue malfermiĝis, kaj la ĉevaloj saltis eksteren. La Ruĝa teamo, kun Aziatiko ĉe la bridoj, elpafiĝis kiel

ŝtono el katapulto, sekvata de la Blanka kaj la Blua. La Verduloj, pro fuŝa ekiro, estis en la kvara loko. Ili kurigis nur duarangan ĉariston; ili rezervis siajn stelulojn por la posttagmezo.

Se la Verduloj ekiris malbone, la publiko tute ne intencis akcepti, ke tio povus esti kulpo de la ĉaristo mem. Ĉiuj ĉirkaŭ mi komencis fajfi kaj protesti, ke la Ruĝa ĉaro forlasis sian trakon antaŭ ol atingi la linion. Tio fakte estis sensencaĵo, sed neniu pretoro pretus disputi kun plena stadiono da Verdaj fervoruloj. Mi estis tre malkontenta, kiam li donis la signalon por rekomenci la konkurson. Mia teamo ja estis en la unua loko, sed mi ne esperis pri sama sukceso la duan fojon.

Nu, oni turnis la ĉevalojn, restarigis la ĉarojn malantaŭ la pordojn, kaj denove donis la ekkursignalon. Kiel mi prave antaŭtimis, la ekkuro de la Ruĝuloj ĉi-foje ne estis tiel verva. La kvar teamoj elvenis pli-malpli kune, sed la Blua

preskaŭ tuj antaŭeniris, dum de la malsupraj sidlokoj iliaj subtenantoj ripetadis ritme, ‘Tusko! Tusko!’ Tio estis la nomo de ilia ĉefa ĉevalo, tiu plej proksima al la barilo. La Verduloj tuj reagis per la nomo de sia propra ĉevalo, kaj preskaŭ surdigis min ritma krio de ĉiuj en mia ĉirkaŭaĵo: ‘Po-li-dok-so! Po-li-dok-so!’ Nerono partoprenis kun entuziasmo.

La Blua ĉaristo estis la unua, kiu atingis la linion, kaj li tuj impetis al la interna flanko; de tie la vojo estas plej mallonga ĝis la tri konusoj, kiuj indikas la turnopunkton. La Blanka ĉaristo, tuj malantaŭe, jam rapide proksimiĝis. Evidente li esperis enpuŝiĝi antaŭ la Bluan teamon, por ĉirkaŭiri la angulon laŭeble apud la konusoj. Li ankoraŭ ne realigis tiun celon ĝis la du ĉaroj atingis la turnopunkton, kaj kiam ili reaperis ĉe nia flanko, la Blanka teamo jam restis malantaŭe pro la neceso fari pli larĝan kurbon. Sekvis ilin la Ruĝa ĉaro kaj laste la Verda.

Kiam la kvar ĉaroj tondre pasis antaŭ mi, evidentiĝis ke Aziatiko nun atingis la pli internan pozicion, antaŭ la Verda teamo, sed malantaŭ la aliaj du, kiuj ankoraŭ batalis por la unua loko. Tio ne maltrankviligis min; laŭ mi la du unuaj teamoj tro frue antaŭenpeliĝas. Ili certe ne povos daŭrigi laŭ tiu rapideco dum ankoraŭ ses rondiroj. Dum ili galopis ĉirkaŭ la malproksima angulo, oni forprenis la unuan ovon.

Aziatiko firme plutenis sian lokon apud la interna barilo, tuj malantaŭ la Blua teamo, dum la Blanka kaj Verda restis pli-malpli samnivelaj ĉe la ekstero. Ĉiuj ĉirkaŭis la konusojn kune, kaj dum ili revenis laŭ nia flanko la Verda ĉaristo svingiĝis tute eksteren, provante preterpasi la aliajn ĉe la longa flanko. Li ankoraŭ ne sukcesis fari tion fine de la dua rondiro, kio devigis lin fari tre larĝan kurbon ĉe la turnopunkto.

La Ruĝaj subtenantoj malsupre komencis fajfi, kiam la Blanka ĉaristo

ekvipis la Ruĝajn ĉevalojn – li volis enpuŝiĝi por kapti pli bonan pozicion apud la barilo. Ankaŭ mi partoprenis kun la aliaj Ruĝuloj, forgesante mian izolitan situacion inter amaso da Verduloj. Sed ili tute ne rimarkis min; ili kriegis insultojn kontraŭ sia propra ĉaristo, kiu ankoraŭ ne sukcesis liberiĝi de sia malavantaĝa pozicio ĉe la ekstera trako. Li konstante provis preterpasi dum oni kuregis laŭ la longaj flankoj, tiam postrestis kiam oni atingis la kurbojn.

La Blua ĉaro plutenis la unuan lokon ĝis la kvara rondiro, dum intertempe la Blankaj ĉevaloj videble laciĝis kaj komencis postresti. Mi aŭdis la homojn sub mi krei, ‘Aziatiko! Aziatiko!’ Nun venis la ĝusta momento; se li volas atingi la gajnantan lokon, necesos fari tion dum la venontaj rondiroj. Restis nur du ovoĵ, kiam li kaptis sian ŝancon. Apenaŭ ĉirkaŭirinte la angulon, li impetis for de la barilo, tiel ke lia akso preskaŭ skrapis la radon de la Blanka

ĉaro. Li fulmis laŭ la longo de la kurejo, dum la Ruĝaj fervoruloj vokis ritme: 'Viktoro! Viktoro!' Li ankoraŭ ne sukcesis preterpasi antaŭ ol atingi la malproksiman ekstremon, tiel ke li devis fari pli larĝan kurbon ĉe la angulo. Sed la Blujaj ĉevaloj estis jam elĉerpitaj pro sia jama fortostreĉo, kaj dum la du ĉaroj flugis laŭ nia flanko kun ambaŭ ĉaristoj kiuj freneze vipadis siajn teamojn, mi vidis, ke la Blua ĉaristo ne sukcesos peli siajn ĉevalojn al nova antaŭensalto. Mi partoprenis la aklamon dum mia teamo ekkaptis la gajnantan pozicion, kaj eĉ kelkaj Verdaj subtenantoj aliĝis al la aplaŭdoj. Ne plu estis espero por ilia propra koloro en ĉi tiu konkurso, kaj se iu alia devos venki, tiu laŭ ili almenaŭ ne estu la Blua teamo.

Dum la fina rondiro, la Blanka ĉaristo vipis sian teamon al nova strebo. Li premis tiel proksime al la Blua ĉaro dum ili ĉirkaŭiris la lastan angulon, ke lia rivalo estis puŝata kontraŭ la bazo

de la konusoj, kaj pro la forta bato lia rado malfiksiĝis. La ĉaro, ankoraŭ tirata je plena impeto de la ĉevaloj, skuiĝis al unu flanko, dum la kuristo tranĉis la bridojn kaj saltis eksteren. Li estus mortigita se li falus rekte antaŭ la Blankan teamon, sed la Blanka ĉaristo estis preta por la frakaso, kaj vidinte ke lia taktiko sukcesos, tuj formoviĝis.

Sed, strange, la Blua ĉaro ne perdis ekvilibron; la perdo de unu rado simple klinis ĝin al la alia flanko kaj ĝi plu rapidis ĉirkaŭ la angulo kaj laŭlonge de la kurejo en ekvilibro sur unu sola rado. Ĝi estis konsiderinde malpli peza sen la ĉaristo, kaj mi momente eĉ timis, ke ĝi preterpasos mian teamon tuj antaŭ la fina linio. Sed estis en ordo; la ĉaro rekliniĝis laŭ la mala direkto kaj treniĝis ĝis halto, ĝuste kiam la Ruĝa ĉaro transiris la linion, dum la Blanka sekvis tuj poste.

Mi senstreĉiĝis en mia sidloko, tute kontenta pro la sukceso de mia teamo

en la unua konkurso de la tago, kaj turnis min ridetante al Nerono. Sed konsternis min la konstato, ke li implikiĝis en disputo kun paro da junuloj, kiuj sidis tuj malantaŭ ni; kiel ĉiuj fervoruloj, ili estis konvinkitaj, ke ili komprenas la arton de ĉaristo pli bone ol la ĉaristo mem. ‘Domicio,’ mi diris al Nerono, provante kapti lian atenton.

‘Domicio!’ unu el ili ripetis, kaj rigardis nin suspekto. ‘Do, cetere, kiu vi estas?’

Bonŝance distris lin hurao de la homamaso. Aziatiko ĵus direktis sian ĉaron al la tribuno por ricevi la palmofolion de la imperiestro. Post tio sekvis lia venko-rondiĝo, akompanata de ĝojkrioj de la sekcio, kie sidis la plejmulto el la Ruĝaj fervoruloj, kaj retenemaj aplaŭdoj de ĉiuj aliaj.

La posta konkurso estis por du-ĉevalaj ĉaroj – gajnis la Bluuloj, laŭ mia memoro – kaj tiam sekvis alia por kvar-ĉevalaj ĉaroj, kun po du ĉaroj por ĉiu

koloro. Bonŝance la Verduloj finfine povis registri sian unuan venkon de la tago, alie estus povinta okazi malagrabla sceno. Estis ankaŭ unu distra konkuro dum la mateno, en kiu la ĉarojn tiris teamoj de hundoj anstataŭ ĉevaloj. Komence ĝi ŝajnis sufiĉe amuza, tamen la spektantoj emis perdi intereson ĝis kompletiĝis ĉiuj sep rondiroj.

Kiam finiĝis la lasta konkurso de la mateno, Nerono turnis sin al mi. ‘Bone, ĉu ni iru kapti ion por manĝi?’

‘Ni povos, se ne ĝenos vin perdi vian lokon,’ mi respondis. Nerono estis malagrabla surprizita, kiam li komprenis, ke ni devos resti fiksitaj al niaj lokoj dum la tuta tagmeza paŭzo, kaj volonte akceptis mian sugeston, ke li iru malsupren por aĉeti por ni ian manĝaĵon. Mi estus irinta mem, sed estus tro riske lasi lin sola kun lia eleganta frizaĵo kaj lia eleganta latina inter la krudaj uloj, kiuj ĉirkaŭis nin.

‘Kiun teamon via patro subtenas?’ mi demandis Neronon, kiam li revenis kun du sufiĉe oleaj viandobuloj volvitaj en strio de fuŝskribita papiruso.

‘La Blankan.’

‘Ĉu ne la Bluan?’

‘Ne, ĉiuj aliaj en lia familio kriis por la Bluuloj, do mi supozas, ke li elektis la Blankulojn nur por ĝeni ilin. Imagu, antaŭ ol...’ Nerono rigardis ĉirkaŭe por certiĝi, ke niaj najbaroj ne aŭskultas, ‘...antaŭ ol li atingis sian nunan pozicion, la familio provis forpuŝi lin. Ili ne permesis al li kandidatiĝi por publikaj oficoj – efektive, la afero estas sufiĉe komprenebla, se oni konsideras la manieron laŭ kiu li tikas kaj salivumas, kiam ajn li nur iomete agitiĝas.’

‘Ĉu vi memoras vian veran patron?’ mi demandis.

‘Ne vere – mi havis nur tri jarojn. Estis unu okazo, kiam li prenis min por rigardi oferadon. Mi memoras grandan nigran virbovon kun rubandoj ĉe la kornoj, kaj sango kiu elŝpruciĝis ĉie. Mi timis – kompreneble, mi estis tre malgranda – kaj mi ekploris. Kaj tiam li diris al mi, ke mi ne timu, kaj li levis min sur siajn ŝultrojn, por ke mi vidu pli bone. Li havis ruĝan barbon kaj lentugojn ĉe la brakoj.’

‘Nun mi komprenas, de kie vi ricevis la lentugojn.’

‘Ĉi tiuj viandobuloj estas abomenaj,’ Nerono diris.

‘Ĉu vi ne finmanĝos tion?’ Nerono enmanigis al mi la restaĵojn de la viandobulo. ‘Kiel okazis, ke vi decidis subteni la Verdulojn?’ mi demandis.

‘Nu, mi ne scias – nur por ĝeni mian patrinon, verŝajne.’ Li permesis al si malican rideton. ‘Ne, mi diros al vi la

veran kialon. Estis kiam oni forsendis ŝin, kaj mi devis loĝi ĉe mia onklino. La personaro tie konstante paroladis pri la Verduloj, precipe pri Hierakso. Li estis mia granda heroo. Ĉu vi scias, ke li gajnis tridek kvar palmojn antaŭ ol li estis mortigita?’

‘Tio ne estas tiomegaj. Aziatiko jam gajnis kvindek ok.’

‘Jes, sed Hierakso havis nur dek sep jarojn, kiam okazis la granda frakaso.’

Dum ni parolis, ĉiam pli da homoj enpuŝiĝis sur la benkojn. Ĝis finiĝis la paŭzo, ni estis pli intime kunpremitaj ol anĉovoj en kruĉo da fiŝsaŭco. Mi iris malsupren en iu momento por pisi, kaj devis lukti por reatingi mian lokon.

La posttagmeza programo estas ĉiam pli bona ol la matena. Kiom la homoj aplaŭdegis, kiam aperis Dioklo! Li kondukis dek-ĉevalan ĉaron por la Verda teamo, dum por la Ruĝa konkuris

Rutubo. Rutubo iam estis kuristo por la Bluuloj, sed li gajnis tiel grandiozajn monpremiojn, ke li sukcesis aĉeti sian propran liberecon kontraŭ apenaŭ imagebla sumo. Poste li transiris al la Ruĝuloj, kiuj laŭdire pagis al li 15 000 sestercojn por ĉiu konkurso. Temis pri mono forĵetita, laŭ mi. Li gajnis nur unu el la du konkuroj en kiuj li partoprenis, kontraste kun Aziatiko, kiu venkis dufoje, kvankam li devis eĉ kuri kontraŭ la granda espero de la Bluuloj, Salsulo.

Mia propra teamo venkis tiutage en tri konkursoj, tiel ke ĝi restis malantaŭ la Verduloj, kio estis jam antaŭvidebla, tamen samnivela kun la Bluuloj. Nerono kaj mi ekstaris, pretaj por aliĝi al la rivero da homoj, kiu fluis al la direkto de la plej proksima ŝtuparo. Mi estis tute kontenta pro la sukceso de mia teamo: la Ruĝuloj malofte egaliĝas al la multe pli riĉaj Bluuloj kaj Verduloj. ‘Ĉu ni iru malsekigi al ni la gorĝon?’ mi proponis.

‘Mi preferus reiri ĉe vin por ŝanĝi mian veston. Se mi kuros sufiĉe rapide hejmen, eble mia patrino ne rimarkos, ke mi forestis.’

6

Ni ne havis apartajn planojn por la postaj monatoj, sed tute ne mankis laboro: oni mendis nin por ludi ĉe pluraj privataj domoj, kiuj foje apartenis al ege riĉaj kaj influhavaj homoj. En tiuj okazoj oni plej ofte postulis, ke ni aktoroj restu en nia ĝusta loko, kaj forsendis nin post la prezento kun nenio pli ol nia pago kaj kelkaj korboj da manĝaĵoj. Ni tamen ludis ĉe unu festo, kie la gastiganto, malproksima parenco de la imperiestro, ne estis tro fieraj por inviti Rupilion kuŝi apud li sur la ĉefa divano, dum ni

ceteraj rajtis serĉi lokojn malpli eminentajn. Ankaŭ Nerono estis tie, kliniĝanta flanke de sengrasa knabo kun timema esprimo, kiu dum nia tuta prezento maĉadis siajn ungojn. Por ne embarasi Neronon per impertinenta alparolado, mi iris al la apuda divano, kie mi tamen estis devigata eviti la nedeziratan atenton de diketa maljunulo kun artritaj manoj. Nerono intertempe ridaĉis; evidente amuzis lin mia malkomforta situacio.

Je la posta fojo, kiam mi eliris kun Nerono, mi demandis, ‘Tiu estis via frato, ĉu ne, kiu sidis sur via divano la pasintan vesperon? Mi vidis lin dum la Festivalo de Flora.’

‘Jes, tiu estis mia frato, aŭ pli ĝuste, mia adoptita frato, Britaniko.’

‘Ĉu la filo de Cezaro? Ĉu estos li la venonta imperiestro?’

Nerono levis la ŝultrojn. ‘Ne estas tre klare. Li estas pli juna ol mi. Ne plaĉas al mi, ke oni insiste metadas nin kune – li neniam ĉesas moviĝeti kaj tordiĝeti.’ Li hezitis. ‘Kaj estas io plia. Kelkfoje li falas en konvulsiojn. Mi ne vidas, kiel epilepsiulo povus esti imperiestro.’

‘Mi ne scias. Ĉu tia ne estis ankaŭ Julio Cezaro?’

‘Jes, supozeble,’ Nerono diris per tono nekonvinkita. ‘Ĉu realiĝis tiu mendo, kiun Rupilio esperis ricevi en Prenesto?’

‘Jes, mi volis paroli al vi pri tio. Hodiaŭ estas nia lasta eblo renkontiĝi ĝis post la somero.’

‘Mi volis diri precize la samon al vi. Ankaŭ mi ne povos iri ĉe Azelinan dum la venontaj monatoj.’

‘Kial ne? Vi tamen povos pluiri sen mi.’ Trafis min subita penso, kaj mi rigardis

Neronon maltrankvile. ‘Ne diru, ke via patrino malkovris la aferon.’

Li ridis. ‘Ne, mi dankas la diojn, tiel katastrofa la situacio ne estas. Estas nur tiel, ke la imperiestro estos en Antio. Dum li forestos, mi devos juĝi la procesojn, kiuj prezentiĝos ĉe la tribunalo.’

‘Ĉu vere vi mem? Mi volas diri... sed... nu, ĉu vi ne estas tro juna? Kaj cetere, tio ne malhelpos vin eliri vespere, ĉu ne?’

‘Laŭ Seneko, jes.’ Nerono afektis pompan voĉon, kaj parolante per perfekta latina, li imitis por mi sian instruiston: ‘Nerono, vi eble devos kondamni akuzitojn al ekzilo, aŭ konfiski iliajn bienojn. Kiel kun pura konscienco vi povos atingi kompetentan decidon, se vi estos tro laca por koncentriĝi?’

‘Ĉu eble vi devos kondamni homojn al mortpuno?’ mi demandis, tre imponite. Mi ofte forgesis, kian potencon ĝuas ĉi tiu junulo, al kiu nekredeble ankoraŭ mankis pluraj monatoj ĝis lia dekseca datreveno.

‘Je Jupitero, mi esperas, ke ne! Terurus min la penso, ke eble okazis ia eraro, tiel ke la homo tamen povus esti senkulpa.’

‘Do, en via pozicio, ĉu vi ne rajtus decidi mem, kiun punon aljuĝi? Eble vi povus nur forsendi ilin en ekzilon.’

‘Jes, sed ankaŭ tio ne estus justa. Estus evito de miaj respondecoj, se mi ne aljuĝus mortkondamnon, nur ĉar tio ne plaĉus al mi. Se ĉiuj juĝistoj agus tiel, imagu kio okazus!’

Ni revenis al Romo ĝustatempe por la Romaj Ludoj en septembro. La somera

varmego jam iom malpliigis, kaj la vesperoj komencis mallongiĝi. Primo kaj mi provis novan rutinon per la lumo de oleolampo, kiam aperis Nerono, akompanate de la sklavo Doriforo kaj junulo al mi nekonata. Mi estis ĝojplena pro la reapero de mia amiko. ‘Domicio! Mi esperis, ke vi venos!’

Nerono mienis pardonpete. ‘Mi nur ĵus aŭdis, ke vi revenis. Kial vi ne sendis mesaĝon?’

‘Nu, ĉu vi proponas, ke mi marŝu al la palaca pordego por informi la gvardiistojn, ke mi volas paroli kun Domicio?’

‘Ne, tio certe ne estus saĝa afero. Do, kiel vi fartas, Prokulpio – kaj ankaŭ vi, Primo? Mi ne atendis, ke vi ankoraŭ laboros ĉi-hore. Mi esperis, ke vi estos liberaj por vespera amuzo.’

Primo respondis kun embaraso. ‘Bonvolu pardoni min, mia sinjoro. La

fakto estas, ke mi havas amatinon ĉi tie en la kompanio. Se ŝi poste aŭdus, kien mi iris, ŝi mortigus min per riproĉoj.’

‘Kaj kion pri vi, Prokulpio?’ Nerono turnis sin al mi kun rideto. ‘Mi esperas, ke almenaŭ vi ne trovis amatinon?’

‘Ĉu vi supozas, ke mi povas permesi al mi amatinon – konstante aĉeti donacetojn? Preferinde resti ĉe Azelina.’

‘Mi estas kontenta revidi vin,’ diris Nerono kaj prenis mian brakon dum ni iris eksteren al la strato. ‘Mi invitis anstataŭe Senecion, sed laŭ mia impresado ĉe Azelinan li ne iras tre volonte. Li ĉiam viŝas la divanon antaŭ ol ekkuŝi.’

‘Ankaŭ vi viŝus la divanon, Nerono, se vi estus vidinta, kion mi trovis tie je mia unua vizito,’ respondis lia kunulo. ‘Mi ne scias, kial vi ne elektis la ejon de

Dionizia – ĝi estas multe pli pura.’
Senecio estis alta kaj malgrasa kun
pinta vizaĝo, kiun nur parte moligis lia
nigra hararo kaj maldensa barbeto.

‘Jes, sed se mi irus ĉe Dionizian, mi ne
estus renkontinta Akteon, ĉu ne?
Cetere, Prokulpio, kio estas tiu novaĵo
pri la amatino de Primo? Vi neniam eĉ
menciis ŝin ĝis nun.’

‘Tusimple ĉar mi ne sciis pri ŝi. Primo
diris nenion al iu ajn, ĝis ili neniel povis
plukaŝi la aferon. Estas Kvartila. Rupilio
estis furioza, kiam li malkovris la aferon
– vi scias, ke li neniam permesas al iu
ajn eĉ tuŝeti la dancistinojn.’

‘Kvartila. Kiu estas ŝi?’

‘Ŝi estas tiu kun la nigra hararo. Ŝi ne
multe parolas – tamen, ŝi plaĉas al
Primo.’

‘Kaj do, kio okazos? Ĉu Rupilio
liberigos ŝin?’

‘Ne, komence li eĉ minacis vendi ŝin, aŭ elmeti la bebon, sed Hebo sukcesis trankviligi lin. Supozeble li finfine decidis liberigi Kvartilan – certe li ne volas, ke lia unua genepo naskiĝu sklavo. Sed li prokrastas ĝis la lasta ebla minuto.’

‘Nu, rakontu al mi pri via somero. Kion vi ludis ĉe la Festivalo de Fortuno? Ĉu vi denove prezentis *La heredantinon*?’ Kaj ne atentante Senecion, kiu aspektis iom ĝenata laŭ mia impresoj, Nerono ekdemandis min pri ĉiu detalo de nia ĵusa turneo.

‘Mi devas rakonti al vi, kio okazis en Prenesto,’ mi diris. ‘Ni faris postludon, sekvante Piladon...’

‘Pilado? Ĉu ankaŭ li ĉeestis?’

‘Jes, li ludis Agamemnonon, kiu revenas hejmen de Trojo. Mi ŝatas lin pli ol Parison – lia dancado estas multe pli ekscita. Sed ĉe la teatro svarmis

favorantoj de Pariso, kaj ili estis en danĝera humoro – ili volis vidi Parison, ne Piladon. Ili restis silentaj, pli-malpli, ĝis ili vidis Agamemnonon murdita de la edzino, sed tiam, tuj kiam la intrigo malrapidiĝis, estis tuta grupo da ili kiuj ekstaris kaj ripetadis *Ni volas Parison! Ni volas Parison!*

‘La aliaj spektantoj kriis kontraŭ ili, ke ili silentu kaj lasu al la ceteraj ĝui la prezenton, tiam kelkaj homoj komencis grimpi trans la sidlokoj por bategi ilin. Ili tute ne rajtis detrui la prezenton por ĉiuj aliaj, kaj cetero Pariso povus ludi ĉe Prenesto se li volus – la fakto estas, ke li ricevis pli bonan ofertan aliloke. Ĉiuj homoj, kiuj sidis apud la zono danĝera, ekstaris kaj komencis kunmeti siajn kusenojn kaj aliajn posedaĵojn por formoviĝi – kaj tiam ni aŭdis trumpeton de la strato ekstere. Ŝajne la teatra estraro jam antaŭvidis, ke povus okazi ia interbatado, do ili aranĝis, ke taĉmento da soldatoj staru preta apud la teatro. Vi ne imagas, kiel sonis tiu

trumpeto: ĝi estis terura, kiel elefanto, kiam ĉasistoj minacas ĝin ĉe la Cirko. La spektantaro ŝokiĝis. Tiam Pilado gestetis unufingre, la muzikistoj ekludis, kaj kiam la soldatoj marŝis internen, ili trovis la homojn rigardantaj la spektaklon, silentaj kiel musoj. Ne estis bona prezento, tamen – perdiĝis ĉia vervo.’

‘Ĉu vi tamen prezentis vian postludon? Ne diru, ke ankoraŭ eblis montri ĝin, post tia konfuzo!’

‘Ni savis la okazon. Post la ekscito kaj la interbatado kaj la soldatoj, komika skeĉo estis ĝuste tio, kion la spektantaro bezonis.’

‘Mi bedaŭras, ke mi maltrafis tion,’ diris Nerono. ‘Kiom mi ŝatus labori en la teatro. Devas esti mirige: okupiĝi pri teatraĵoj, ĝui la aplaŭdojn...’

Mi ridis. ‘Jen vi, la filo de la imperiestro, kiu informas min, ke vi volus labori en

la teatro! Mi certas, ke ĉiu ajn aktoro estus tre kontenta interŝanĝi sian lokon kun vi.’

‘Ili nur provu! Ĉirkaŭus ilin homoj la tutan tempon por insistadi kion fari, kiel kondukti, al kiu edziĝi; tiam ili devus ĝentilumi al ambasadistoj, pacienci tra tiuj agoniaz procesoj... Ĉu vi scias, kiel mi pasigis la lastan duonmonaton? Mi fosadis en la arĥivejo por legi antikvajn polvajn papirusojn, kiujn neniu malvolvis de post la Civitana Milito – kaj ne temis pri malnovaj teatraĵoj, bedaŭrinde.’

Senecio ĝemis. ‘Ho ne – ne denove tiuj imposto-registroj!’

‘Ĉu imposto-registroj?’ mi ripetis. ‘Kial, kion vi faris?’

‘Nu, nenion apartan. Estis nur tiel, ke iu provinca delegitaro alvenis kun la peto, ke mi konvinku la imperiestron malaltigi iliajn impostojn. La homoj ĉiam kredas,

ke se oni estas filo de la imperiestro, necesas diri nur du vortojn por ricevi ĉion, kion oni deziras. Kaj, cetere, ne estas la imperiestro, kiu decidas pri tiaj aferoj, sed la Senato. Oni ne povas prezentiĝi antaŭ la Senato kun duonbakita propono.'

'Sed vi ne volas diri, ke vi devis fari paroladon antaŭ la Senato?' Mi provis imagi mian amikon, dum li staras tie en sia togo, dekkvinjara knabo, antaŭ vicoj da mezaĝaj viroj kiuj respektplene aŭskultas. 'Kiel vi sukcesis? Ĉu estis en ordo?'

'Bonŝance jes, post kiam mi dediĉis al la afero tiom da atento! Nu, kompreneble kontraŭstaris Trazeo Peto, ĝuste kiel li ĉiam faras. Sed mi estis preta. Finfine, mi ja pensadis nur pri tio dum la antaŭaj dek tagoj.'

'Kaj paroladis nur pri tio,' aldonis Senecio.

Nerono per teatra gesto frapis sian frunton. ‘Mi promesis al Senecio, ke mi ne mencios impostojn ĉi-vespere.’

‘Cetere, vi ankoraŭ ne rakontis al mi, kio okazis en la tribunalo,’ mi diris.

‘Ne estis tro malbone. La unuaj tagoj estis la plej malfacilaj – mi vere timis, kiam mi eniris, kaj ĉiuj ekstaris pro mi. Cezaro diris antaŭe, ke oni donos al mi nur rutinajn juĝaferojn; li nur ne antaŭvidis, ke ĉiuj plej famaj advokatoj kverelos por la privilegio oratori antaŭ la filo de la imperiestro.’

‘Ĉu vi devis kondamni iun al morto?’ mi demandis.

‘Ne multajn, mi dankas la diojn, kaj kiam mi faris, ĉiam temis pri klara situacio. Estis iu homo, kiu prirabis iun kaj mortigis lin, dum li iris hejmen post festo. Mi ordonis, ke tiu estu krucumita; kaj krome estis alia homo, kiu trapikis iun dum kverelo en vinbutiko, do mi

sendis lin por trejniĝi kiel gladiatoro. Mi estis tentata fari unu el tiuj tipaj ŝercoj de lernejestro – vi scias: *Ĉar tiom plaĉas al vi batali...* aŭ simile, sed finfine ne ŝajnis al mi ĝuste ŝerci pri tia afero, do mi diris nenion.’

‘Vi povas imagi, kiom Nerono ĝojis, kiam revenis la imperiestro!’ Senecio aldonis.

‘Certe jes! La homoj ĉiam estas tiel entuziasmaj ricevi publikan oficon, sed mi tute ne komprenas kial. Laŭ mi la afero estas nur tre teda kaj postulas amason da laboro. Vi ne scias, kiom vi estas bonŝanca, Prokulpio, ke vi rajtas vojaĝi ĉien, tute sen respondecoj.’

‘Ankaŭ tio postulas amason da laboro,’ mi atentigis, ‘kaj vi scias, kiom la homoj malestimas aktorojn. Kaj se temas pri procesoj ĉe la tribunalo, oni eĉ ne permesus al ni tie prezenti nian kazon. Sed estas vere, ke mi ne elektus alian profesion.’

Tuj kiam ni alvenis ĉe Azelina, Akteo ĵetis sin en la brakojn de Nerono kaj ili komencis brakumi unu la alian kiel Uliso kaj Penelopo post dudekjara disiĝo. Tiam ili envolvis sin en mantelo sur la divano kaj flustris kaj interkisiĝis dum la tuta vespermanĝo. Mi estis tre ĝenata, kiam Senecio vokis Eŭĥarison. Tiumomente mi konstatis, ke dum mia forresto li anstataŭis min ne nur ĉe Nerono. Mi devis kontentiĝi per Taiso, mokema etulino kun krispigita nigra hararo. Ŝi verve dancis, tamen ŝi ne estis la junulino, kiun mi volis elekti por la vespero.

Okazis kantado post la vespermanĝo. Furoris unu el la kantoj de Primo el *La heredantino*, kaj la junulinoj persvadis min aŭdigi ĝin al ili, malgraŭ miaj protestoj, ke ili atendu la venontan viziton de Primo. Poste ni petis kanti ankaŭ Neronon, sed li preferis deklami poemon, klariginte ke li verkis ĝin mem.

Ĝi estis malfacila peco, kies senco ne estis tuj kaptebla. Ĉiuj estis tre imponataj, kaj ni aplaŭdis je la fino entuziasme.

Taiso kaj mi retiriĝis al privata ĉambreto, kaj kiam ni revenis post ioma tempo en la ĉefan salonon, surprizis min trovi Neronon kaj Akteon, kiuj ankoraŭ flustradis inter si sur la divano – ŝajnis, ke ili tute ne formoviĝis de tie. Ili diskutadis per serioza tono, kaj mi havis la senton, ke ni revenis je malĝusta momento. Sed ne plu eblis reeliri, do por kaŝi mian konfuzon mi petis vinon per laŭta krio dum mi ekkuŝis apud Taiso sur la proksima divano.

‘Jen vi finfine, Prokulpio!’ Nerono salutis min. ‘Ni ekdemandis nin, ĉu tiel longe vi kapablas.’

‘Ĉe la banejo oni nomas min Priapo,’ mi ŝercis.

‘Priapo estas dio, kiu mi ne volus esti,’
diris Nerono. ‘Estus iom maloportune,
ĉu ne, iri ĉien kun tiu giganta rigida
peniso, kiu dancetus fronte la tutan
tempon.’ Li provis eligi senĝenan ridon,
sed la rezulto similis pli al tuso. Akteo
eĉ ne provis kaŝi siajn sentojn. Ŝi tenis
la kapon mallevita, kaj tordis siajn
manojn tra la sofokovrilo.

‘Kio estas kun ŝi?’ flustris al mi Taiso.
‘Laŭ mi, ŝi ĵus ploris.’

Estis streĉa etoso malgraŭ niaj provoj
babili, kaj mi vidis, ke ankaŭ Taiso
estas laca, kvankam ŝi estis devigata
kaŝi tion. Ni ĉiuj estis kontentaj, kiam
Nerono venis al mia divano por diri, ke
li hejmeniros.

‘Ankaŭ mi venos,’ mi diris. ‘Estas
preferinde havi kunulon, je ĉi tia nokta
horo. Sed kio pri Senecio – ĉu vi ne
atendos lin?’

‘Li estas ankoraŭ supre,’ Nerono respondis senpacience. ‘Li simple devos prizorgi sin mem – li ne rajtas postuli, ke mi tutnokte atendadu lin.’

Ni remarŝis en silento, sekvante je ioma distanco malantaŭ Doriforo, kiu gvidis kun torĉo. Nerono evidente ne estis en humoro por babili, kaj mi ne kuraĝis demandi la kaŭzon de lia maltrankvilo. Sed finfine li mem enkondukis la temon. ‘Mi ne scias, kion fari pri Akteo. Verŝajne vi ne rimarkis tion, sed ŝi estis iom ĉagrenita ĉi-vespere.’

‘Ĉu vere...?’ – mi ne riskis plian komenton.

‘La problemo estas, ke mi baldaŭ devos edziĝi.’

Tian aferon mi ne atendis. ‘Ĉu edziĝi? Al kiu?’

‘Vi konas Britanikon, mian pli junan fraton? Al lia fratino, Oktavia.’

‘Ĉu la filino de la imperiestro?’

‘Ĝuste al ŝi. Je Jupitero, ŝi estas malekscita! Ŝi ricevis edukon laŭ la plej eksmoda stilo. Vi scias, ke Cezaro ankoraŭ sopiras je la belaj malnovaj tempoj, kiam ni ĉiuj loĝis en kavernoj kaj pasigis niajn tagojn ĉe la plugilo – aŭ ĉe la teksilo, ŝiakaze.’

‘La virgulino kun klinita kapo

per ĉastaj fingroj plektas la fadenojn,’

mi citis.

‘Kio?’

‘Cecilio,’ mi klarigis.

‘Ho, jes,’ li diris senatente. ‘Mi volas diri – ne estas risko, ke ŝi forrabos mian atenton de Akteo. Akteo havus pli bonan kialon por maltrankviliĝi, se oni intencus edzigi min al la filino de Rubelio, aŭ al alia ino kun iom pli da vervo.’

‘Tamen, ĵus edziĝinte, vi ne povos pasigi viajn vesperojn ĉe Azelina.’

‘Mi ne vidas, kial ne. Mi estas devigata edziĝi kun la ino, sed tio ne signifas, ke mi devos ankaŭ pasigi kun ŝi miajn vesperojn.’

Mi pensis interne de mi, ke antaŭvidiĝas por Oktavia senĝoja perspektivo. Sed sendube ŝi konsolos sin per amanto, same kiel faras ĉiuj grandaj sinjorinoj ĉe la kortego, se pravas la onidiroj.

La geedziĝon de Nerono kun Oktavia oni festis la postan monaton per ludoj kaj bestoĉasado en la amfiteatro. Nerono financis la ludojn mem, kaj li donis al mi manplenon da ĵetonoj por la kompanio, por ke ni havu bonajn sidlokojn. Li kaj Oktavia prenis la honoran lokon flanke de la geimperiestroj. Ni sidis sufiĉe proksime por vidi, ke la novedzino estas delikata ineto dektri- aŭ dekkvar-jara. Ŝia vizaĝo estis kaŝita sub densa tavolo da blanka ŝminko, kiu donis al ŝi aspekton de malgranda rigida pupo. Ŝi kaj ŝia edzo tenis la manojn kaj ridetis.

La ludoj apenaŭ donis al mi plezuron, kaj mi spektis kun peza koro dum malsupre oni ĉasis antilopojn kaj strutojn, panterojn kaj aprojn, tra transplantita arbareto. Estis ankaŭ komika prezento: klaŭno incitis urson,

ĝenante ĝin per longa pikilo, tiam por konfuzi la beston faris grandan kapriolon ĝuste kiam ĝi estis preta ataki. Finfine la klaŭno rifuĝis en barelon kaj tiris malsupren la kovrilon. La urso paŝis ĉirkaŭ la barelo, ne komprenante kien malaperis ĝia kontraŭulo, kiu de tempo al tempo elsaltis por inciteti ĝin denove antaŭ ol replonĝi internen. Primo kaj Kvartila, kiuj sidis apud mi, ridegis ĝislarme. Ankaŭ mi devigis min ridi, sed estis malfacile trovi la ĝustan humoron.

Mi de ĉiam sciis, ke la amikeco kun Nerono iam devos veni al fino. Ne pro tio, ke ni malbone rilatis; sed finfine, tiu ja estis junulo, kiu jam faris paroladojn antaŭ la Senato – kaj ĉiuj komprenis al kiu alta celo kondukas la alianco kun la filino de la imperiestro. Kiom longe li plu povos pasigi siajn vesperojn kun homo, kiu vivtenas sin per grimacoj kaj transkapiĝoj? Ĝis nun mi faris mian eblon por ignori la avertajn signojn; sed vidante hodiaŭ Neronon kun sia

aristokrata novedzino apude, mi devis fronti la realon – jen la punkto, kie niaj vojoj disiĝas.

La filino de Primo naskiĝis fine de novembro. Rupilio jam malvolonte liberigis Kvartilan kelkajn tagojn pli frue. Se li ne intencis realigi sian minacon elmeti la infanon, li ne havis elekton: kompreneble li ne deziris, ke lia unua genepo naskiĝu sklavo. Sed tuj kiam li prenis la etan Primilan en siajn brakojn, ŝanĝiĝis lia sinteno. Li tiom fieris pri sia nepineto, ke oni supozus, ke li mem aranĝis la amindumadon inter ŝiaj gepatroj.

Ni ricevis plurajn mendojn por la Saturna Festo – ĝi ĉiam estas bona periodo por komikaj prezentoj – kaj Rupilio dancis tra siaj scenoj, improvizante, interŝanĝante ŝercojn kun la spektantoj, kreante novajn trukojn, ĝis mi apenaŭ kapablis sekvi

lin. Dum li ĝojis, mi estis deprimita. Mi kaj Primo kreskis kune; kiam ni estis malgrandaj, ni ludis kaj kverelis kaj petolis kiel du fratoj, kaj kiel junuloj nian unuan guston de pli plenkreskaj amuzoj ni spertis komune. Nun, dum li konstante umis ĉirkaŭ Kvartila kaj sia filineto, ŝajnis al mi, ke tiu Primo, kiun mi konis, malaperis por ĉiam – anstataŭis lin Primo, la zorgoplena juna patro.

Dum la postaj monatoj mi apenaŭ sciis, kiel pasigi la tempon. Mi foje iris trinki tason da vino kun amikoj el aliaj trupoj, kaj mi vizitis Azelinan kiam ajn sufiĉis mia mono, sed mi ankoraŭ trovis neniun, kiu anstataŭus Primon... aŭ Neronon. Mi estis kontenta, kiam la vetero varmiĝis kaj ni ekveturis al Antio, la unua etapo en nia somera turneo. Ni estis pretigintaj novan skeĉon pri barbiro, kiu ricevas neatenditan heredaĵon kaj tuj trovas sin sieĝata de flatemaj monĉasantoj – ĝis montriĝas,

ke la heredaĵo estis destinita ne al li,
sed al alia homo kun la sama nomo.

La tagon post nia alveno en Antio,
Rupilio kaj mi ĵetis rigardon en la
teatron. Dum Rupilio malaperis por
serĉi iun respondeculon, mi apogis min
sur balustrado, de kie eblis rigardi
malsupren al la scenejo. La
scenokonstruaĵo ⁵ briletis sub la junia
suno, kiu je ĉi tiu frumatena horo
ankoraŭ ne atingis malagrablan ardon,
kaj mi kun agrabla konscio de
nenifarado rigardis la aktivecon sube.
Pluraj sklavoj muntis grandegan kaĝon
– evidente unu ero en la programo
estos prezento de sovaĝaj bestoj. Post
ioma tempo mi rimarkis, ke ne nur mi
apogiĝas sur la balustrado: homo staris
apude, virino kun leona hararo
kaŝtanbruna. ‘Ĉu mi ne jam vidis vin?’
mi diris. ‘Ĉu vi ne estis ĉe la Festivalo
de Fortuno, pasintan someron en
Prenesto?’

Ŝi sin turnis por rigardi min, sufiĉe malvarmete, kiel oni ĝuste atendus de juna virino, kiam alparolas ŝin nekonato. Ŝi havis malgrandan, palan vizaĝon, kies plej elstaraj trajtoj estis dikaj brovoj kaj amaso da haroj neligitaj, kun nur la ekstremoj tiritaj supren per bendo. Sed tiam, ŝajne, ŝi rekonis min; ŝia esprimo moliĝis kaj ŝi respondis per sufiĉe afabla tono, 'Jes, efektive ni ludis ĉe la Festivalo de Fortuno. Kiu estas via kompanio?'

'La Rupilia. Vi estas kun la infana danctrupo, ĉu ne? Ni aĉetis de vi dancistinon pasintan someron: Filomenan.'

'Ho jes, Filomena. Kiel ŝi fartas?'

'La aliaj knabinoj ŝatas ŝin. Ili ĉiam ridas kaj flustras inter si en anguloj. Ŝi estas elstara dancisto.'

La juna virino ridetis, tute forgesinte sian komencan neamikemon. 'Mi estas

kontenta, ke vi tion opinias – mi mem trejnis ŝin.’

‘Ĉu vi estas Justa?’ Mi sciis, ke Justa estas la posedanto de tiu trupo – tamen ĉi tiu junulino ne donis impreson de sufiĉa matureco por jam respondeci pri la propra kompanio.

‘Ne, Justa estas mia patrino. Mia nomo estas Pontia Vitaliso.’

Pontia Vitaliso. Laŭ la nomoj, ŝi kaj la patrino certe estas liberigitaj sklavoĵ. Kaj nun ili posedas la propran kompanion; ili bone prosperis.

‘Mi estas Rupilio Prokulpio.’ Tiel ŝi scios, ke ankaŭ mi estas libera. ‘Kiel longe vi restos en Antio?’

‘Nur por la festivalo. Poste ni havas antaŭmendon por Taracino.’

‘Ĉu vi mem aranĝas viajn mendojn?’

‘Jes, kompreneble – pli precize, tion faras mia patrino.’

‘Mi celas diri: ĉu eĉ la traktadon kun la pretoroj kaj tiel plu?’

‘Kial, ĉu tio surprizas vin?’ Pontia Vitaliso rigardis min per defia esprimo, invitante min komenti, se mi aŭdacos.

‘Ne, kompreneble ne,’ mi mensogis. Evidente necesos paŝi kun atento. ‘Do, en via kompanio tute ne troviĝas viroj?’ – riska demando, sed mi volis scii.

‘Nur knaboj, kaj ni vendas ilin, kiam ili kreskas tro altaj por la trupo. Tio estas nia okupo – ni aĉetas malgrandajn infanojn je bona prezo, trejnas ilin kiel dancistojn, kaj tiam post kelkaj jaroj ni vendas ilin.’

Kiel maniero vivteni sin, tio ŝajnis malagrabla simila al sklavokomercado; aliflanke, mi memoris, ke Filomena ĉiam rakontas kun fiero pri siaj jaroj en

la infana trupo, kaj ŝi rigardas Justan kun admiro. ‘Kien vi iros post Taracino?’ mi demandis. ‘Ĉu vi revenos al Romo?’

‘Jes, ni havas mendon por la ludoj en septembro. Ĉe la Teatro de Pompeo.’

‘Mi malŝategas ludi tie – ĝi estas tiel granda, ke la prezento perdiĝas, laŭ mia sento.’

‘Mi samopinias. Mi preferas la Marcelon.’

Dum ni parolis, mi rimarkis virinon, kiu iris laŭlonge de unu el la vicoj de sidlokoj, tuj super la nivelo, kie ni mem staris. Ŝi grimpis malsupren al ni laŭ la krutaj vicoj kaj diris, ‘Jen vi, Vitaliso. Mi demandis min, kie vi kaŝiĝas.’ Mi tuj vidis, ke ŝi estas la patrino de Vitaliso; ŝi havis la samajn malgrandajn trajtojn kaj dikajn brovojn, kvankam ŝiaj haroj estis tiritaj for de la vizaĝo.

Malkovrite de sia patrino dum ŝi babilis kun nekonata viro, Vitaliso ne montris la hontemon, kiun mi atendis. ‘Pardonu, panjo, mi nur parolis kun Rupilio... kiel vi nomiĝas?’

‘Prokulpio.’

Justa estis direktinta al mi suspektan rigardon, sed nun ŝia maniero iĝis pli amikema. ‘Do, vi estas kun la kompanio de Rupilio, ĉu ne? Kiel fartas Filomena?’

‘Rupilio estas pri ŝi tre kontenta. Ŝi estas nia plej bona dancisto – kaj ni instruas al ŝi kanti kaj jongli.’

‘Jongli!’ La vizaĝo de Justa radiis malaprobon. ‘Ŝi estas trejnita kiel dancisto.’

Mi vidis, ke mi mispaŝis. ‘Nu, kompreneble en nia trupo necesas fari iom da ĉio.’

‘Mi esperas, ke Rupilio atentas la aliajn kondiĉojn de la kontrakto – mi ĉiam postulas, ke miajn knabinojn oni ne donu al viro sen ilia konsento.’

‘Ne maltrankviliĝu. Niaj junulinoj estas kontrolataj pli rigore ol la pastrinoj de Vesta.’

‘Tiel Rupilio asertis. Ĉu vi venas, Vitaliso?’

Vitaliso salutis min per kaggesto kaj marŝis apud sia patrino al la ŝtuparo, kiu kondukis malsupren al la ternivelo. Ŝia memcerta, senretena movomaniero pensigis min pri Diana, la ĉasistino, kiu per sentimaj paŝoj marŝas tra la arbaro kun pafarko preta. Dek unu tagoj ĝis la fino de la festivalo – mi esperis, ke mi havos denovan ŝancon por paroli kun ŝi. Mi rigardis ŝin malaperi laŭ la ŝtuparo, kun humoro pli gaja ol mi sentis de longa tempo.

Post vigla nokto mi dormis malfrue ĉe la gastejo. Tute ne plaĉis al mi la skuado de Primo, kiu insistis, ke mi vekiĝu. Mi ĝemis kaj frotis miajn okulojn. 'Kio estas? Ni ne devas provludi ĉi-matene.'

'Necesas tuj pretiĝi,' li diris. 'Oni ordonis, ke ni iru al la palaco.'

Mi rektiĝis en mia lito, subite tute vekiĝinta. Mia unua penso estis, ke la patrino de Nerono iel malkovris pri mia rolo en la vesperaj ekskursetoj de sia filo kaj decidis malliberigi min. Teruraj pensoj fulmis tra mia menso. 'Oni invitis nin ludi antaŭ la imperiestro,' Primo diris.

Konfuzite pro la abrupta invito, mi surmetis mian tunikon. Se ni efektive teatru antaŭ la imperiestro, ni estus devintaj pretigi novan skeĉon, kaj cetere mankis nun tempo por reĝustigi la scenopanelon. Ĝi ja bone servis tra la tuta Latinujo kaj reen al Romo, sed la kadro intertempe misformiĝis. Mi ne komprenis, kial oni vokis nin tiel senaverte. Eble aranĝis la aferon Nerono, sed mi bedaŭris, ke li ne donis al ni pli da tempo por organiziĝi.

Ekstere estis oktobra tago venta kaj polva; sekaj folioj saltetis laŭ la kotaj vojoj ĉasate de abruptaj ekblovoj. Mi alvenis ĉe la teatro kie mi trovis Mandukon, kiu ŝarĝis ĉaregon per niaj kostumoj kaj la panelo: ne temis pri nia propra kaduka ĉarego, kiu interalie ne rajtis pasi tra la urbo dum la tagaj horoj, sed pri alia sendita de la palaco. Hebo hastis al mi, samtempe pinglante sian hararon en rubandon. ‘Kie estas Sekundo?’

‘Jen vi, kara knabo,’ diris Rupilio. ‘Iru preni la skribtabuletojn el la ilarokesto. Kaj cetere, ne forgesu la grifelon.’

‘Kion ni faros pri la girlandoj?’ diris Hebo. ‘Iu devos iri aĉeti freŝajn florojn.’

‘Ĉu vi pakis la malgrandan tabureton por mia ĵonglado?’ Celerina demandis Mandukon.

‘Nu?’ diris al mi Rupilio. ‘Kion vi atendas?’

‘La ŝlosilon de la kesto.’

Rupilio enmanigis al mi la ŝlosilon, dum rapidis al ni Urso. ‘Mi forgesis la agordilon. Mi devos reiri por preni ĝin.’

‘Jen duona sesterco,’ Rupilio diris al la ĉaristoj. ‘Dum ni finpretiĝos, prefere vi du iru al la trinkejo por preni tason da vino.’

Mia unua impresio pri la interno de la palaco estis pri longaj, senlumaj koridoroj kun eksmodaj marmoraj kaheloj sur la planko – pli belajn mi vidis ĉe la publika banejo – kaj jen kaj jen statuo kun forskvamiĝantaj farboj. Tre supereca viro kondukis nin laŭ senfinaj koridoroj kaj sennombraj ŝtuparoj, ĝis ni ne plu havis eĉ ideon, kie ni troviĝas. ‘Ĉi tio pensigas min pri la postscenejo ĉe la Marcelo,’ Rupilio ŝercis. Certe nia gvidanto estis nura sklavo, aŭ maksimume liberigito, sed li eĉ ne bonvolis respondi.

Finfine ni alvenis ĉe pli luma kaj pli eleganta parto de la konstruaĵo, kie oni direktis nin en ĉambron. Estis kvazaŭ ni ĵus surscenejiĝis. La murojn kovris pentraĵoj: vidiĝis pordoj kaj kolonoj kaj ŝtupoj, kaj eĉ kurtenoj drapiritaj alte super la tuto, ĉio kun senspirigaj koloroj laŭ reala grandeco. Je la unua impresio oni povus imagi, ke eblus malfermi la pordojn kaj trairi, sed fakte la tuta

sceno estis plata, simple pentrita ĉe la muro.

‘Atendu ĉi tie,’ diris la viro.

La ĉambro estis aranĝita kvazaŭ por intima vespermanĝo. Estis unuopa tablo kun tri divanoj, sed ili estis sen kovriloj, tiel ke videblis la matracoj. Sklavo ŝvebis apud la pordo por kontroli nin. Ni staris en nerva grupeto, kaj parolis inter ni per subpremitaj voĉoj. Finfine envenis homo vestita per togo kaj kun tiom da pezaj ringoj, ke li apenaŭ povis movi siajn fingrojn.

‘Vi estas la komikistoj,’ li diris. ‘La imperiestro malbone fartas hodiaŭ, kaj li petis ian agrablan distraĵon por pasigi la ripozon postmanĝan. Vi prezentos ĝin ĉi-ĉambre. La sklavoj alportos vian... nu... vian ilaron post nelonge.’

Enhastis alia viro, ĉi tiu vestita per multekosta tuniko lina. ‘Palaso, mi serĉadas vin ĉie! La imperiestrino

petadas vin. Ĉu vi scias, kiu havas la ŝlosilon de la ŝranko en la fruktoĝardeno ĉambro?’

‘Mi tuj venos,’ diris Palaso. Li senprokraste turnis sin al ni. ‘Ĉi tiu ĉambro estos libera ĝis tagmezo. Petu la sklavon, se vi bezonos ion.’

Jen venis la ĝusta momento por rapida antaŭprovo, sed la vero estis, ke ni ne estis en la ĝusta humoro. Tro konsternis nin la alvoko tiel subita, kaj la sento, ke ni estus devintaj prepari skeĉon novan. Ankaŭ la ĉambro estis troa: la dekoraĵoj estis tiel vivoplenaj, ke ili neniigis ĉion, kio okazis tie. Celerina provetis iom da ĵonglado, kaj faligis unu el siaj pilkoj, kiu ruliĝis sub divanon, tiel ke devis eltiri ĝin la sklavo. Hebo frapis Sekundon, kiu rektigis sin kolere; li multe kreskis dum la pasinta jaro kaj estis preskaŭ same alta kiel ŝi. Mi havis la senton – mi kredas, ke tiun senton ni ĉiuj havis – ke ni staras antaŭ la plej drasta fiasko de post tiu terura reviviĝo

de *Prometeo* kun la dresita aglo.
Cetere, komika prezento neniam
funkcias antaŭ unupersona
spektantaro, precipe se tiu unu persono
hazarde dormetas post peza manĝo.

Ni faris senentuziasman provon sub la
okulo malaproba de la palaca sklavo.
Helpus, se li almenaŭ de tempo al
tempo ridus, sed li konstante iradis al la
pordo kaj rigardis tien kaj reen laŭ la
koridoro. Ni estis kontentaj, kiam la
provon interrompis la alveno de nia
panelo, kiun portis du homoj per
puŝcareto. Akceptinte trinkmonon de
Rupilio, ili iĝis tute afablaj. Ili helpis nin
starigi niajn scenaĵojn, kaj eĉ revenis
kun lignaĵisto, kiu rektigis la kadron de
la scenopanelo kaj kaŝis la plej
evidentajn skrapojn per iom da farbo.

Tiu paŭzo helpis nin trankviliĝi, kaj ni
finfine sentis nin pretaj por alfronti pli
seriozan provon. Ĝuste tiam ekaŭdiĝis
rapidaj paŝoj ekstere kaj la pordo
malfermiĝis kun bato. La sklavo tuj

rektigis sin kaj siblis al ni, ‘Flanken!
Venas la edzino de la imperiestro!’

Konfuzite, ni rigardis unu la alian, kaj je tiu momento enmarŝis alloga juna virino, sekvata de paro da servistoj, kiuj kuretis malantaŭe por ne postresti.

‘Moviĝu!’ denove siblis la sklavo.

Rapide ni vicigis nin ĉe la muro. Sekvis konsternita silento. ‘Kiu estas ĉi tiuj homoj?’ demandis la junulino.

‘La komikistoj, mia sinjorino,’ la sklavo respondis.

‘Ho... mi komprenas. Bone. Ili ludos ĉi-posttagmeze. La imperiestro fartas malbone, kaj li petis ioman distradon.’

Ŝi transiris rapide al ŝranketo, kiu staris ĉe la kontraŭa muro, kaj komencis traserĉi la bretojn per nervaj, senpaciencaj gestoj. Ni rigardis en respektoplena silento, dum ŝi eltiris

diversajn objektojn, ilin trarigardis, kaj tuj reŝovis. Ŝia agitiĝo estis evidenta. Tiam ŝi faligis malgrandan statueton, kiu frakasiĝis surplanke.

‘Purigu tion,’ ŝi diris al la sklavo, kaj eliris.

Do, jen Agripina! Post ĉio, kion mi jam aŭdis pri ŝi, mi ĉiam imagis, ke ŝi estus tipa roma nobelino, unu el tiuj severaj sinjorinoj laŭ la antikva moro. Vidinte ŝin nur de malproksime en la amfiteatro, mi ne atendis tian malaltan, delikatan figuron, kun plaĉa kurbo ĉe la kolo kaj ŝvelrondaj brakoj, drapirita per miriga robo el flamruĝa silko, kiu duone malkaŝis la allogan formon interne. Ŝi ŝajnis apenaŭ pli aĝa ol ŝia filo, kaj oni povus erare supozi ŝin, se ne precize la fratino de Nerono, almenaŭ juneca onklino. Sed kio tuj trafis min – mi ne scias kial, ĉu pro ŝia maniero turni la kapon, ĉu pro la formo de ŝia buŝo – tio estis ŝia simileco al Akteo.

Ni reprenis nian interrompitan provludon, ĉefe por memoriĝi nin pri la sinsekvo de la dialogo kaj por certigi, ke ĉiuj necesaj iloj troviĝas ĝustaloke. Filomena konstatis, ke ŝi forgesis la kreton, per kiu ŝi kutimis froti la piedojn. Rupilila pruntis la sian, sed Filomena plendis, ke ĝi estas tro malmola kaj malpli bona ol la speco, kiun ŝi normale uzas. Primo malkovris, ke li faligis ie sian pensan amuleton, kaj Rupilio demandis Hebon, ĉu ŝi memoris la vinoferon al Apolono antaŭ ol eliri.

‘Kompreneble mi memoris,’ ŝi respondis senpacience. ‘Ne necesas, ke vi menciu al mi tion.’

‘Bone, homoj, sufiĉas,’ Rupilio diris. ‘Se ni daŭrigos ĉi tiel, ni suferos nervan kolapson antaŭ ol venos la ĝusta horo. Ni jam prezentis la pecon almenaŭ kvindek fojojn, kaj ĝi furoris ĉe la festeno de Kurtilio. Post la fino mi regalos vin ĉiujn per luksa manĝo, kaj ĉiu sklavo en la kompanio ricevos

kvindek sestercojn, kaj cent ĉiu liberulo. Nun ni havas la ŝancon de nia vivo vidi la internon de la palaco, do ni profitu de tio, informiĝante kie estas la kuirejoj.’

Ni ĉiuj gajiĝis kaj permesis al la sklavo konduki nin tra pliaj mejloj da koridoroj ĝis granda sed tre simpla manĝejo. Ne vidiĝis ĉi tie divanoj kaj inkrustitaj tabloj: nur benkoj metitaj ĉirkaŭ ordinaraj stabloj lignaj, kaj tiomaj por sidigi cent samtempe. Estis nur kelkaj homoj jen kaj jen, ĉar estis ankoraŭ frue: verŝajne estis proksimume la kvina taghoru. La manĝaĵoj konvenis al la ĉambro: olivoj kaj sekigitaj figoj, malmole kuiritaj ovoj, pano, fromaĝo kaj hordea supo. Cetere, estas saĝe ne tro manĝi antaŭ ol teatri.

La etoso ne kontribuis al trankviligo de niaj nervoj. Ĉiuj sklavoj, kiuj estus devintaj alporti la manĝaĵojn, kunpremiĝis en grupetoj por murmuri inter si. Tio ne ŝajnis la senzorga babilado de homoj, kies ĉefa laboro

estas nur atendadi dum longaj horoj.
De tempo al tempo nova homo envenis
kaj tuj aliĝis al ilia rondo; ŝajnis ke ili
diskutadas iun seriozan novaĵon. Ni
finmanĝis senprokraste, kaj serĉis
manieron por pasigi la tempon ĝis oni
vokos nin.

Unu el la sklavoj kondukis nin eksteren
en grandan korton. Estis tre praktika
fontano en la mezo kun almenaŭ deko
da elfluiloj, kaj ŝnuro kun lavaĵoj
etendiĝis inter du arboj. Knabo
senplumigis kokojn apud malgranda
fajro, dum sulkoplana maljunulino
netigis korbon da fazeoloj. Rupilio
ekkuŝis por dormeti sur oportuna
benko, dum ni ceteraj rigardis ĉirkaŭ ni
scivole.

‘Ĉu vi vidas tiujn du,’ mi diris al Primo,
indikante paron da junulinoj, kiuj sidis
sur benko por ŝpini. ‘Ili estas nur
sklavinoj. Ni iru babili kun ili.’

Li hezitis.

‘Ho, venu!’ mi diris. ‘Mi ne povos amindumi al ili tute sola.’

Ni alproksimiĝis, kaj Primo komencis tuj. ‘Kia bela ŝpinado! Atentu, ke ne vidos ĝin Minervo, ĉar ŝi certe ĵaluzus kaj ŝanĝus vin ambaŭ en araneojn, kiel ŝi faris al Araĥno!’

La du eligis knabinecan ridon, kaj unu diris, ‘Tio ne okazis pro ŝpinado; pro teksado okazis.’ Ŝi estis dikronda kun grandaj mamoj, kiuj saltetis sub ŝia lana robo. Ŝia vizaĝo estus plaĉa, se ŝi ne havus, bedaŭrinde, kalvan makulon sur la verto.

‘Ŝpinado, teksado,’ mi respondis. ‘Vi ne rajtas atendi, ke ni kompatindaj viroj sciu pri tiaj inaj misteroj.’

‘Mi neniam vidis vin ĉi tie,’ diris la alia, kiu havis longan vizaĝon kun elstarantaj dentoj. ‘Ĉu vi estas novaj?’

‘Ne, ni venis por prezenti distraĵon. Ni estas komikistoj.’

‘Ĉu komikistoj?’ diris entuziasme la dikulino. ‘Kelkaj komikistoj estis ĉi tie ankaŭ pasintan monaton, kiam vizitis la guberniestro de Kapadocio, kaj poste ili venis eksteren kaj akrobatis por la sklavaro.’

‘Kiu invitis vin?’ demandis tiu kun la elstarantaj dentoj. ‘Ŝajnas stranga tago por inviti aktorojn.’

‘Ĉu? Kial?’ demandis Primo. ‘Ni devas ludi antaŭ la imperiestro.’

‘La imperiestro!’ diris kun surprizo la du knabinoj, kaj tiu kun la dentoj aldonis, ‘Sed kiel eblas? Li estas malsana, aŭ tiel diradas ĉiuj. Ili eĉ diras...’ Ŝi silentis en konfuzo.

‘Ili diras kion?’

‘Nenion... Estas nur tiel, ke laŭ la homoj, li estas vere ekstreme malsana.’

‘Nu, li ne povas esti tiel malsana,’ mi diris. ‘Oni informis nin, ke ni ludos por li post la tagmanĝo.’

‘Ho jes, post la tagmanĝo...’ diris la junulino, kvazaŭ tio klarigus ĉion. ‘Do bone, evidente estas en ordo.’ Primo kaj mi provis ŝanĝi la temon, sed ĉiuj estis malkomfortaj, kaj tuj kiam prezentiĝis la ebleco, ni eskapis.

‘Pri kio temis tiu tuta afero?’ mi diris, kiam ni estis solaj.

‘Mi ne scias, sed okazas io aparta. Estas strange, ke ili mendis nin tiel subite.’

‘Nu, nenio farebla. Verŝajne ili vokos nin baldaŭ.’

‘Eble ni devus pretiĝi,’ li diris. ‘Ili povus ne doni al ni sufiĉan tempon por

surmeti niajn kostumojn.’

Mi konsentis, sed dum ni transiris la korton al Rupilio, ekaŭdiĝis laŭta lamentado interne de la konstruaĵo. Mi tuj komprenis, pri kio temas. Ĝi ŝajnis doni sencon al ĉio, kio jam okazis tiutage.

‘La imperiestro,’ Primo diris.

Pluraj el la virinoj en la korto jam komencis vekri kaj ŝiri siajn vestojn. Primo kaj mi aliĝis al Rupilio kaj la ceteraj trupanoj, kaj ni staris en embarasata grupo, necertaj kion fari. Mi ne sciis, ĉu mi estas kontenta aŭ seniluziiĝinta, ke ni ne devos ludi, kaj mi demandis min, ĉu ni ĉiuokaze ricevos pagon.

‘Laŭ mi, ni prefere foriru,’ Primo flustris al Rupilio. ‘Ni povos reveni por la panelo morgaŭ.’

Ĝuste tiam alvenis la ordono, ke ĉiuj iru al la armea ekzercejo, kie la imperiestrino alparolos la gvardion. Ni sekvis la amason, kaj baldaŭ troviĝis en granda herbokovrita placo, kie ĉiuj rigardis supren al alta portiko atingebla per ŝtuparo. Ĝuste tie aperis la imperiestrino – kaj ĉe ŝia flanko estis junulo, kiun mi konis. Per funebra tono ŝi anoncis, ‘La imperiestro ĵus forlasis nin por aliĝi al la senmortaj dioj.’ Ĉiuflanke leviĝis mallaŭta murmurado, kiun ŝi tratranĉis per la vortoj, ‘Mi venas por prezenti al vi lian plej aĝan filon, nian novan imperiestron.’

Falis hezitema silento. Nerono paŝis antaŭen. ‘Mi vidas, ke vi ĉiuj estas konsternitaj pro malĝojo, post la subita morto de nia imperiestro, mia patro Klaŭdio. Ni ĉiuj scias, ke li estis klera kaj malavara homo, kaj certe neniu el vi dubas, ke lia morto estos al ni granda perdo. Mi povas nur promesi, ke mi faros mian eblon por egaligi liajn atingojn kaj precipe lian malavarecon,

tiel ke vi neniam havu kialon por bedaŭri, ke vi elektis min kiel vian postan imperiestron.'

Denove estis paŭzo, dum la homoj digestis ĉi tiun lastan informon. 'Kio okazis al Britaniko?' demandis iu malantaŭ mi, kaj alia voĉo respondis, 'Ĉu vi estas freneza?' Tiam ĉiuj komencis hurai.

Ĉar tio ĉi estas nur nekompleta
provversio de la libro, en tiu ĉi loko
mankas pluraj ĉapitroj.

Noto de la verkisto

Niaj scioj pri la vivo de Nerono baziĝas ĉefe sur la verkoj de tri historiistoj de tiu epoko: Tacito, Suetonio kaj Diono Kasio. Kaj tamen ne precize de tiu epoko: nur unu el ili, Tacito, efektive vivis dum parto de la regoperiodo de Nerono. Verŝajne li havis ne pli ol 13 jarojn, kiam Nerono mortis en 68 pK. Suetonio naskiĝis kelkajn jarojn post la morto de Nerono, kaj Diono Kasio vivis en la posta jarcento.

El la tri, Suetonio, kiu estis pli biografiisto ol historiisto, estas tiu kiu donas la ni la plej ekvilibrantan bildon. Li dividas la agojn de Nerono en bonajn (inter tiuj li kalkulas la persekutadon de

la kristanoj) kaj malbonajn. Li ankaŭ donas al ni impreson pri Nerono kiel artisto:

... havante inklinon al poezio, Nerono entuziasme verkis versojn, sen aparta peno. Oni ofte asertas, ke li aperigis verkojn de aliaj kiel la proprajn, sed tio ne estas vera. Mi havis okazon vidi malnetojn kaj paperojn kun kelkaj el liaj plej konataj poemoj skribitaj de li propramane. La multenombraj forstrekoj, korektoj kaj vortoj aldonitaj interlinie montras, ke la tekstoj estis nek kopiitaj nek skribitaj laŭ ies diktado, sed ke ili estis verkitaj de iu, kiu estis pensanta kaj kreanta. Krome li havis intereson ne malgrandan pri pentrado kaj skulptado. ¹⁶

Estas menciinde, ke kelkaj el la verkoj de Nerono estis ankoraŭ konataj post

lia morto.

Nerono estis malbonŝanca rilate al siaj biografiistoj. Estis verkitaj pli favoraj historioj de lia regoperiodo, sed bedaŭrinde tiuj ne travivis. Tacito neniel kaŝas sian malaprobon pri Nerono; dum Diono Kasio, priskribante liajn teatrajn kaj artajn agadojn, apenaŭ sukcesas reteni sian malestimon. Aldonu al ĉio ĉi la persekutadon de la kristanoj, kaj oni komencas kompreni, kiel Nerono iĝis unu el la plej kalumniataj el ĉiuj romaj imperiestroj.

Prezentante la patrinon de Nerono, Tacito ne traktas ŝin pli afable ol ŝian filon. En la hodiaŭa mondo Agripina eventuale estus sukcesa politikistino; antaŭ dumil jaroj ŝia sola ebleco estis regi pere de siaj edzo kaj filo. Tiel ŝi venis en konflikton ankaŭ kun Seneko, kaj proksimume unu jaron post la imperiestriĝo de Nerono, li kaj Nerono elpuŝis ŝin.

Travivas sufiĉaj el la verkoj de Seneko por doni al ni relative klaran ideon pri lia karaktero. Li prezentis sian filozofion en serio de leteroj, kiuj estas surprize interesaj, eĉ hodiaŭ, kaj li impresas kiel persono homama kaj praktika. Seneko estas ofte kritikata pro sia kompromisemo, sed ĉu tio ne estas necesa kvalito de ĉiu ajn sukcesa politikisto? Liaj teatraĵoj estas la solaj romaj tragedioj, kiuj travivas ĝis la moderna epoko, kaj li ankaŭ verkis mallongan satiran pecon pri la diiĝo de la imperiestro Klaŭdio.

Petronio estas rolulo ĉiam aparte ŝatata de verkistoj. Li ricevis simpatian traktadon en la epopeo de Sienkiewicz *Quo vadis*, kaj pli lastatempe en la sprita kaj pika romano de Gore Vidal *Live from Golgotha* (Rekta dissendo el Golgoto). Ankoraŭ ekzistas, almenaŭ parte, verko de Petronio mem, *Satirikono*, kiu enhavas interesegan, sed troigitan, priskribon de roma vespera festeno. La eleganta

sinmortigo de Petronio estas rakontita de Tacito.

Kvankam la poeto Lukano estas malpli konata hodiaŭ ol lia onklo Seneko, oni konsideras lin unu el la elstaraj poetoj de tiu generacio. Lia epopea poemo pri la Civitana Milito estas ankoraŭ trovebla, same kiel malpli longaj pecoj de liaj samtempuloj Kalpurnio Sikulo kaj Persio. Ni konas la nomojn de aliaj verkistoj, kiuj prosperis en la stimula literatura etoso de la Nerona kortego, sed iliaj verkoj ne postrestis ĝis nia epoko.

Prokulpio mem estas pure fikcia. Li estas la speco de aktoro, kiun oni tiam nomis mimo (*mimus* en la latina), sed mi ne uzas en mia romano tiun terminon, kiu donas misgvidan impreson al moderna leganto. Mimoj estis komikaj aktoroj, kiuj je la plej malalta nivelo vagadis de loko al loko, starigante sian improvizitan scenejon ĉie ajn, kie povus kolektiĝi spektantaro.

Tipaj intrigoj estis la trompita edzo aŭ la neatendita heredaĵo, kun amaso da aktualaj aludoj kaj ŝercoj. La mimoj eventuale aldonis varion al siaj prezentoj per akrobataĵoj, ĵonglado, dresitaj bestoj kaj aliaj amuzaĵoj. Tia estas la fono de Prokulpio, sed lia kompanio jam komencas suprengrimpi, kiam malfermiĝas ĉi tiu romano.

FONO KAJ FONTOJ KONCIZA BIBLIOGRAFIO

Antikvaj:

The Annals of Imperial Rome, Tacitus,
tr. M. Grant: Penguin, 1971.

The Twelve Caesars, Suetonius, tr. R.
Graves, rev. M. Grant: Penguin, 1979.

Roman History, Books LXI-LXX, Dio
Cassius, tr. E. Cary: Loeb, Harvard,
1925.

Letters from a Stoic, Seneca, tr. R. Campbell: Penguin, 1969.

Konsolo al sia patrino Helvia, Seneko, tr. G. Berveling: VoKo, Breda, 1990.

Pri la feliĉa vivado, Seneko, tr. I. Ertl: VoKo, Breda 1991.

Four Tragedies and Octavia, Seneca, tr. E.F. Watling: Penguin, 1966.

Oktavia, Seneca, tr. G. Berveling: FEL, Antverpeno, 1989.

The Satyricon and The Apocolocyntosis, Petronius/Seneca, tr. J.P. Sullivan: Penguin, 1977.

Apokolokintozo de I Dia Klaŭdio, Seneca, tr. G. Berveling: VoKo, Breda, 1990.

Civil War, Lucan, S.H. Braund: Oxford, 1992.

Antologio Latina 2, Epoko de Aŭgusto, 31 a.Kr. - 14 p.Kr., G. Berveling: Fonto, Chapecó, 1998.

Antologio Latina 3, Julia-Klaŭdia dinastio, 10 – 75 p.Kr., G. Berveling: Fonto, aperigota.

Modernaj:

Nero, M. Grant: Weidenfeld & Nicolson, 1970.

Nero: the End of a Dynasty, M.T. Griffin: Batsford, 1984.

Reflections of Nero: Culture, History, and Representation, red. J. Elsner kaj J. Masters: North Carolina, 1994.

Agrippina: Sex, Power, and Politics in the Early Empire, A.A. Barrett: Yale, 1996.

The Roman Stage, W. Beare: Methuen, 1968.

History of the Greek and Roman Theatre, M. Bieber: Princeton, 1961.

The Roman Theatre and its Audience, R.C. Beacham: Routledge, 1995.

Spectacle Entertainments of Early Imperial Rome, R.C. Beacham: Yale, 1999.

Cruelty and Civilization: The Roman Games, R. Auguet: Routledge, 1994.

Gladiators, M. Grant: Delacourte, 1968.

Roman Circuses: Arenas for Chariot Racing, J.H. Humphrey: Berkeley, 1986.

Music in Ancient Greece and Rome, J.G. Landels: Routledge, 2001.

Roman Sexualities, red. J.P. Hallett kaj M.B. Skinner: Princeton, 1997.

Travel in the Ancient World, L. Casson:
John Hopkins, 1994.

Law and Life of Rome, J.A. Crook:
Thames & Hudson, 1967.

Women in Roman Law and Society,
J.F. Gardner: Croom Helm, 1986.

Klarigoj pri la traduko

Morto de artisto, same kiel mia unua romano, *La ŝtona urbo*, estis verkita unue en la angla. Oni ofte demandas min, ĉu tradukante mian propran verkon, mi iugrade reverkas. La respondo estas, ke mi ja faras mian eblon sekvi tre precize la originalon – sed ke, paradokse, tio foje signifas traduki pli libere. Ne tiom gravas kapti la precizajn vortojn de la originalo kiom la saman impreson aŭ la saman emocian ŝarĝon. Kiam temas pri dialogo, plej esencas, ke la rezulto sonu nature. Tio devigas traduki iom libere; tamen mia celo ĉiam estas teni la originalan sencon, eĉ se foje necesas uzi malsamajn vortojn, kiel en la sekvontaj ekzemploj.

Kiam la du junuloj, Prokulpio kaj Nerono, planas iri kaŝe al la ĉarkonkuroj: ‘Do you think I could get away with it?’

Laŭlitere: Ĉu vi opinias, ke mi povus fari tion nerimarkite?

Mia traduko: ‘Ĉu laŭ vi oni malkovrus min?’

Kiam Primo kritikas Prokulpion pro lia fido al Nerono: ‘I know he’s a friend of yours, Proculpius, but that doesn’t mean you have to sit there with your eyes shut. Sometimes you can take friendship too far.’

Laŭlitere: Mi scias, ke li estas unu el viaj amikoj, Prokulpio, sed tio ne signifas, ke vi devas sidi tie kun viaj

okuloj fermitaj. Foje oni povas troigi pri amikeco.

Mia traduko: ‘Mi scias, ke li estas via amiko, Prokulpio, sed tio ne rajtigas vin ĉiam rigardi alidirekten. Foje eblas ignori tro multe pro amikeco.’

Por ambaŭ libroj mi uzis la saman kriterion: tio estas, ke mi laŭeble uzis nur Fundamentan kaj oficialigitan vortprovizon. Kial mi limigas min tiumaniere? Ĉar, laŭ mi, la multaj homoj kiuj deziras ‘riĉigi’ Esperanton per enportado de nova vortprovizo fakte ne beligas sed malutilas al ĝi. Ili forprenas la apartajn trajtojn de Esperanto, tio estas ĝiaj facileco kaj logikeco, por igi ĝin eŭropa lingvo kiel ĉiuj aliaj. Esperanto estas facile lernebla ĝuste ĉar oni povas kombini la vortelementojn por krei novajn vortojn sen la neceso lerni novajn radikojn. Ĝi estas logika, ĉar sekvante la bazajn regulojn de

Esperanta vortfarado, tuta grupo da vortoj povas esti formata per nur unu radiko. Tial mi opinias, ke enkonduki vortojn kiajn *mortalo* (mortemulo, mortonto) aŭ *Olimpika* (Olimpia) fakte detruas la apartan karakteron de Esperanto.

Fundamentaj vortoj estas tiuj aperintaj en la Unua Libro de Esperanto, kiu enhavis la bazan gramatikon, ekzercaron, kaj la Universalan Vortaron (UV). La UV tamen estis relative malgranda, tial poste aperis pluraj oficialaj aldonoj. Fundamentaj radikoj estas indikitaj en la nova eldono de *Plena Ilustrita Vortaro* (2002) per steleto, dum eta cifero 1 ĝis 8 montras, ke la koncerna radiko troviĝas en unu el la ok Oficialaj Aldonoj al la Universala Vortaro. Post la apero de PIV, la Akademio de Esperanto aprobis naŭan Oficialan Aldonon en 2007, kies teksto estas trovebla en la retpaĝoj de la Akademio.

Tamen, tradukante mian romanon mi kelkfoje bezonis vorton, kiu neniam estis oficialigita. Ofte temis pri vorto jam vaste uzata kaj kun longa historio en la lingvo, kiu espereble baldaŭ ricevos oficialan sankcion de la Akademio. Mi ne enkondukis tiajn vortojn facilanime, sed nur post zorga pripensado. Jen listo de la neoficialaj vortoj uzataj en mia traduko de *Morto de artisto*, escepte de kelkaj teknikaj terminoj kiel romaj moneroj, kalendaraj tagoj kaj simile:

*Absido Agnoski Agordi Akanto
Akvedukto Alianco Anĉovo Anheli Arogi
Bigamio Brankardo Damni Dekori
Deprimi Ekzotika Elito Fascino Fatraso
Faŭno Fekunda Fibulo Fiki Filtri Fluorito
Galopi Gapi Grapolo Grunti Gvati
Ĝenro Hasti Heĝo Heni Hisi Hororo
Humuro Ibekso Inici Inkrusti Investi
Ĵetono Ĵurio Kaco Kapriolo Kikero
Klabo Kojonoj Kolapsi Koncipi Kulmino
Kultivi Lanĉi Liki Lupeno Maŭro Okro
Orlo Pavilono Perturbi Perversa*

*Pigmento Pilĉardo Pluki Predo
Prioritato Promocii Pugo Pulio Refreno
Restaŭri Rivalo Skafaldo Snufi Stamfi
Stolo Stuci Stufi Stumbli Sturmi Svarmi
Ŝablono Ŝakto Ŝminko Tajdo Taŭzi
Teamo Tentaklo Tiko Tinuso Trako
Tranco Truko Turneo Vermiljono Vilao
Vimeno Vori*

Pri la traktado de latinaj nomoj

Jam en la notoj por *La ŝtona urbo* mi rakontis, kiel mi unue provis uzi la latinajn nomojn en ties originala formo, sed baldaŭ malkovris, ke tio praktike ne eblas; tial mi malvolonte decidis pri esperantigo de la latinaj nomoj. Kiel modelon mi uzis la Zamenhofan transskribon de la nomo *Iulius Caesar*, kiu en Esperanto rezultas kiel *Julio*

Cezaro. Tiu nomo ilustras preskaŭ ĉiujn regulojn por la transskribo en Esperanto: I, kiam ĝi estas duonvokalo en la latina, iĝas J; C restas antaŭ E kaj I (kvankam antaŭ aliaj vokaloj ĝi iĝas K); la grupo AE simpliĝas al E; intervokala S iĝas Z. Notu la akcenton: la latina formo estas *Lúlius*, sed en Esperanto oni prononcas *Julío*. Tio klarigas, kial en ĉi tiu romano la nomo *Thraseus Paetus* iĝas *Trazeo Peto*. (Ankaŭ la grupo TH evidente devas simpliĝi en Esperanto.)

Alia problemo rilatas al la transskribo de virinaj nomoj. En la latina tre ofte vira nomo finiĝis per *-us* kaj la parenca ina nomo per *-a*, tiel ke oni regule trovis parojn kiel *Iulius/Iulia*, *Claudius/Claudia*, *Cornelius/Cornelia* ktp. Estus malfacile transskribi tiajn parojn en Esperanto, se oni ne uzus la finaĵon *-a* por la virina nomo. Tial en mia traduko mi uzis *-a* por virinaj nomoj, se tio troviĝis en la origina latina; se ne, mi uzis la normalan

Esperantan finaĵon -o. Sekve, la latinaj nomoj *Octavia* kaj *Flora* en mia traduko iĝis (aŭ restis) *Oktavia* kaj *Flora*, dum aliflanke *Venus* kaj *Acte* iĝis *Venuso* kaj *Akteo*. Mi hezitis pri la mitologiaj nomoj *Medea*, *Minerva*, *Helena* kaj *Klitemnestra*, kiuj en Esperanto kutime finiĝas per -o; *Heleno* kaj *Klitemnestro* efektive estas Zamenhofaj. Por tiuj nomoj mi decidis reteni la tradician formon kun -o.

Fine mi aldonu komenton pri la nomo *Oto*. En la latina tio estas *Otho* en la nominativo sed en la aliaj kazoj la radiko estas *Othon-*. La plej evidenta esperantigo de tiu nomo estus *Otono*; aliflanke tio sonas ĝene simila al *Nerono*. La neseparebla paro *Otono* kaj *Nerono* donus humuran impreson tute ne intencitan, precipe en la fruaj ĉapitroj de la libro. Tial mi preferis la formon *Oto*.

Ĉu Romo aŭ Romio?

En Esperanto oni kutime distingas inter *Romo* por la urbo kaj *Romio* por la pli vasta teritorio regata de tiu urbo. La Romanoj mem ne faris tiun distingon, sed parolis pri la Roma Imperio, la romaj provincoj ktp. Prokulpio, la rakontisto en ĉi tiu verko, evidente faras same.

Mi mem (ne estante antikva Romanino) ĝis lastatempe ja distingis inter la urbo Romo, loĝata de Romanoj, kaj la Romia Imperio, kies civitanoj estis Romianoj. Tipa esperantista harfendado, kiu konfuzis almenaŭ unu el miaj aŭskultantoj, kiam mi prelegis pri la koncerna imperio dum la Internacia Junulara Kongreso en Vjetnamujo (2007). Poste tiu homo venis por demandi min kun surprizo,

kial mi parolas pri *Romianoj*, ne *Romanoj*; ŝajne li neniam antaŭe aŭdis tiun vorton, nek sentis ĝian mankon.

Tial mi nun kun plezuro rezignas pri la superflua *-i-* por forigi almenaŭ unu el la nenecesaj komplikaĵoj, kiuj balastas nian lingvon.

Majuskligo

En ĉi tiu romano aperas pluraj neoftaj popolnomoj: Lidoj, Frigoj, Partoj, Trakoj kaj aliaj. Mi kutime skribas popolnomojn kaj la derivitajn adjektivojn sen komenca majusklo, sed kiam temas pri tiaj nekutimaj nomoj, tio povus foje konfuzi legantojn. Kion oni komprenus, ekzemple, per la esprimo *la parta imperio*? Ankaŭ la vorto *romano* povus

esti miskomprenata. Tial en ĉi tiu verko mi majuskligas la komencliteron de tiuj kaj kelkaj aliaj nomoj, kontraŭe al mia normala kutimo.

En la fino de ĉi tiu verko aperas listo de nomoj, lokoj kaj romaj apartaĵoj. Tiu listo ne estas esenca parto de la libro; efektive la angla originalo ne havas ĝin, kaj ĝi donas al la Esperanta versio klerecan impreson, kiun mi tute ne intencis. Tamen mi konscias, ke la grekaj kaj romaj legendoj, kiuj tiel grave kontribuis al la okcidenta kulturo, povus esti nekonataj al legantoj el aliaj mondopartoj. Tial mi aldonis tiun liston, kiun legantoj povos konsulti laŭdezire. Nur foje, kiam tio povus esti neevidenta, mi atentigas per piednoto, ke pli detala klarigo troveblas en la fino de la libro.

Dankoj

Mi dankas mian agenton por la anglalingva versio, Leslie Gardner, pro ŝiaj esencaj konsiloj. Dankon ankaŭ al la membroj de mia verkista grupo en Romo, precipe al Val McGuire kaj Neeman Sobhan pro ilia detala legado de la manuskripto. D-ro Catharine Edwards, tiam ĉe la Universitato de Bristol, Britujo, afable havigis al mi sian ankoraŭ eldonotan artikolon *Unspeakable Professions: Public Performance and Prostitution in Ancient Rome*. (Intertempe la artikolo aperis en la libro *Roman Sexualities*: vidu la bibliografion.) Gerrit Berveling helpis min per kelkaj teknikaj informoj kaj ĝenerala kuraĝigado. Por la Esperanta versio apartajn dankojn mi ŝuldas al mia edzo, Renato Corsetti, kaj al Otto Prytz, pro iliaj detalaj kontrolado kaj korektado. La unua parto estis

kontrolita ankaŭ de Claude Piron, kiu faris multajn utilajn sugestojn precipe rilate al la stilo, antaŭ sia bedaŭrinda kaj tro frua morto.

Listo de nomoj, lokoj kaj romaj apartaĵoj

Adoniso: junulo amata de la diino Venuso, mortigita de apro dum ĉasado.

Afranio: Afranius, tre produktema verkisto de originalaj komedioj, kiu vivis dum la 2a aŭ 1a jarcento aK.

Agamemnono: mita reĝo, estro de la grekoj dum la Troja milito. Post lia reveno de Trojo, murdis lin lia edzino Klitemnestro kaj ŝia amanto.

Aĥajo: roma provinco en Grekujo sude de Korinta Golfo.

Aĥilo: unu el la ĉefaj roluloj en *Iliado* . Li estis la plej elstara batalanto de la grekoj kontraŭ Trojo, sed pro ofendo farita al li de la reĝo Agamemnono, dum longa tempo li rifuzas partopreni la batalon.

Ajakso: mita heroo el la Troja milito.

Akcio: Lucius Accius (nask. ĉ. 170 aK), verkisto de tragedioj.

Akteono: ĉasisto, kiun la diino Diana transformis en cervon, ĉar li hazarde vidis ŝin nuda, dum ŝi banis sin en arbara lageto.

Akvino: urbo proksimume duonvoje inter Romo kaj Neapolo (moderna Aquino).

Akvitanujo: roma provinco en Gaŭlujo.

Akvoĥorloĝo: roma horloĝo
funkciigata de la regula gutado de akvo
en ujon.

Albaj montetoj: regiono de montetoj
kaj lagoj proksima al Romo (ĉirkaŭ la
moderna Lago Albano).

Albano: urbo proksima al Romo.

Aleksandrio: grava urbo en Egiptujo.

Aleksandro: reĝo de Makedonujo
nomata 'la Granda', brila generalo kaj
konkerinto de la Persa imperio (356-
323 aK).

Amazonoj: fabela tribo de virinaj
militistoj en la antikva mondo.

Aminia: speco de vinbero, el kiu la
Romanoj faris aparte bonkvalitan vinon.

Antio: apudmara urbeto ne tro
malproksima de Romo (moderna
Anzio).

Andromaĥo: en *Iliado* la edzino de Hektoro.

Antigono: filino de Edipo, kaj ĉefrolulo de pluraj grekaj tragedioj.

Apolonio el Tiano: greka filozofo de la 1a jarcento pK, kies vivo havis iujn similecojn kun la vivo de Kristo.

Apolono: la greka sun-dio, transprenita poste de la Romanoj. Kutime prezentata kiel bela junulo, li estis patrono de poezio kaj muziko, sed ankaŭ de medicino kaj ark-pafado.

Araĥno: junulino, kiu tiel lerte teksis, ke ŝi vekis la ĵaluzon de la diino Minervo, kiu transformis ŝin al araneo.

Aricio: urbo en la proksimeco de Lanuvio (moderna Ariccia).

Arkadio: regiono de antikva Grekujo, tradicie prezentata kiel loko kie paŝtistoj vivas idealigitan kamparan vivon.

Aso: roma bronza monero de malalta valoro.

Atiko: regiono de Grekujo, kie troviĝas Ateno.

Aŭgio: mita reĝo kies brutostaloj estis tiel malpuregaj, ke la heroo Herkulo devis ŝanĝi la fludirekton de du riveroj por tralavi ilin.

Aŭgusto: vidu liston de la romaj imperiestroj, p. 615.

Aventino: unu el la sep montetoj sur kiuj estis konstruita Romo.

Azia Provinco: roma provinco en la okcidenta parto de la nuna Turkujo (nomata ankaŭ Malgranda Azio).

Bajo: urbo kun varmaj fontoj en la proksimeco de Neapolo (Napolo), aparte ŝatata de bonstataj Romanoj kiel somerumejo (moderna Baia).

Bakĥanino: sekvantino de la dio Bakĥo, kiu transdonis sin al religia ekstazo dum liaj ritoj.

Bakĥo: dio de la vino.

Betiko: roma provinco (moderna Andaluzio).

Bitinujo: provinco de la Roma Imperio, en la nord-okcidenta parto de la nuna Turkujo.

Bovilo: malgrava urbo proksima al Romo.

Brunduzio: havenurbo en suda Italujo (moderna Brindisi).

Bucefalo: la ĉevalo de Aleksandro la Granda.

Cecilio: Caecilius Statius (ĉ. 220-166 aK), verkisto de komedioj.

Celio: unu el la sep montetoj, sur kiuj estis konstruita Romo.

Cereso: diino de agrikulturo kaj greno.

Ciklopo: giganto kun nur unu okulo meze de la frunto.

Citro: antikva muzika instrumento, iom simila al liro.

Civitana Milito: milita periodo (49-45 aK), kiam Julio Cezaro minacis la potencon de la aristokrataj familioj, kiuj regis pere de la Senato. Post lia venko super Pompeo, li estis deklarita diktatoro.

Colonia Neronis: (latine) Civito de Nerono.

Dafno: nimfo amata de Apolono, kiu tamen fuĝis de li. Kiam li preskaŭ kaptis ŝin, por eskapi ŝi transformiĝis en laŭron.

Danao: unu el la multenombraj amatinoj de la dio Jupitero, kiu aperis al ŝi en la formo de pluvo el oro.

Dedalo: legenda greka arĥitekto, konstruinto de la labirinto en Kreto, kiu fuĝis de tie kun sia filo Ikaro per flugiloj el vakso kaj plumoj. Ikaro falis kaj mortis, fluginte tro proksimen al la suno, tiel ke la vakso fandiĝis.

Delfo: urbo en Grekujo, kie estis fama templo de Apolono.

Diana: virga diino de ĉasado kaj de la luno.

Edipo: mita reĝo de la greka urbo Tebo, kiu senscie mortigis sian patron kaj edziĝis kun sia patrino.

Elektra: fratino de Oresto.

Eneado: epopea verko de Vergilio pri la vojaĝo de Eneo, konsiderata de la

Romanoj ĉefverko de ilia literaturo.

Eneo: heroo de la Troja milito, ĉefa rolulo de la epopeo de Vergilio *Eneado*, kaj mita fondinto de Romo.

Enio: Quintus Ennius (239-169 aK), poeto kaj verkisto de tragedioj.

Esernio: Aesernia, urbo 170 km. sudoriente de Romo (moderna Isernia).

Eŝilo: Aeschylus (ĉ. 525-456 aK), grava verkisto de tragedioj de la greka epoko.

Eskvilino: unu el la sep montetoj sur kiuj estis konstruita Romo.

Etrusko: ano de popolo loĝanta en centra Italujo, okupanta la regionon norde de Romo kaj la modernan Toskanujon; ĝi estis konkerita kaj poste asimilita de la Romanoj en frua fazo de la roma disvastiĝo.

Etŝildulo: la malsamaj specoj de gladiatoroj estis rekoneblaj per siaj armiloj. La etŝilduloj ankaŭ nomiĝis ‘Trakoj’, ĉar ili portis la tipajn armilojn de Trakaj militistoj: kurban sabron kaj malgrandan rondan aŭ kvadratan ŝildon.

Eŭripido: Euripedes (ĉ. 480-406 aK), unu el la plej gravaj verkistoj de tragedioj de la greka epoko.

Falerno: monto apud la moderna urbo Mondragone (norde de Napolo), el kies vinberejoj venis speco de altkvalita vino.

Farsalo: loko de decida batalo (48 aK) de la Civitana Milito inter Pompeo kaj Julio Cezaro, en kiu mortis unu el la prauloj de Nerono.

Faŭno: kampara dio kun homa korpo sed kornoj, vosto kaj kruroj de kapro.

Fenicoj: antikva popolo loĝanta apud Mediteraneo.

Ferento: negrava urbo sudoriente de Romo (moderna Ferentino en la provinco Frosinone).

Fidio: Phidias (ĉ. 480-430 aK), unu el la plej famaj grekaj skulptistoj, kiu laŭtradicie respondecis pri la skulptaĵoj ĉe Partenono.

Fiŝulo: speco de gladiatoro.

Flora: malgrava roma kampara diino.

Florentio: latina nomo de Florenco.

Frigujo: regno en la Roma Imperio (nuna centra Turkujo).

Gaŭlujo: roma provinco, kiu troviĝis en proksimume la regiono de la nunaj Francujo kaj Belgujo.

Gemino: Gemina, kromnomo de legio de la roma armeo.

Gorgono: unu el tri mitaj fratinoj, monstroj teruraspektaj (vidu **Meduzo**).

Granda patrino: la diino Cibelo, kies festivalo *Megalesia* okazis en aprilo; ĝi daŭris ses tagojn kaj estis solenata interalie per teatraĵoj.

Ĝermaniko: Germanicus Caesar (15aK-19pK), populara roma generalo, fama pro siaj venkoj super la ĝermanaj triboj laŭlonge de Rejno.

Ĝermanujo: regiono en norda-centra Eŭropo, parte regata de Romo, kie vivis la ĝermanoj kaj aliaj triboj.

Hadeso: laŭ la grekoj, la subtera regno, kie vagas la animoj de mortintoj.

Harpio: kruela monstro kun korpo de birdego kaj virina kapo.

Hektoro: heroo el la epopea poemo *Iliado*, kiun mortigis Aĥilo.

Heleno: elstare bela virino, filino de Jupitero kaj Leda, kies forrabo fare de Pariso kaŭzis la Trojan militon.

Herkulano: bonstata urbo proksima al Neapolo (Napolo). Post la periodo de ĉi tiu romano ĝi, same kiel Pompejo, estis detruita de la erupcio de Vezuvio.

Herkulo: mita heroo, eksterordinare forta, kiu interalie plenumis dek du superhomajn taskojn. Post sia morto li iĝis dio.

Herodoto: Herodotos aŭ Herodotus (484-ĉ. 425 aK), greka historiisto.

Hipolita: mita reĝino de la Amazonoj.

Hipolito: mita junulo, filo de la reĝo Tezeo, kiu estis devigata forlasi sian hejmon, kiam lia vicpatrino enamiĝis je

li; poste li mortis, kiam liaj ĉevaloj terurigis kaj faligis lin.

Homero: greka poeto, kiu vivis verŝajne en la 9a jarcento aK, tradicie konsiderata verkisto de la epopeoj *Iliado* kaj *Odiseado*.

Horacio: Quintus Horatius Flaccus (65-8 aK), latina poeto, verkisto de poemoj satiraj kaj lirikaj.

Horoj: la Romanoj dividis la tagon inter la leviĝo kaj subiro de la suno en dek du egalajn horojn. Sekve, la horoj estis pli longaj somere kaj malpli dum la vintro – kaj nokte inverse. La sepa horo tamen ĉiam komenciĝis je tagmezo.

Hio: greka insulo de kie venis aparte ŝatata speco de vino.

Iduoj: laŭ la roma kalendaro, la 13a aŭ la 15a tago de la monato.

Ifigenio: filino de la reĝo Agamemnono, kiu oferis ŝin al la diino Diana dum la vojaĝo al Trojo. La diino tamen savis kaj forportis ŝin.

Ikaro: vidu **Dedalo** .

Iliado: greka epopeo pri la milito de Trojo, konata kaj studata de ĉiuj edukitaj Romanoj (vidu **Homero**).

Italiko: Italica, kromnomo de legio de la roma armeo.

Iziso: grava egipta diino, kies kulto, kun promeso de postmorta vivo, iĝis tre grava en Romo.

Judujo: roma provinco okcidente de Morta Maro.

Julio Cezaro: vidu liston de la romaj imperiestroj, p. 615.

Junono: la reĝino de la gedioj kaj edzino de Jupitero; ŝi aparte protektis virinojn.

Jupitero: la reĝo de la romaj gedioj, fama pro siaj multaj amatinoj; ofte li aliformigis sin por pli facile aliri ilin.

Kadmo: mita heroo, fondinto de la urbo Tebo.

Kaligulo: vidu liston de la romaj imperiestroj, p. 615.

Kampanujo: regiono en sud-okcidenta Italujo (moderna Campania) ĉirkaŭ la urbo Neapolo (Napolo).

Kapadocio: provinco de la Roma Imperio en la oriento de la nuna Turkujo.

Kapitolo: unu el la sep montetoj de Romo, sur kiu estis la ĉefaj temploj.

Kapreo: itala insulo.

Karsulo: Carsulae, urbo 100 km. norde de Romo (proksima al la moderna Terni).

Kartago: grava urbo en la roma provinco Afriko (apud la moderna Tunizo).

Kasio: spicaĵo, foje uzata por anstataŭigi cinamon.

Kastoro kaj Polukso: mitaj herooj, ĝemelaj filoj de Leda kaj Jupitero.

Katono: Marcus Porcius Cato Uticensis (95 - 46 aK), kontraŭulo de Julio Cezaro dum la Civitana Milito, konata pro siaj rigoraj moralaj principoj kaj rifuzo cedi al korupteco.

Kazino: *Casina* , teatraĵo de Plaŭto, grava roma verkisto de komedioj (Titus Maccius Plautus 254-184 aK).

Klaŭdio: Tiberius Claudius Nero (10aK-54pK), imperiestro de Romo kaj la adopta patro de Nerono.

Kliento: viro, kiu ricevis la helpon kaj protekton de pli potenca homo (**patrono**), kaj mem subtenis tiun per sia voĉdono; liberigita sklavo fariĝis la kliento de sia antaŭa mastro.

Klitemnestro: vidu **Agamemnono** .

Konso: malgrava dio, ligita kun la konkuroj en la Cirko.

Korciro: granda insulo apud la okcidenta bordo de Grekujo (Korfuo).

Krizeiso: virino el Trojo, kies forrabo fare de Agamemnono ludis gravan rolon en la disvolviĝo de la Troja milito.

Kupido: la roma dio pri amo, kutime montrata kiel petola knabeto kun flugiloj kaj malgranda pafarko; homo trafita de unu el liaj sagoj tuj enamiĝas.

Kurio: nomo de grava roma familio.

Lanuvio: urbo proksima al Romo.

Latinujo: la regiono ĉirkaŭ Romo (moderna Lazio).

Leda: amatino de la dio Jupitero, kiu alprenis la formon de cigno por amindumi al ŝi.

Lesbo: greka insulo en Egea Maro.

Lidujo: regiono en Azia Provinco, kiu donis sian nomon al difinita muzika stilo.

Lisipo: Lyssipus el Siciono en norda Grekujo (4a jarcento aK), skulptisto.

Lugduno: Lugdunum, latina nomo de la nuna Franca urbo Lyon.

Lukrino: salakva lago proksima al Bajo (moderna Lago Lucrino).

Luzitanujo: roma provinco (modernaj Portugalujo kaj okcidenta Hispanujo).

Maljuna Dio de la Maro: vidu **Proteo** .

Mallevitaj dikfingroj: dum la ludoj la spektanta homamaso per levitaj aŭ mallevitaj dikfingroj pardonis aŭ kondamnis venkitajn gladiatorojn.

Marcelo: vidu **Teatro Marcelo** .

Markaŝtano (=ekino) : globforma marbesto, ofte manĝebla, kovrita de akraj pikiloj, tiel ke ĝi iom similas la eksteran ŝelon de kaŝtano.

Marso: la roma dio de milito.

Medeo: sorĉistino fifama pro siaj multaj kruelaj agoj, interalie la murdo de siaj propraj infanoj.

Meduzo: mita monstrino kun serpentoj kiel haroj, tiel hororaspekta, ke ĉiu, kiu

rigardis ŝian vizaĝon, tuj transformiĝis al ŝtono (vidu **Gorgono**).

Menelao: unu el la reĝoj, kiuj partoprenis en la milito kontraŭ Trojo, la edzo de la belega Heleno kaj frato de Agamemnono.

Merkuro: la dio de komercado kaj mesaĝisto de Jupitero, kutime prezentata kiel vigla junulo kun flugiloj ĉe la ĉapelo kaj la sandaloj.

Mesalina: Valeria Messalina (ĉ. 22-48 pK), la tria edzino de Klaŭdio, antaŭ ol li edziĝis kun la patrino de Nerono. Ŝi estis fifama pro siaj multegaj amantoj. Dum ŝi estis ankoraŭ edzino de Klaŭdio, ŝi formale edziniĝis kun Gajo Silio (Gaius Silius) kun la celo, ke li anstataŭu Klaŭdion kiel imperiestro; post malkovro de la komploto ŝi kaj ŝia amanto estis ekzekutitaj.

Metamorfozoj: vidu **Ovidio** .

Midaso: mita reĝo, kiu preferis la ludadon de la kampara dio Pajno al la brila lirludado de Apolono; por puni lin, Apolono transformis liajn orelojn en tiujn de azeno.

Minervo: diino de saĝeco, ĉiam bildigata kun kasko kaj ŝildo; tamen ŝi lertis ankaŭ pri manlaboroj de virinoj, precipe teksado kaj brodado.

Minotaŭro: fabela monstro kun vira korpo kaj kapo de virbovo, ido de la reĝino Pazifao pro ŝia seksa kuniĝo kun virbovo.

Mirono: greka skulptisto (5a jarcento aK).

Mizeno: urbo en la proksimeco de Neapolo (moderna Miseno).

Monto Parnaso: monto en Grekujo, la hejmo de Apolono kaj la Muzoj.

Mucio Scevolo: legenda heroo, kiu intence metis sian manon en fajron por montri al Etruska reĝo malamika la kuraĝon de la Romanoj (6a jarcento aK).

Muzoj: naŭ diinoj, akompanantoj de Apolono, patronoj de diversaj aspektoj de poezio, teatro kaj iuj sciencoj.

Nakso: insulo el la greka insularo Cikladoj en Egea Maro.

Narciso: belega junulo, kiu enamiĝis je sia propra reflektado vidata en lageto.

Neapolo: grava urbo en la sudo de Italujo (moderna Napolo).

Nemeo: urbo en Grekujo, kie en antikvaj tempoj okazis gravaj ludoj.

Neptuno: roma dio de la maro.

Nevio: Gnaeus Naevius (ĉ.270-201 aK), unu el la plej fruaj verkistoj de teatraĵoj en la latina.

Nia maro: *Mare Nostrum* , latina nomo de Mediteraneo.

Nomento: malgranda urbo norde de Romo (moderna Mentana).

Numidujo: roma provinco en norda Afriko, en la regiono de la nunaj orienta Alĝerio kaj okcidenta Tunizio.

Numo: la dua el la mitaj sep reĝoj el la plej frua periodo de la roma historio.

Olimpio: sanktejo en Grekujo, kie okazis gravaj ludoj.

Olimpo: la Romanoj prenis de la grekoj la tradicion, laŭ kiu la gedioj loĝas sur la pinto de Monto Olimpo.

Opio: unu el la sep montetoj sur kiuj estis konstruita Romo.

Oresto: la filo de la reĝo Agamemnono kaj ties edzino Klitemnestro. Post la mortigo de Agamemnono fare de Klitemnestro kaj ŝia amanto, Oresto mortigis ŝin por venĝi sian patron, sed poste freneziĝis pro la hororo de sia propra ago.

Orfeo: muzikisto, kiu laŭ la legendo tiel sorĉe ludis liron, ke eĉ la bestoj venis por aŭskulti.

Orkestro: la granda ronda aŭ duoncirkla spaco en greka aŭ roma teatro, kie staris la ĥoro.

Ostio: apudmara urbo iom sude de Romo, kiun ĝi servis kiel havenurbo (moderna Ostia).

Ovidio: Publius Ovidius Naso (43aK-ĉ.17pK), poeto fama pro sia mitologia verko *Metamorfozoj*, sed ankaŭ pro

siaj aŭdacaj poemoj pri amo kaj volupto. Eble pro tiuj li estis ekzilita de la imperiestro Aŭgusto en la jaro 8 pK.

Pajno: dio de paŝtejoj kaj arbaroj, muzikama, kun homa korpo sed kun kruroj, kaj eventuale ankaŭ oreloj kaj kornoj, kapraj.

Pakuvio: Marcus Pacuvius (ĉ. 220-130 aK), verkisto de tragedioj.

Palatino: unu el la sep montetoj, sur kiuj estis konstruita Romo.

Pariso : mita junulo el Trojo, kiu forrabis la belan Helenon.

Partujo: malamika imperio ĉe la orienta limo de la Roma Imperio, en la regiono de la nuna Irano.

Patrono: vidu **Kliento** .

Pazifao: vidu **Minotaŭro** .

Penelopo: vidu **Uliso** .

Piramo: fama romantika amanto laŭ greka legendo.

Pergamo: urbo en Azia Provinco.

Persio: Aules Persius Flaccus (34-62 pK), verkisto de satiroj.

Petromizo: speco de angilsimila marbesto, tre ŝatata de la Romanoj kiel luksa manĝaĵo.

Plutono: dio de la mortintoj kaj reĝo en la subtera mondo.

Poliklito: Poliklitos, grava greka skulptisto de la 5a jarcento aK.

Polukso: vidu **Kastoro kaj Polukso** .

Pompejo: bonstata urbo proksima al Neapolo (Napolo). Post la periodo de ĉi tiu romano ĝi estis detruita de la erupcio de Vezuvio.

Pompeo: Gnaeus Pompeius Magnus (106-48 aK), roma generalo, interalie konstruinto de la unua konstanta teatro en Romo kaj organizanto de aparte fama kaj pompa triumfo.

Praksitelo: Praxiteles, grava greka skulptisto de la 4a jarcento aK.

Prenesto: urbo proksima al Romo, grava pro sia templo al la diino Fortuno (moderna Palestrina).

Pretoro: elektita altranga membro de la urba konsilantaro, kiu okupiĝis pri diversaj aspektoj de la loka administrado, interalie pri organizado de spektakloj, kaj prezidis en kortumoj.

Priamo: reĝo de Trojo kaj patro interalie de Hektoro kaj Pariso.

Priapo: dio de seksumado kaj fekundeco, protektanto de kampoj kaj ĝardenoj, ĉiam montrata kun grandega staranta peniso.

Prometeo: mita giganto, kiu ŝtelis la fajron de la dioj por doni ĝin al la homaro. Lin punis Jupitero, ligante lin al rokego, kie aglo eterne voradis lian hepaton.

Propertio: Sextus Propertius (ĉ.49-ĉ.15 aK), elegia poeto.

Proteo: mara dio, ankaŭ nomata 'la maljunulo de la maro', kiu konstante ŝanĝis sian formon.

Puteolo: grava havenurbo proksima al Neapolo (moderna Pozzuoli).

Respubliko: la frua periodo de la roma historio, kiam Romo estis regata de limigita nombro da ĉefaj familioj, kiu finiĝis kiam Julio Cezaro estis deklarita diktatoro.

Retulo: speco de gladiatoro, kies armilaro konsistis el granda reto, kiun li

ĵetis kun la celo impliki sian kontraŭulon, ponardo kaj tridenta forkego.

Rodiso: grava insulo en Egea Maro.

Roko Tarpeja: krutaĵo en Romo, de kie oni ĵetis krimulojn en abismon.

Romulo: kun sia ĝemelo Remo, la legenda fondinto de Romo.

Sankta Vojo: Via Sacra, la ĉefa strato de Romo, kiu kondukis de Kapitolo tra la Forumo.

Satiruso: kampara dio simila al faŭno, sed ofte prezentata kiel tipo de senbrida voluptemo.

Saturna Festo: ĝojplena festo meze de decembro, dediĉita al la dio Saturno, kiam ĉiuj, inkluzive de la sklavoj, amuziĝis kaj interŝanĝis donacojn; tiu festo poste identiĝis kun Kristnasko.

Saturno: tre antikva agrikultura dio kaj patro de pluraj gedioj, inter kiuj Jupitero kaj Junono.

Scenokonstruaĵo: ĉe la malantaŭo de la scenejo en la loko, kie en moderna teatro pendas la fon-tolo, ĉe romaj teatroj estis grandioza, tre ornamita fasado (*scaenae frons*), kutime tri-etaĝa kun tri pordoj malsupre por la en-kaj el-iroj de la aktoroj, kaj supre vicoj de kolonoj kaj niĉoj.

Semelo: amatino de Jupitero, kiu estis forbruligita, kiam li aperis antaŭ ŝi en sia dia gloro.

Sesterco: roma mezvalora monero.

Setio: urbo sud-oriente de Romo, de kie venis ŝatata vino (moderna Sezze).

Sinueso: apudmara urbo sur la vojo inter Bajo kaj Romo (proksima al la nuna Mondragone).

Sireno: monstro kun virina vizaĝo, kiu logis per bela kantado pasantajn maristojn, por ke ili pereu sur la rifoĵ.

Skiro: greka insulo en Egea Maro, kie la heroo Aĥilo pasigis sian junecon.

Sofoklo: Sofokles (ĉ. 496-406 aK), unu el la plej gravaj verkistoj de tragedioj de la greka epoko.

Stoikismo: filozofia movado fondita en Grekujo en la 3a jarcento aK; ĝi havis multajn gravajn sekvantojn en antikva Romo, inter kiuj estis Seneko.

Suburo: popola kvartalo de antikva Romo.

Sulao: Lucius Cornelius Sulla (138-78 aK), roma diktatoro. (Laŭ NPIV *Sullo*, sed mi preferas eviti la eksternorman duoblan literon.)

Sulpicio: nomo de grava roma familio.

Taracino: marborda urbo proksimume duonvoje inter Romo kaj Neapolo (moderna Terracina).

Tarento: urbo en la 'kalkanumo' de Italujo (moderna Taranto).

Teatro de Pompeo: la plej malnova teatro en Romo, konstruita de Pompeo la Granda, finkonstruita 55-52 aK. Ĝi tenis 40 000 spektantojn.

Teatro Marcelo: unu el la teatroj de Romo, kiun konstruigis la imperiestro Aŭgusto. Ĝi tenis ĉ. 13 000 spektantojn.

Tebo: urbo en Grekujo.

Tezeo: mita heroo, reĝo de Ateno.

Tiberio: vidu liston de la romaj imperiestroj, p. 615.

Tibero: rivero, kiu trafluas Romon (moderna Tevere).

Tiburo: urbo proksima al Romo (moderna Tivoli).

Tiesto: legenda reĝo, temo de pluraj romaj tragedioj, al kiu oni sen lia scio manĝigis la proprajn filojn.

Tiro: grava havenurbo en Fenicujo (nun en Libano), konkerita de Aleksandro la Granda post sieĝo en 332 aK.

Toskanujo: regiono en centra Italujo.

Trakujo: roma provinco en regiono nun dividita inter Bulgarujo, Grekujo kaj Turkujo.

Tridentego: vidu **Retulo** .

Trojo: urbo en Azia Provinco, kie okazis legenda milito kontraŭ la grekoj; tiu milito, kiu daŭris dek jarojn, estis ĉeftemo de multenombraj grekaj kaj romaj literaturaj kaj artaj verkoj. Vidu **Iliado** .

Tuskulo: urbo proksima al Romo (moderna Frascati).

Uliso: la latina nomo de la ruza greka heroo Odiseo, ĉefa rolulo de la epopea poemo *Odiseado* de Homero. Batalinte en la Troja milito li revenis hejmen nur post dekjara vagado. Inter siaj multaj aventuroj, li renkontis la sorĉistinon Circo, kiu transformis liajn kunulojn en porkojn. Krome li vekis la koleron de la dio Neptuno, kiu punis lin per ŝippereoj kaj aliaj misŝancoj, antaŭ ol li finfine sukcesis reveni hejmen al sia fidela edzino Penelopo.

Unua razado: por romaj knaboj tio estis religia rito, kaj ili atendis ĝis ili jam havis barbon, do kiam ili aĝis pli ol dudek jarojn. La haroj estis oferitaj al la dioj en valora ujo, kaj oni solenis la okazon per ceremonio kaj festeno.

Velio: norda parto de monteto Palatino, unu el la plej antikvaj kvartaloj de Romo.

Velitro: urbo proksima al Lanuvio (moderna Velletri).

Venafro: urbo en suda Italujo.

Venuso: la roma diino de amo, seksa deziro kaj fekundeco, naskita el la ŝaŭmo de la maro.

Vergilio: Publius Vergilius Maro (70aK-19pk), grava poeto kaj verkisto de *Eneado*.

Vesta: roma diino de la hejma fajro. Ŝiaj pastrinoj havis la taskon prizorgi la sanktan fajron sur ŝia altaro, kaj nepre devis resti virgaj dum ili servis ŝin.

Vilao: luksa kampara domo kun bieno; por la Romanoj la vorto rilatis ne nur al la domo sed al la tuta bieno.

Volsinio: urbo proksimume 100 km.
norde de Romo, apud Lago Bolseno
(moderna Bolsena).

La fruaj romaj imperiestroj

la dinastio julia-klaŭdia

Julio Cezaro K 49-44 (Julio Cezaro fakte ne estis imperiestro, sed diktatoro. La unua agnoskita imperiestro estis Aŭgusto.

Aŭgusto aK 27 - pK 14

Tiberio pK 14-37

Gajo (Kaligulo) 37-41

Klaŭdio 41-54

Nerono 54-68

la civitanaj militoj

Galbo 68-69

Oto 69

Vitelio 59

Anna Löwenstein

Anna Löwenstein naskiĝis en Britujo en 1951. Ŝi laboris dum pluraj jaroj en la Centra Oficejo de UEA, kie ŝi redaktis la Jarlibron en 1981. Sub la nomo Anna Brennan ŝi estis fondinto kaj redaktoro de la revuo *Sekso kaj egaleco*, kaj redaktoro de la facila parto de *Kontakto* dum 1983-6. Ŝia plej konata verko estas *La ŝtona urbo*, historia romano, kiu aperis kaj en la angla kaj en Esperanto. Ŝi tradukis en Esperanton la humuran libron *Ksenofobia gvidlibro al la italoj*, kaj redaktis la libreton *Rusoj loĝas en Rusujo* pri landonomoj en Esperanto. Nuntempe, Anna loĝas en Italujo, kun sia edzo Renato Corsetti. Ili havas du filojn, ambaŭ denaskaj esperantistoj.

Piednotoj

[1](#) Partujo: vidu la noton en la sekcio
Listo de nomoj, lokoj kaj romaj apartaĵoj

[2](#) Vilao: vidu noton.

[3](#) La sepa horo: vidu noton “Horoj”.

[4](#) Orkestro: vidu noton.

[5](#) Scenokonstruaĵo: vidu noton.

[16](#) *Vivo de la Cezaroj*: VI. Nerono,
Suetonio, ĉap. 52.

Kolofono

Titolo: Morto de artisto.

Aŭtoro: Anna Löwenstein.

Serio: Stafeto n-ro 33

Kovrilo: Julia Litvinova

Tekstaranĝo: Erik D'Hondt kaj Paŭl Peeraerts

ISBN: 978-90-77066-39-3

UDK: 82.3.892

NUR: 341

Leĝa depono: D/2008/2924/4

Eldonis: Flandra Esperanto-Ligo, Lange
Beeldekensstraat 169, B-2060
Antwerpen, Belgio.

Tiu ĉi ekzemplero de "Morto de Artisto"
estas nekompleta provversio, kaj rajtas
esti senpage pludonata kaj kopiata.